

Dr. Márkus Gábor
KOREIO,
LA KONGRESLANDO



ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO

Dr. Márkus Gábor

**KOREIO,
LA KONGRESLANDO**

ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO

Dr. Márkus Gábor: Koreio, la kongreslando

ISBN 978-963-571-489-6

Ĉiuj rajtoj rezervitaj!

© Dr. Márkus Gábor, 2016

Eldonejo:



**MAGYARORSZÁGI ESZPERANTÓ
SZÖVETSÉG**
HUNGARIA ESPERANTO-ASOCIO

1146 Budapest, Thököly út 58-60. Telefono: +36-70-932-7464

<http://esperantohea.hu>

dr.markus.gabor@gmail.com

Presejo: Vareg Hungary Kft., Budapest

Moto: „*Travel is not just about movement, but the moments worth remembering*”

(Vojaĝoj estas ne nur moviĝoj el loko al alia loko, sed ankaŭ unikaj kaj valoraj memoraĵoj, kiujn indas rememori.)

En ĉi tiu eldonaĵo ĉiuj hungaraj, japanaj, koreaj kaj ĉinaj nomoj aperas en iliaj originalaj formoj, do la familia nomo troveblas unue kaj la persona nomo poste. Laŭ tio ekzemple la familia nomo de la aŭtoro estas Márkus kaj lia persona nomo estas Gábor. Hideg Sándor signife kontribuis al la gramatika korekto, la traduko de tekstoj, la bildredaktado kaj la preseja preparlaboro kaj pro tio la aŭtoro sincere dankas.



La Centro por Japanaj Studoj (CJS) en la Nanzan Universitato en mezjapana urbo Nagoya, kie la aŭtoro kompletigis sian studprogramon je la komenco de la okdekaj jaroj.



Prof. Dr. Johannes Hirschmeier, SVD, President of the Nanzan University

(写真提供：南山学園資料室)

Prof. Dr. Akashi Yoji, Dean and Director of the Center for Japanese Studies



ANTAŬPAROLO

Mi konatiĝis kun la aŭtoro de ĉi tiu libro en la dua parto de la sesdekaj jaroj, kiam li el hungara ebenlanda urbeto kaj mi el transdanubia vilaĝo alvojaĝis al la ĉefurbo por ke ni komencu niajn studprogramojn en la Budapeŝta Ekonomikoscienca Universitato. Post la fino de sia universitata studprogramo Márkus Gábor ricevis eblecon pro sia lingvoscio de angla, rusa, esperanto kaj japana lingvoj, ke li partoprenu ankaŭ alian studprogramon en la Nanzan Universitato en japana urbo Nagoya. Post la sukcesa kompletigo de sia studado li ricevis doktorecon pro la rezultoj de sia esplorado rilate al la komponentoj de la japana ekonomia evoluo.

En urbo Nagoya antaŭ Márkus Gábor la mondo malfermiĝis. Tie li povis ekkoni el la libroj de Johannes Hirschmeier, la internacie fama profesoro kaj doktoro de Harvard Universitato, kiajn entrepreno-direktajn metodojn uzis la japanaj industriaj kaj komercaj organizoj por ke ili povu fariĝi la plej konkurkapablaj organizoj de la mondo en multaj fakterenoj. Sub la gvidado de profesoro Akashi Yoji, doktoro de la washingtona Georgetown Universitato li povis studi kiel Japanio konstruis kaj formis siajn internaciajn rilatojn post la dua mondmilito por ke la lando povu atingi tiun kondukantan rolon en la mondmerkato.

Reveninte al Eŭropo Márkus Gábor kontinue kunlaboris kun diversaj orientaziaj sciencaj kaj kulturaj organizoj. Li invitis prof-rojn Akashi Yoji, Mizuno Yoshiaki, Shen Chenru kaj So Gilsu al Budapeŝto por prelegi en niaj universitatoj pri la komponentoj de la sukcesa japana, korea kaj ĉina ekonomia evoluo post la milito. Laŭ la invito de prof-ro Shen Chenru li klarigis la hungaran ekonomiodirektan sistemon en la internacia akademika konferenco en Pekino kaj kuraĝigis la evoluigon de la scienca, ekonomia kaj kultura kunlaboro en la Ĵinan Universitato en Kantono. Li invitis ankaŭ s-ron Ahn Jong-soo (Kara An), la redaktoron de „*La Solidareco*” por diskuti la socian situacion en Koreio kaj poste ili kune prelegis pri gravaj sociosciencaj problemoj en la korea ĉefurbo, en Seoul kaj ankaŭ en la Indramang Universitato en la sudkorea Jirisan montaro.

Post la orienteŭropaj politikaj ŝanĝoj oni konstruis novan demokratian institucio-sistemon en Hungario kaj tiam la aŭtoro fariĝis estro de nia parlamenta aŭditora kaj kontrola organizo. En tiu posteno li gvidis la institucio-evoluigan programon de la parlamenta aŭditora kaj kontrola organizo por ke Hungario povu aliĝi al la Eŭropa Unio. En tiu laboro li efike utiligis siajn spertojn kaj lingvosciojn, kiujn li ricevis en la japana universitato. Li ne nur kontrolis la registaron, sed per siaj konsiloj, prelegoj kaj artikoloj publikitaj en fakorganoj li ankaŭ helpis la laboron de diversaj registaraj oficejoj.

La aŭtoro publikigis vojaĝraportojn pri siaj spertoj kaj travivaĵoj en la vizititaj landoj kaj tiuj verkoj aperis en diversaj lingvoj kun la titoloj: “Ruĝa suno kaj verda stelo”, “Vörös nap és zöld csillag”, “赤い太陽と緑の星”, „Trans la Flava maro”, „황해를 넘어서”, „Tavasza Szentföldön” kaj „东南亚之旅”. Mi esperas, ke la legado de tiuj libroj kuraĝigas la orientaziajn legantojn, ke ankaŭ ili diligente kaj sindoneme studu la eŭropajn lingvojn por ke ni povu pli fruktodone kontribui al la evoluigo de la sciencaj, kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj inter la orientaziaj popoloj kaj la ankaŭ aziadevena hungara popolo, kiu nun vivas en la centro de malproksima Eŭropo.

Mi kun ĝojo konstatas, ke la libroj jam aperas ankaŭ en la internacia lingvo. Legante la librojn evidentiĝas, ke la diverslandaj esperantistoj de la mondo facile komunikadas kaj ankaŭ mi samopinias, ke la lernado de la internacia lingvo efike helpas la evoluigon de la interhoma kompreno kaj amikeco en nia nuna moderna mondo.

En urbo Budapeŝto, la 2-an de Septembro, 2013.



A handwritten signature in black ink, appearing to read 'Boros Imre', written in a cursive style.

Dr. Boros Imre

membro de la unua Orbán ĉefministra registaro,
ministro sen portfolio, respondecante por
la aliĝo al la Eŭropa Unio kaj komisiita
ministro por agrikulturo kaj landa evoluigo

ENKONDUKO

Antaŭ ĉio, mi povas konfesi, ke la vizito kaj restado de d-ro Márkus Gábor al Koreio estis por ni ĉiuj koreaj esperantistoj ĝojo kaj beno.

Antaŭ 30 jaroj li transvenis al Japanio kaj studinte tie la kulturon de Orienta Azio li konatiĝis ankaŭ kun la japana lingvo. Poste li doktoriĝis en sia universitato en Budapeŝto per disertacio kun la temo "*Analizo de la ekonomia progreso de postmilita Japanio*". En sia hejmlando Hungario, kies tiama reĝimo estis alikolora, doktoro Márkus Gábor kontribuis multe por la progresado de la socio.

Profunde komprenante ne nur pri Japanio sed ankaŭ pri Ĉinio kaj Koreio, kaj havante multe da amikoj en Azio, li ĉiam ĝoje prenis la rolon de pontokonstruo inter la orienta kaj la okcidenta mondoj. Li neniam perdis la ŝancon sciigi sian opinion al homoj, ke pli bona internacia rilato estas atingebla kaj pli bona vivo estas ĝuebla se oni lernas kaj utiligas la lingvon Esperanto.

En Koreio li utiligis rektan metodon por instrui Esperanton tiel facil-kompreneble kaj vivece, ke lernantoj de la alternativa lernejo "Neutiul Feliĉa Lernejo" povis efike progresi en la lernado. Post la lernado ili povis havi ŝancon viziti Hungarion, la hejmlandon de doktoro Gábor kaj tie ĝui vivantan edukadon.

Kvankam dum sia restado en Koreio li estis tre okupita, tamen li trovis tempon por eldoni du lernolibrojn: "*Unua parto de Esperanta kurso de la Indramang Universitato*" kaj "*Dua parto de Esperanta kurso de la Indramang Universitato*". Tiujn librojn bone uzis ne nur siaj universitataj studentoj sed ankaŭ multaj aliaj koreaj esperantistoj en la tuta lando. Al koreaj esperantistoj, kiuj sin pretigas por la 102a Universala Kongreso, d-ro Márkus Gábor estis, kiel Korea proverbo diras: "*dolĉa pluvo post longa sekeco*".

Li prezentis sian Indramang-metodan instrumanieron ne nur por adoleskantoj, sed ankaŭ por plenaĝuloj kaj por studentoj en universitatoj Kyunghee kaj HUFUS (Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj). Li volonte faris prelegojn en nia landa kongreso, donante kuraĝojn en kunvenoj aranĝitaj de nia Korea Esperanto-Asocio. Krome li okazi-

gis ankaŭ regulajn kursojn kaj tiel altiĝis ne nur la lingva kapablo de liaj koreaj amikoj, sed ankaŭ vaste disvolviĝis lia amo al Esperanto inter koreoj.

Por esprimi nian dankon al doktoro Gábor, okaze de la 47a Korea kongreso en lastjara oktobro KEA donis premion al li en la HUFs kampuso, do en la loko, kie la 102a Universala Kongreso okazos en 2017.

Doktoro Gábor estante en Koreio per konstanta kaj vasta reciproka interŝanĝo kun multaj homoj en kampoj de religio, edukado, arto kaj kulturo, donis al la ĝis tiam Esperanton ne konantaj kleruloj certan pruvon, ke Esperanto estas ja lingvo vivanta.

Mi memoras lian vizaĝon ĉiam afablan kaj ridantan kaj mi memoras kiel sincere li tenas sin antaŭ siaj kunparolantoj. Tio jam montras al mi lian internan trankvilecon kaj personecon altvaloran. Doktoro Márkus estas la homo, kiu multe kontribuis al la plilarĝigo de la sfero de Korea Esperanto-movado.

Mi elkore proponas, ke ĉiuj esperantistoj de la mondo legu ĉi tiun novan libron de la aŭtoro pri Koreio kaj pere de tio konatiĝu kun la riĉa kaj malnova kultura heredaĵo de la korea popolo. Legante la libron oni povas informiĝi pri la vivokondiĉoj en la alte evoluitaj orientaziaj grandurboj kaj ankaŭ pri la tradicie modesta vivmaniero de la budhismaj bonzoj en la monaĥejoj kaj en la vilaĝaj komunumoj.

Legante la libron bone montriĝas, ke viglaj kaj fortaj esperantistaj komunumoj troviĝas en Koreio, kiuj diligente preparas por gastigi la kongresanojn de la seula UK. Do venu ĉiuj kaj fartu bone en Seulo!

En urbo Seulo, la 29-an de Februaro, 2016.



01 087

Dr. Lee Young-Koo
profesoro de
Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj
prezidanto de Korea Esperanto-Asocio
prezidanto de Loka Kongresa Komitato de UK

Unua parto

무궁화의 나라에서

EN LA LANDO DE HIBISKOJ

NIAJ AMIKOJ TROVAS NIN SEN ADRESO

Estas konate por vojaĝantoj en Orienta Azio, ke en pluraj landoj, ekzemple en Japanio kaj Koreio la stratoj ne havas nomojn. Tial en tiuj lokoj ne estas uzataj adresoj laŭ eŭropa senco. Tio malfaciligis la taskon de la usonaj soldatoj, kiuj okupis Japanion post la milito. Sen adresoj ili malfacile povis trovi ion ajn en tiu lando. Laŭ anekdoto oni demandis japanojn kial indas konservi tiun tradicion kiu malfaciligas la ĉiutagan vivon. La japanoj respondis koncize kaj sprite: „*Niaj amikoj scias kie ni loĝas, ili trovas nin ankaŭ sen adreso. Sed kial ni devus helpi niajn malamikojn por ke ili povu trovi nin?*”

Ĉiam kiam mi vojaĝas al Orienta Azio, mi prepariĝas al tiuj malfacilaĵoj. Mi elektas hotelĉambrojn proksime al metroo aŭ bushaltejo por ne bezoni kostegajn taksiojn de la flughaveno al la tranoktejo. Mi estas speciale atentema post mia ŝokiga sperto en Nagoja. Antaŭ jaroj mi legis artikolon en japana ĵurnalo pri taksiokutimoj en Nagoja kaj mi informiĝis, ke la veturkosto povis esti pli ol 130 eŭroj inter la flughaveno kaj la urbocentro. Tio estas nekredeble alta sumo por flughavena taksiveturado en Eŭropo.

Monatojn antaŭ mia vojaĝo al Seulo mi trovis tra interreto malmultekostan gastejon en la dekmiliona korea ĉefurbo, 50 metrojn apud la 9-a elirejo de la metrohaltejo Myeongdong. Mi desegnis ĝian skizan mapon sur paperon kaj mi metis ĝin en mian poŝon inter la legitimitoj kaj bankokartoj kiel tre gravan vojaĝdokumenton.

Mia gastejo estis tre afabla. La manaĝero skribis, ke mi venu de la flughaveno aŭ per metroo, aŭ per buso 6001 al la kvartalo Myeongdong. Surloke en la flughaveno venis al mi taksiaŝoforoj informante min, ke tiu buso ne funkcias kaj ne eblas scii kie estas ĝia haltejo, ktp. Ili provis konvinki min, ke mi povis iri en la urbon nur per takso. (La korea internacia flughaveno ne estas en Seulo, sed en urbo Incheon, 40-50 km-ojn for de Seulo.)

Mi tamen sukcese malkovris kie estis tiu buso kaj mi aĉetis la bileton por 14000.- wonoj, kiun mi eĉ sukcesis pagi per mia bankkarto. Post du minutoj ni jam sidis en la komforta brilpura kaj agrable klimatizita

moderna aŭtobuso. Elegante vestita, blankganta ŝoforo gvidis la buson al la urbocentro.

Mi legis en Budapeŝto, ke en la Malproksima Oriento estis ege malvarme en tiu tempo kaj pro tio mi kunportis multege da grandaj, dikaj kaj varmaj vestaĵoj. Tial mi aspektis kiel vojaĝanto al Siberio. Kaj aldone, por malaltigi la pezon de mia manpakaĵo, mi metis la kunportitajn librojn ne en grandan, pezan vojaĝkofron, sed en malnovan, trivitan platan sakon.

Post mia alveno al Seulo mi spertis, ke la vetero estis tre bela, la suno brilis. Tial mi bezonis malfermi la mantelojn, kaj mi metis la ŝalon, la gantojn kaj la ĉapon en mian sakon. Ornamite per plenŝtopita plasta sako mi aspektis en tiu eleganta buso kiel malriĉa grizhara maljunulo el la pasinta jarcento inter la nubskrapuloj de la riĉa kaj moderna orient-azia ĉefurbo.

Post unuhora veturo nia buso alvenis al Myeongdong, kie mi trovis plurajn metroo-elirejaspektajn ŝtuparojn. Pli proksime mi vidis, ke tiuj ne estis elirejoj, sed subpasejoj de granda subtera aĉetcentro nomata „*Myeongdong underground shopping center*”. Ĉar ni estis jam en Myeongdong, mi pensis, ke estos jam facile trovi la lokan metroohaltejon kaj ĝian 9-an elirejon.

Mi demandis kelkajn preterpasantojn kun la skiza mapo en mia mano pri la metrohaltejo. Ĉiu pretis helpi sed la plej multaj homoj tute ne sciis kie la metrohaltejo estis. Tiu fenomeno estis iom stranga por mi, ĉar en Budapeŝto preskaŭ ĉiuj homoj proksime al trajnaj stacidomoj bone scias kie la metroohaltejoj troveblas.

Sed ĉiuj homoj estis helpemaj, pluraj eĉ telefonis al la gastejo kie la hotelisto ofertis veni al la strato montri al mi la vojon. Sed laŭ mia mapo neniu sukcesis identigi, kie ni estis kaj kie estis la gastejo. Kiam mi fine trovis la 9-an elirejon, mi demandis la preterpasantojn denove pri la loko de la gastejo.

Kun ili ni denove longe traserĉis la Google-mapon, sed ni trovis nenie la gastejon indikitan 50 metrojn apud la metrohaltejo. Fine ni konstatis kial. La Google-mapo ne estis preciza, la gastejo estis ne 50

metrojn, sed nur 3 metrojn apud la metroelirejo, ĝuste la dua domo apud la metroo, en la dua etaĝo. Sed tion mi kaj la intertempe amaŝintaj koreoj rimarkis nur post longa tempo, kiam iu rigardis al la apuda muro kaj ekvidis tie la surskribon „*Guesthouse*” (Gastejo).

Mi estis laca pro la okhora tempozona ŝanĝo kaj pro la dekkvin hora flugo kaj mi volis iom dormi. Sed pro la tempozonaj diferencoj mi tamen ne povis dormi, do mi iris promeni en la ĉirkaŭaĵo. Mi renkontis tre afablajn homojn en la stratoj. Antaŭ la promeno la akceptisto de mia hotelo donis al mi turistan flugfolion kun mapo kaj notis sur la mapo aĉetcentron kun tradicia orienta etoso Tio estis la fama Namdaemun merkato.

Kiam la homoj sur la strato vidis min rigardante mapon, ili prenis mian flugfolion kaj donis al mi alian. Ili klarigadis kun gestoj, ke mia informĵurnalo estis jam malnova, ĝi aperis en aŭgusto kaj ili proponis, ke prefere mi uzu la aktualan decembran version.



La Namdaemun, la suda pordego de la korea cefurbo

Por havi pli da korea mono mi iris al monŝanĝejo kun miaj eŭroj. Antaŭ la ŝanĝo mi informiĝis pri la aktualaj kurzoj. Vidinte tion venis al mi gardisto de la banko kaj diris, ke mi ne rigardu la oficialan kurzotabulon, mi eniru kaj li proponos pli bonan kurzon. Kaj vere, ĉe la kaso mi ricevis pli da wonojn kontraŭ miaj eŭroj ol la oficiala kurzo.

Ankaŭ en la bazaro ĉiuj parolis al mi tre afable. Malkiel mi spertis en la arabaj bazaroj, kie kutime oni aŭdas „*fuck you*” kaj similajn malĝentilajn vortojn. Ĉi tie multaj homoj parolis al mi dece en angla lingvo kaj estis homo, kiu salutis min per „*Salem alejkum*” (paco kun vi). Laŭ miaj antaŭaj spertoj ĉi tie ne trompis min la vendistoj. Mi rimarkis tamen, ke la prezoj ĉi tie en Seulo estis pli altaj ol ili estis pasintjare en Busan, en la fiŝmerkato de Jagalchi.

Poste kiam mi jam komencis malsati, mi iris al la surstrataj rostejoj. Tie mi trovis centojn da ekzotikaj bongustaĵoj kaj fine mi aĉetis forte spicitan rostitan kokinaĵon kun spica nudelo. Ili estis vere tre bongustaj. Parte tial, ĉar la nudelo estis farita el rizofaruno. La manĝaĵo angle nomiĝis „*deep fried chicken*”. Mi gustumis ankaŭ eŭropajn manĝojn. Apud la gastejo estis franca bakejo, tie mi manĝis du kukojn, unu el ili estis farita per dolĉa fabo, la alia per salitaj legomoj.

Preventi printempan vitaminmankon mi aĉetis ankaŭ multe da freŝaj fruktoj. La fama orientazia piro nomata japane „*nasī*” ankaŭ en Koreio estas tre populara. Ĝi en Koreio estas ĉirkaŭ kvaroble pli granda ol tiu en Japanio kaj eble eĉ pli bongusta. El tiuj mi aĉetis sufiĉe multe. Sed hejme mi apenaŭ sukcesis manĝi ilin, ĉar ili estis grandaj kiel eta melono. Tial mi apenaŭ sukcesis mordi ilin. Mi vidis ankaŭ alian frukton, kiu nomiĝas japane „*kaki*”, angle „*persimon*” kaj koree „*gam*”. Ĝi ŝajnis esti sambongusta kiel antaŭ kelkaj jaroj, ĝi estis freŝa kaj krakema, eĉ fediklo-folioj estis sur ĝi. Pro tio mi aĉetis multajn specojn ankaŭ el tiuj fruktoj.

Kiam mi provis mordi la grandegan „*nasī*”-piron en mia ĉambro, mi rememoris anekdoton de mia iama instristo Máté Elek pri fanfaronantaj usonanoj. Profesoro Máté instruis anglan lingvon per speciala metodo: en sia lingvokurso li kutime ilustris gramatikon per anekdo-

toj kaj serĉoj. Laŭ tiu anekdoto usona vizitanto vizitis farmon ie en Hungario en la 1970-aj jaroj kaj oni montris al li famajn, bongustajn hungarajn pomojn. La usonano rimarkis:

- *Ĉu ĝi estas pomo? Ĉe ni en Kalifornio la pomoj estas ne tiaj malgrandaj, sed multe pli ruĝaj kaj duoble pli grandaj.*
- *Bone, sed rigardu ĉi-tiujn vinberojn, kiom dolĉaj ili estas. El ili estas farata la fama tokaja vino, pri kio oni diris latine „vino regum, rex vinorum” (vino de reĝoj, reĝo de vinoj).*
- *Ĉu tio estas vinbero? Ĉe ni en Kalifornio la vinberoj estas multe pli flavaj kaj trioble pli grandaj ol tiuj ĉi grapoloj.*
- *Do, rigardu tiun ĉi! Oni montris ion novaĵon al la usonano, sed ankaŭ ĝi ne plaĉis al li.*
- *Ĉe ni en Kalifornio la melono estas multe pli verda kaj kvaroble pli granda ol tiu ĉi en Hungario.*
- *Sed ĝi ne estas melono, ĝi estas pizo.*



Esperanto kurso de la aŭtoro en la KEA oficejo en Mapo

SUKCESA KARIERO KAJ MONAĤEJA SOLECO

Se iu pasigas longan tempon en la Malproksima Oriento, li al kutimiĝas al la ekzotikaj aziaj manĝoj, kaj revenante al Eŭropo aŭ Ameriko eĉ post jaroj li ŝatus denove gustumi tiujn manĝojn. Ankaŭ mi same. Mi scias, ke la nacia manĝo de Koreio estas la kimĉio kaj pro tio mi ĉiam elektas ĝin ie ajn an la mondo vizitante korean restoracion.

La duan tagon post mia alveno mi iris tagmanĝi al tipa korea restoracio en la Namdaemum merkato, kie mi sukcesis tuj en la unua tago manĝi kimĉion kun kimĉio. En la eta restoracio laŭ azia maniero surstrate estis kuiritaj la manĝoj antaŭ la enirejo, kaj estis prezentitaj plastaj maketoj de ĉiuj haveblaj manĝoj. Mi elektis rostitan rizon kun kimĉio. Mi esperis ricevi similan manĝaĵon al la maketo kaj mi pensis, ke mi manĝos ĝin laŭ korea kutimo kun kimĉio farita el peklita ĉina brasiko. Mi pensis tion, ĉar estis kimĉio sur la tablo, do mi nur atendis la rostitan rizon. Post kelkaj minutoj mi bone ricevis la ĉefpladon kaj mi povis konstati, ke ankaŭ ĝi estis farite kun kimĉio. Tiel mi sukcesis jam dum mia unua tagmanĝo manĝi kimĉion kun kimĉio.

Reveninte al la gastejo jam atendis min letero de Lee Jungkee, la prezidanto de la Seula Esperanto-Kulturcentro, en kiu li skribis, ke morgaŭ li sendos iun akompani min al la novjara prelego de Korea Esperanto-Asocio. Mi tre ekĝojis, ke mi ne bezonos sole serĉadi tiun nekonatan oficejon en nekonata loko en la dek miliona grandurbo kie la stratoj eĉ nomon ne havas.

Antaŭ kelkaj semajnoj mia pasintjara gastiganto Kara An proponis, ke denove mi faru la novjaran prelegon de la organizo prezentante mian plej novan libron en la korea lingvo. Bonŝance la organizantoj elektis nun alian programon. Mi jam estis ankaŭ pasintjare en Seulo kaj mi jam prelegis tiam en tiu novjara festo. Pro tio mi pensis, ke por la partoprenontoj estus tede ĉiam aŭskulti min dum tiuj festoj.

Lee Jungkee proponis en sia nuna letero, ke mi iru la venontan tagon al lia oficejo, kies adreson – pro manko de stratadreso – li skribis jene: „*Per metroo-linio 4, tra la elirejo '10' ĉe la stacio 'Myungdong (明洞)', tuj malantaŭa strateto de la Hotelo Sejong (世宗), ĉe 5-etaĝa*

konstruaĵo de Apoteko Kesong (啓聖藥局), antaŭ florvendejo Bekh-wa(百花花園) SEK sidas en la 6-a etaĝo subĉiele.”

Unuavide mi eltrovis, ke la oficejo devis esti ie proksime al mia gastejo, ĉar ĝia enirejo estis kvin metrojn apud la 10-a elirejo de la metroohaltejo Myeongdong. Tio estis tamen nekutime, ke ĝi estus hazarde tiom proksime al mi, aŭ al mia gastejo en dek miliona grandurbo. Kvankam Lee Jungkee skribis metroohaltejon Myungdong, mi supozis, ke temis pri Myeongdong. Ĉar mi jam al kutimiĝis, ke en Koreio oni ne ĉiam skribas vortojn (eĉ sian nomon) same latinlitere. Tial mi supozis, ke temis pri la sama metroohaltejo antaŭ mia gastejo.

Mi skribis la adreson de la oficejo angle por la akceptisto de mia gastejo, pensante ke ŝi scias pli facile ol mi, kie estas la oficejo precize, ĉar ŝi laboras ĉi tie dum jaroj. Ŝi provis helpi, sed ŝi ne sukcesis. Ĉar mi skribis latinlitere la nomojn de la oficejoj, laŭ tio ŝi ne povis identigi. Mi devis reiri al mia ĉambro pligrandigi la ĉinajn simbolojn, kopiaj ilin sur papero kaj tion montri al ŝi. Mi faris tion, ĉar mi jam spertis en multaj orientaziaj landoj, ke la ĉina lingvo estas uzata kiel ĝenerala interlingvo en tiu regiono de la mondo kaj la plej multo de la loĝantaro nur malfacile povas legi la latinajn literojn.

Tiel jam ĉio iris glate. Bonŝance la oficejo de la kulturcentro estis en la dua domo apud mia gastejo, do en la postnajbara domo. Fine ŝi ĝojis trovi en la interreto eĉ la bildojn de la apoteko kaj la florvendejo, ĉar ŝi sukcesis identigi la ejojn per la ĉinaj ideogramoj. La knabino ĝoje konstatis kiom facile eblis trovi ĉion laŭ la kutima orient-azia maniero kaj ŝi ne komprenis kial mi pensis, ke estus pli simple, se ĉiuj domoj havus stratadresojn laŭ nia eŭropa kutimo.

Poste mi iris al la Kulturcentro kaj laŭ la peto de Lee Jungkee mi salutis la partoprenantajn studentojn de la 251-a kurso de la centro. Mi kuraĝigis ilin lerni diligente fremdajn lingvojn, ĉar tiel oni facile povas konstrui rektajn rilatojn kun alilandanoj kaj oni facile povas vojaĝi tra la mondo, same kiel mi.

Poste mi eskaŝis, ke s-ro Lee povas sendi neniun por montri al mi la vojon al la ejo de la vespera prelego. Anstataŭ tio li desegnis sur paperon kie troveblas la Korea Esperanto Asocio en la 16-a etaĝo de

granda palaco apud rivero Han ĉe metrohaltejo Mapo. Laŭ tiu skiza mapo mi havis iom pli grandan memfidon trovi la ejon de la vespera prelego.

Mi ĉiam kunportas la mapon de la metroo sur kiu ĉiu metroolinioj estas montritaj per alia koloro, sed tio tamen malfaciligas mian orientiĝon, ke en Seulo estas tro multaj metroolinioj. Verdire ne estas tiom da koloroj en la ĉielarko kiom da metroolinioj estas en la dekmiliona grandurbo. La trajna laŭtanoncilo diris la nomon de la haltejoj plurlingve, sed tio kelkfoje okazis tiom mallaŭte, ke ne eblis ĝin aŭdi pro la bruo de la pasaĝeroj. Malgraŭ tio mi trovis la centron de la asocio sufiĉe facile.

Dum tiu jaro profesoro So Gilsu faris la novjaran prelegon, kiu venis el budhista monaĥejo antaŭ kelkaj semajnoj, kie li studis la sencon de la homa vivo dum tri jaroj, izolite de la ekstera mondo. La profesoron mi invitis al Budapeŝto antaŭ pli ol dudek jaroj, ke li parolu al ni pri liaj fakaj spertoj. Mi petis lin rakonti al ni, kiel Koreio sukcesis dum mallonga tempo fariĝi la dua plej evoluinta lando de Azio, eĉ tiel ke ĝi estis dum jardekoj kolonio kaj poste en civila milito la tuta ekonomio detruigis.



D-ro So Gilsu kaj la aŭtoro

Post pli ol dudek jaroj ni ĝoje brakumis unu la alian denove kaj mi ankaŭ ĝojis, ke miaj libroj vendiĝis dum minutoj. La profesoro havis ege sukcesan karieron, li fariĝis rekonita fakulo en sia universitato kaj intertempe li estis elektita ankaŭ en la estraron de la Universala Esperanto Asocio. En tiu funkcio li vojaĝadis tra la mondo kaj tri kaj duonan jaron antaŭ sia emeritiĝo li estis petita de famaj amerikaj universitatoj, ke post emeritiĝo li partoprenu en diversaj gravaj internaciaj sciencaj kunlaboroj.

So Gilsu tute surprize tamen ne la vojaĝojn kaj la grandan internacian karieron elektis, sed post sia retiriĝo li ekloĝis en budhistan monaĥejon inter la montoj. Li volis studi la sencon de la homa vivo kaj li volis kompreni kiel oni prepariĝu al la morto, kio certe okazos en la vivo de ĉiu emeritiĝinta homo post pli-malpli longa tempo.

La vivo en la monaĥejo signifis kompletan izolitecon de la ekstera mondo. Dum tiuj jaroj So Gilsu fermis ĉiujn rilatojn al la ekstera mondo, nek telefone, nek letere oni povis kontakti lin kaj ankaŭ vizitanto ne povis veni al li. La vivkondiĉoj tie estis tre malfacilaj, la monaĥejo estis 850 metrojn alte en arbaro kaj vintre la temperaturo estis kelkfoje malpli ol -25 C gradoj.

La vekiĝo estis nokte je la dua kaj duono kaj la enlitiĝo okazis vespere je la naŭa. La tago pasis per meditado, evoluigo de la personeco, studo de malnovaj religiaj skribaĵoj kaj traduko. La pratempajn skribaĵojn la profesoro tradukis el la sanskrita en la korean lingvon. En la monaĥejo estis vegetara manĝo. Oni manĝis dufoje po tage kaj sekve de tio li maldikiĝis per dek kilogramoj. Dum la tri jaroj li dufoje forlasis la monaĥejon pro medicina servo, kiam li estis atakita de sovaĝaj vespoj en la arbaro kaj kiam oni devis lin operacii pro hemoroido.

Post tri jaroj revenante el la monaĥejo al la ekstera mondo li trovis surprize kiom multaj aferoj estiĝis dum la tempo, kiam li vivis izolite en la arbaro. Pri multaj aferoj li scias nenion, ekzemple pri Facebook, pli inteligentaj telefonoj, ktp. La aktualaĵojn nun lia filo rakontas al li.

Sumigante la rezultojn de la pasigita tempo en la monaĥejo So Gilsu diris, ke li fariĝis multe pli feliĉa, ol li estis, kiam li eniris en la templo. Li trovis la sencon de sia vivo kaj li ĝojas, ke li sukcesis ordigi sian vivon. Li rekonis, ke la kolektado de famo kaj mono ne feliĉigas la homon. Li sukcesis resaniĝi el sia astmo post jardekoj kaj ekde nun la celo de sia vivo estos la servado al aliaj homoj. Li ne povas diri ke li fariĝis Budho, ĉar li ne atingis la plenan klarecon, do li ne povis ilumiĝi. Sed li sukcesis akcepti sian sorton kaj trovi la ĝustan vojon irotan, kiu donos celon kaj sencon por sia plua vivo.

Post tiu tre interesa prelego okazis solena novjaron salutanta bankedo kun bongusta vespermanĝo en ĉina restoracio. Mi alvenis al mia modesta gastejo nur malfrue vespere post tiu interesa kaj enhavriĉa prelegkunveno kaj vojaĝante hejmen mi miris la grandiozajn nubskrapulojn en la unika kaj ekzotika dekmiliona orientazia urbego.



La pordego de budhismo al Koreio, kien la unua bonzo alvenis

FREEDOM IS NOT FREE

Mi jam plurfoje pensis fari liston de kunportendaj aĵoj antaŭ vojaĝoj, ĉar ofte nur post la ekiro mi rimarkas, ke mi forgesis ion hejme. Nun mi forgesis hejme la vekhorloĝon, kvankam sen ĝi mi malfacile povis vekiĝi matene ĝustatempe. Estas tiel ĉefe pro la tempozona diferenco inter Hungario kaj Koreio. Tiel mi devus vekiĝi en Koreio, kiam en Hungario mi kutime ekdormas.

La venontan tagon mi nepre devis vekiĝi matene je la sepa, ĉar Hong Sungcho invitis min ekskursi kun sia edzino kaj filo. Li estas supermezlerneja vicestro kaj pasintjare li tradukis mian prelegon en la ŭonbulisma meditata renkontiĝo al la korea lingvo. Li petis min renkontiĝi matene je la oka kaj duono ĉe haltejo de la incheona metroolinio. Tio estas la unua linio de la seula metrooreto. Por atingi la lokon de la renkontiĝo je la oka kaj duono mi devus ekiri je a sepa kaj duono de la Myeongdong-stacidomo.



Dum la jubilea festo de Ŭonbulismo
(Maldekstre en la unua vico sidas Hong Sungcho)

La akceptisto de la gastejo estis tre helpema kaj afabla. Kiam mi diris, ke mi ŝatus vekigi ĝustatempe, ŝi diris, ke ŝi ne povos veki min, ĉar matene jam ŝi ne laboros. Sed ŝi ofertis al mi vekhorloĝon. Ŝi menciis, ke la horloĝo estis tro komplika kaj ŝi ne povis funkciigi ĝin. Malgraŭ tio ŝi helpeme transdonis al mi la horloĝon. Sed mi pensis, ke se ŝi ne povis funkciigi ĝin malgraŭ la korealingva helpilo, tiam ankaŭ mi ne povos tion fari.

La horloĝo povis fari la plej interesajn nebezonatajn aferojn: ĝi povis montri kiam estos superjaro post multaj jaroj en la estonto, ĝi montris ke la diversaj tagoj de la jaro estos en kiu tago de la semajno, ĝi povis montri la temperaturon, ktp. Nur tion ne sukcesis oni fari per ĝi facile, kiu estus la plej evidenta funkcio de vekhorloĝo, do veki min ĝustatempe. Pro tio dum la tuta nokto mi dormis apenaŭ 1-2 horojn, ĉar mi timis tradormi la vekotempon.

La seula metroo unuavide aspektas tre moderna, la vagonoj estas tre puraj, la pasaĝeroj estas tre ĝentilaj, nur informiĝi estas komplike inter la tro multkoloraj metroolinioj. Post iom da serĉado mi tamen sukcesis enrajniĝi en la myeongdonga haltejo. Unue mi vojaĝis sur la kvara linio kaj poste ĝustaloke mi ŝanĝis al la unua linia trajno, kiu portas la pasaĝerojn al Incheon.

Intertempe mi havis en mia mano la mapon de la metroo por rigardi kie mi estis kaj por scii kie mi devos ŝanĝi al Incheon. Dum la vojaĝo mi lernis kiel oni devas legi la korean hangul skribosistemon. La signojn mi jam konis pli frue, sed mi komprenis nur dum tiu veturo kiam oni devas skribi la literojn unu apud la alia kaj kiam oni skribas ilin unu sub la alia. Tiamaniere je la fino de mia vojaĝo mi jam povis skribi kaj legi 95-98%-ojn de la hangul skribaĵoj. En la trajnoj de la seula metroo la nomoj de la metroohaltejoj aperas sur informila ekrano en kvar lingvoj: koree, japane, ĉine kaj angle. Rigardante tiun informilon post unuhora vojaĝo mi jam povis bone trovi kiel oni skribas la nomon de la stacidomo en korea lingvo post kiam mi vidis la samajn vortojn angle kaj japane.

Pro tio mi ie rimarkis, ke post certa punkto nia trajno iris al alia direkto, ol laŭ la mapo ĝi devus iri sur la unua linio. En la sekva haltejo

mi do elvagoniĝis kaj reiris al la lasta ĝusta haltejo al la direkto al Incheon. Tie mi vidis kun granda surprizo, ke la unua linio veturis sur du diversaj vojoj. Tion mi trovis nelogika kaj mi diris al koreoj, ke la trajnoj devus havi du diversajn ciferojn, se ili veturas sur du diversaj vojoj. Sed la koreoj diris, ke por ili la sistemo estis bone ankaŭ tiel, ĉar ili jam alkitimiĝis al tio. Mi komprenis la klarigon, sed pro la superflua kromvojo mi atingis la renkontejon en Incheon nur post kvaronhora malfruo.

Tie jam atendis min Hong Sungcho kun sia edzino kaj filo, kun kiuj ni vizitos la DMZ-n en la norda regiono. DMZ signifas desmilitarizadan zonon. Tio estas ok kilometra larĝa zono inter Norda Koreio kaj Suda Koreio, kiu estas sub la kontrolo de UNO (Unuiĝintaj Nacioj) kaj neniu rajtas eniri tien.



Deziroj kaj esperoj de miloj da koreoj estas skribitaj sur la bendoj sub la barildratoj kies familioj estas disŝiritaj de la landlimbarilo

La zono estas ĉirkaŭ 100 km-ojn norde de Seulo kaj la vojo tien iras apud la Imjin gang, do apud la Imjin rivero. Pikdrata barilo estas konstruita apud la riverbordo kun gardoturoj kaj militistoj observas la ĉirkaŭaĵon en tiuj gardoturoj. Estas same ĉe la senmilita zono. La funkciigado de tiu grandskala hejmlandprotekta sistemo postulas grandajn homfortojn kaj multe da mono.

La senmilita zono estas interesa ankaŭ el turismaj vidpunktoj. Tie oni sukcesis konservi la originan naturon, ĉar dum longa tempo neniu rajtis iri tien. En multaj aliaj lokoj, kie la teron la loĝantoj uzas, la naturo jam estas detruita kaj la netuŝita origina naturo malaperis. Nuntempe diversaj sovaĝaj bestoj ĝuas vivi en la protektata senmilita tero, kie homoj ne povas ĝeni ilian vivon. Unu el tiuj raraj bestoj estas la gruoj, kiujn ni povis rigardi tre proksime sur la neĝkovrita tero, veturante proksime ĉe la desmilitarizada zono.



Belega templo en paca arbara ĉirkaŭaĵo

Mi vidis multajn grupojn, kiuj apartenis al du specoj. Unu el ili estis la speco de la ordinaraĵaj grizaj grupoj kaj al la dua speco apartenis la grandaj blankplumaj, nigravostaj, ruĝkronaj grupoj (angle: red crown crane). Tiuj birdoj vivas monogaman vivon, somere ili nestas en Rusio, eble en Kamĉatko, kaj nur por la vintraj monatoj ili migras al Koreio. Ili promenas en malgrandaj grupoj. Ĉiam estas tri, aŭ kvar birdoj proksime unu al la aliaj, ili estas patro, patrino kaj unu aŭ du idoj.

Ni vizitis lokon, kiu nomiĝas Cheorwon. Tie ni vidis multajn grupojn kaj aliajn defenditajn bestojn, sed ni vidis ankaŭ la sekvojn de la militkonfliktaj eventoj. En la loka muzeo troviĝas multaj militaj vestaĵoj, monoj, armiloj, legitimiloj kaj ceteraj objektoj, kiujn oni prenis de nordkoreaj soldatoj, kiam ili provis eniri en la sudkorean teritorion. Estis malkovrita ankaŭ multkilometra longa tunelo fosita de nordkoreoj por veni al sudaj terenoj tra ĝi. Onidire sudkoreoj aŭdis la borajn laborojn de la nordkoreaj soldatoj sub la tero kaj tiel ili malkovris la subteran vojon kaj malhelpis ke la nordkoreoj eniru al sudkorea teritorio tra ĝi.

Oni organizis gviditan ekskurson en tiujn tunelojn, sed unue ĉiuj ĉeestantoj devis surhavi platan ŝirmĉapon (kaskon). Ĝi estis bezonata ĉar la plafono de la tunelo estis tre malalta kaj oni povis iri en ĝin nur tre kliniĝante. Plej ofte estis mi, la sola alta eksterlandano, kiu preskaŭ batis la kapon. Tiu laciga promeno forgesisigis min, ke ni estis meze de vintro, malgraŭ la januara malalta temperaturo mi malfermis ĉiujn butonojn pro la sentita varmo, ĝis kiam ni revenis al la tersurfaco.

Ĉe vojdisiigo en la tunelo estis granda ŝildo: „*The freedom is not free*”. (La libereco havas prezon). Suda Koreio pagas multe por sia libereco. Ĝi uzas pli grandan parton el ĝia nacia enspezo por patrujdefendo, ol multaj aliaj landoj. Se oni ne devus tion fari, tiam la lando eĉ pli rapide povus konstrui sukcesan, riĉan kaj alte evoluitan ekonomion, ol multaj aliaj landoj de la mondo.

KIEL VILAĜA JUNULINO EN LA ĈEFURBO

Dum la tria vespero de mia restado en Seulo mi decidis promeni iom vespere en la pompe lumigita urbo, sub la grandiozaj nubskrapuloj. Mi volis rigardi ĉu la vendejoj de la Namdemun merkato ankaŭ post la oka vespere estis malfermitaj, aŭ ili jam fermiĝis. En la bazaro tiam ankoraŭ vigle daŭris la vivo, eĉ pliaj manĝejoj malfermiĝis meze de la bazaro, ĉirkaŭbarite per plastaj folioj. En tiuj manĝejoj vespermanĝadis la loĝantoj de la korea ĉefurbo kaj ankaŭ min afable invitadis la kuiristoj. Kelkaj fervove manĝis ŝatatan peklitajn fabosupojn. Ili nomiĝas denĝang kaj ĝongukĝang en korea lingvo, sed mi eĉ ilian odoron ne ŝatis. Tial mi ne volis gustumi tiujn manĝaĵojn, sed mi iris al la Food Court en la tria etaĝo de la seula stacidomo por manĝi akragustan ramenon.

La „*ramen*” estas vaste konata manĝaĵo en Orienta Azio, ĉefe en Ĉinio, Japanio kaj Koreio. Ĝi estas fajne spicita nudelosupo vendata en la fora oriento sekigite ankaŭ en skatoloj. Se iu volas manĝi ĝin survoje, sufiĉas nur ŝuti iom da bolantan akvon en la skatolon kaj ĝi estos manĝebla post kelkaj minutoj. Multaj azianoj tiom ŝatas ĝin, ke survoje nur tiaĵon manĝas ĉiam. Mi memoras, ke pasintjare dum mia ŝipveturo el Busan al Osaka duonhoron antaŭ la 20-25-plada bunta vespermanĝo iu ankoraŭ preparis tian supon por si mem en la koridoro de la ŝipo.

La Food Court restoracio funkcias nekredeble logike en la tria etaĝo de la stacidomo. Sep kuirejoj estas en unu flanko kaj ankaŭ sep estas en la alia. En ĉiu kuirejo estas kuirataj sep diversaj manĝaĵoj kaj la menukarto estas skribite sur grandan murtabulon koree kaj angle. Ekzemple 8-5 signifas la kvinan manĝaĵon kiun oni kuiras en la oka kuirejo. 14 kuirejoj estas en la restoracio, do $14 \times 7 = 98$ diversajn manĝaĵojn eblas manĝi tie.

Mi do elektis la kodon de manĝaĵo „*ramen*”, skribis tion sur paperton kaj montris ĝin al la kasistino. Li kapjesis, mi pagis 3500 Won-ojn, la prezon de la manĝaĵo kaj mi ricevis kvitancon. Mi pensis kiel naiva kaj sensperta vilaĝa junulino en Budapeŝto, ke nun ĉio iros fa-

cile kaj glate. Do mi pensis, ke mi donos la kvitancon al la kuiristo de la oka kuirejo kaj li donos al mi la kvinan manĝaĵon. La kuiristino surpriziĝis pro mia nescio kaj vigle-geste montradis supren, ke mi legu kio estas tie skribita.

Mi sukcesis kompreni post duminuta pensado, ke sur la kvitanco estis skribita ne nur la nomo de la manĝaĵo kaj kuirejo, sed ankaŭ vic-kodo inter multaj aliaj informoj. Mendinte la manĝaĵon la komputilo tuj sciigis la koncernan kuirejon pri la mendo de la koncerna manĝaĵo por ke la kuiristoj tuj komencu fari ĝin freŝe.

Kiam la manĝaĵo estos preta, tiam la komputilo skribos tion sur la grandan ekranon kaj tiam mi povos preni ĝin. La restoracio mem estas granda, pura kaj sen muroj estas plengrandaj fenestroj ĉirkaŭ la tabloj kaj seĝoj. Tiel dum manĝado la gastoj povas ĝui la vidaĵon de la pompe lumigitaj nubskrapuloj.

Post vespermanĝo mi provis rigardi kion faris la aliaj gastoj kun la uzitaj manĝiloj. Do, ĉu ili lasis ilin surtable aŭ kunportis ilin ien. Bonsance iu ĵus finis manĝi kaj mi vidis, ke li portis la manĝilojn kaj la manĝobastonetojn al iu ujo apud la vazlavejo. Ankaŭ mi faris tiel, kaj nur poste rimarkis elirante, ke mi fuŝis denove. Apud ĉiu kuirejo estis propra vazlavejo kaj la manĝilojn mi devintus porti al la koncerna lavejo.

La supo estis tre bongusta, laŭ korea kutimo oni aldonis ankaŭ kimĉion kaj daikon-rafanon. La rafano estis stufite flave kaj la tuto kostis nur du eŭrojn. Jam pasintjare mi kunportis diversajn supopulvorojn el Koreio al Hungario, sed tiuj freŝe faritaj supoj estas multe pli bongustaj. Venontfoje verŝajne mi metos la sekigitan nudelon kaj la supopulvoron en kukinosupon aŭ ostosupon, tiel ĝi pli similos al la rameno, kiun mi ricevis en la Food Court restoracio. Pro la agrablaj spertoj mi planis ankaŭ en la venontaj tagoj veni tagmanĝi al la Food Court. Kaj ĉar mi jam perfekte vidis la funkciadon de la sistemo, mi pensis, ke venontfoje mi ne plu kondutos kiel naiva kaj sensperta vilaĝa junulino en la ĉefurbo.

Post la agrabla vespermanĝo mi ekiris reen piede de la seula stacidomo al mia gastejo en Myeong-dong. Revenante, post la naŭa vespere

mi ankoraŭ vidis la fermajn preparojn de la plejmulto de la namde-munaj bazaristoj, sed en la tendoj kaj en la restoracioj de la bazaro ankoraŭ daŭris la vivo. Forlasinte la Namdaemun bazaron mi troviĝis en ankoraŭ pli granda kaj pli vigla grandurba vivo.

Mi spertis, ke nun jam ne la seula stacidomo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas la centro de la dekmiliona grandurbo, sed Myeong-dong. En tiuj ĉi stratoj nur malfruvespere komenciĝis la vera nokta vivo. Simile kiel dumtage en la bazaro, ĉi tie eĉ post la naŭa vespere ĉiuj vendejoj estis malfermitaj kaj surstrate eblis vidi multegajn manĝantajn homojn. La kutimaj manĝaĵoj estis bongustaj orientaj viandaĵoj, fiŝaĵoj, kaj dolĉaĵoj kaj multaj junulinoj promenis en minijupo en la januara malvarmo. En Myeong-dong post la naŭa vespere ni estis meze de la kutima vigla svarmado de ekzotika orientazia grandurbo.



Tipa korea manĝo en la Namgang lernejo

LEĜO DE MURPHY

La leĝo de Murphy funkcias ankaŭ en Koreio: „*kiu povas difektiĝi, tiu iam difektiĝos.*” Antaŭ ekiro al tagmanĝo ĉe Food Court mi devis reiri al la ĉambro de mia gastejo, ĉar mi forgesis tie mian ĉapon. Por tiu kazo laŭ la popola sperto (aŭ superstiĉo) oni diras en mia hejmlando, ke mi ne havos bonŝancon en tiu tago.

Ĉe mi tio okazas ofte, kaj ankaŭ nun malbonŝancaj eventoj estiĝis tre baldaŭ. Prenante la ŝlosilon en mia poŝo mi rimarkis, ke la insigno de la ŝlosilujo rompiĝis. Tiu insigno servis por konservi la ŝlosilon, montri la pordokodon kaj ankaŭ la pordonumero estis presita sur ĝi. La ŝlosilujo certe ne estis farita por meti ĝin en malgranda ĝinzo-poŝo dum la tuta tago kiel mi kutime faras.

Poste mi trovis ankaŭ rompitan plastan karton en la poŝo de mia polto. Ĝi servis por veturi en la seula metroo, kaj mi ricevis la karton de mia seŭla amikino. Ŝi pruntedonis ĝin al mi por uzi dum la venonta semajno. Tiu karto estas uzebla simile kiel monata vojaĝkarto por aŭtobusoj en Budapeŝto.

En tiu tago mi volis veturi nek metroe, nek buse. La Suno bele brilis kaj la Food Court estis en distanco de mallonga agrabla promeno de mia gastejo. Inter la gastejo kaj la stacidomo estas la fama namdaemuna bazaro, svarmanta kun vendistoj kaj aĉetantoj kaj ilia vido mem estas bona turisma vidindaĵo en tiu tipa orientetosa urboparto.

Preterpasante amike salutis min la vendistoj kiuj vendis bongustajn rostitajn salikokojn kaj polipojn. Ili konis min, ĉar hieraŭ mi manĝis eĉ tri porciojn da tiuj freŝe frititaj frandaĵoj. Tri metrojn apud la rostujo meze de la strato ankaŭ nun staris koreino same kiel hieraŭ. Ŝi stufis etajn raŭpojn en iu bruna saŭco. Sed mi ne gustumis tiujn raŭpojn, verdire eĉ laodoro de tiu poto ne estis apetitoveka por mi. Nur poste mi eksciis, ke tiuj estis ne raŭpoj, sed krizalidoj de silkvermoj. Ili estas tre ŝatataj manĝaĵoj en orientaziaj landoj kaj sekigite kaj kuirite.

Hieraŭ mi pensis, ke mi jam tute bone konis la funkciadon de la Food Court restoracio, tial mi hodiaŭ komencis pli memfide ol hieraŭ elek-ti tagmanĝon laŭ la menukarto el la 98 manĝospecoj. Post legado de la manĝaĵonomoj mi pensis, ke korea kolbasosupo povus esti interesa unika specialaĵo eble unufoje provenda.

Eble mi pensis tion, ĉar en mia infanaĝo la buĉfesteno estis grava fa-milia evento en la hungaraj vilaĝoj. Tiam oni mortigis la porkojn kaj ĉiu familio klopodis fari la plej bongustajn kolbasojn por fieri kiel ĝi sukcesis. Estis granda kutimo sendi gustumajn pakaĵojn al konatoj kaj parencoj. Kaj estas konate, ke la hungaraj kolbasoj el urboj Csaba kaj Gyula estas mondfamaj. Oni eksportas multe da hungaraj vian-daĵoj al diversaj eŭropaj kaj amerikaj landoj. Do mi pensis, ke estos interesa sperto por mi rigardi kiel prepariĝas la loka specialaĵo pres-kaŭ dekmil kilometrojn for de mia regiono ĉe rivero Tisza en Hunga-rio.



Koreoj fermentigas fabojn kaj fazeolojn en tiuj ujoj en ĝardenoj

Mi pagis la manĝaĵon ĉe la kaso kaj atendis pacience por ke mia vi-
conumero aperu sur la ekrano indukante la pretecon de la kolbasosu-
po. Post kelkaj minutoj tio okazis kaj mi jam havis la forte bolantan
manĝaĵon sur plado, kun kimĉio, rizo, stufita rafano kaj iu raŭpeca
aldonaĵo. Esplorante ilin pli bone per okulvitroj mi vidis, ke ili estis
ne raŭpoj, sed tre-tre etaj blankaj maraĵoj kies grandeco estis 2 aŭ 3
milimetroj.

Mi tute ne tiel imagis la kolbasosupon, laŭ miaj eŭropaj spertoj la al-
donaĵoj tute ne estis taŭgaj. Sed la plej granda surprizo estis tamen ne
tio, sed la supo mem. En Eŭropo (kaj ĉefe en Hungario) la kolbaso
kutime estas ruĝkolora, sed tiu supo estis helgriza kiel ĉe ni en Hun-
gario la fazeola supo. Kolbason mi tute ne vidis almenaŭ en la senco
kion ni hejme nomas kolbaso. Anstataŭ ĝi estis ene multe da lardope-
coj kiuj en la vilaĝoj ĉe la bordo de rivero Tisza estas manĝataj ĉiam
nur rostite, neniam kuirite. Krom tio „naĝis” en ĝi strangaj nigraj rin-
getoj. Tiuj povis esti sangokolbasoj, sed eĉ proksime ne povis vidi ĉu
ili estis faritaj el porkosango, aŭ el iu nigra marbesto. Nur poste mi
eksciis, ke ili estis nudeloj faritaj el dolĉterpoma faruno, miksitaj kun
porkosango, en porka intesto. En la malprosima oriento ne estas ku-
tima diri pri io ajn, ke ĝi estas malbona, tial mi nur diris, ke la korea
kolbasosupo estis *interesa* kaj por mi iom nekonata.

Ankaŭ la dentopikilo estis surprizo por mi, ĉar ĝi rompiĝis inter miaj
dentoj, ĉar ĝi estis farita el nesolida rompiĝema plasto. Ĉiukaze post
la aventuro interesa tagmanĝo mi pensis, ke venontfoje mi provos
gustumi iun eŭropan manĝaĵon.

Post tagmanĝo mi ekpomenis denove. Nun mi volis viziti proksiman
grandan katedralon, la sidejon de la seula katolika ĉefepiskopo. Mi
vidis sur mapo, ke ĝi devas esti ie proksime al mia gastejo en la cent-
ro de Myeong-dong, sed mi tute ne povis vidi ĝin pro la altegaj
nubskrapuloj. Malgraŭ tio ne, ke ĝi estis konstruita sur monteton kaj
siatempo post la konstruado ĝi estis la ĉefa vidindaĵo en la regiono.

La preĝejo estis sanktigita en 1898 kaj estis ofertita sub la aŭspicio
de Nia Sinjorino Virgulino. Ĝi estas 23 metrojn alta, la sonorilega
turo estas 45 metra. La katedralo havis signifan rolon post la sende-

pendiĝo en la korea publika vivo. En la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj la katedralo subtenis la popolan movadon por la demokratiĝo kaj disvastiĝo de homaj rajtoj. Vizitante la preĝejon mi vidis ceremonian ekzercan de pastroj kaj laikoj, verŝajne ili ekzercis pastro-sanktigan ceremonion de ĵus finstudintaj pastroj.

Post la vizito de la preĝejo mi iris vespermanĝi en Paris Baguette bakejon. Tie mi aĉetis iun kuglofsimilan molan kukaĵon, sed enmordante ĝin mi rimarkis, ke ĝi estis farĉita (plenigita) per dolĉa kremoŝaumo. Tio ne tre gravis, mi nur rimarkis, ke similaĵo ĉe ni en Eŭropo havas malpli da kremo ene. En similaj kukaĵoj en Hungario kutime estas nur malpli ol duono de tiu kremo. Sed mi konis la proverbon: „*Se vi estas en Romo tiam faru kion la romianoj faras!*” Tial, ĉar mi estis en Seulo, mi provis fari kion la seulanoj faris kaj provis alkiutiĝi al la dolĉaj manĝaĵoj kvankam en Eŭropo ni kutime manĝas salajn manĝaĵojn.



Kuirejo de la iama korea reĝa kortego

MALSUKCESAJ INSTRUADOJ

Matene An Jinsim (Vera) telefonis al mi kaj proponis promeni en la dongdaemuna bazaro kaj poste tagmanĝi tie en iu restoracio. Promeante en la orientetosa densa bazaro mi rimarkis tiajn blankajn maraĵojn en iu ujo, kiajn hieraŭ mi vidis en mia telero en la Food Court restoracio. La vendisto diris, ke tiuj etaj blankaj maraĵoj helpas digesti la porkaĵojn, do verŝajne mi manĝis hieraŭ porkaĵon. Sed ankaŭ li ne sciis, kio povus esti kolbasosupo, ĉar li neniam manĝis tion.

En la venonta stratangulo mi vidis similajn insektojn en poto kiujn mi jam vidis en la ĉefstrato de Namdaemun en iu bruna saŭco, apud la rostitaj salikokoj. Tie mi eksciis, ke ili estis duone sekigitaj salitaj krizalidoj de silkvermoj kaj ili estis tre ŝatataj de infanoj. Viroj kutime manĝas ilin kiel frandaĵo drinkante alkoholaĵon. Vera rakontis, ke oni manĝas ilin kutime kuirite, sed ankaŭ krude estas tre bongustaj. Poste ŝi provis rakonti la diversajn preparajn manierojn de tiuj krizalidoj kaj provis konvinki min gustumi almenaŭ la duone sekigitan salitan unikaĵon. Sed mi ne al kutimiĝis tion manĝi en Eŭropo kaj fine mi ne gustumis la frandaĵon. Tiel malgraŭ la perfekta klariga prelego de Vera ŝia konvinko ne atingis rezulton, kaj ŝia instruado pri la utileco de la manĝado de silkverma krizalido malsukcesis.

Proksime al la viandovendejoj ĉe le najbara montrobreto hundoviano-pecoj estis metite, sed ne rostite kiel mi vidis tion en Hanojo, sed krude. En Koreio la homoj manĝas hundaĵon ne rostite, sed kuirite. Resaniĝante post malsanuleja restado aŭ longa malsano oni manĝas hundaĵon kutime. Laŭ la orientaziaj spertoj ĝi fortigas la korpon.

Post tiu interesa promeno ni iris en etan restoracion en la bazaro kie ni manĝis rostitan fiŝon kiun oni rostis super malfermita fajro. Ni manĝis la fiŝaĵon kun brasika supo. Je la komenco de la manĝo mi pensis, ke la supo estis farita el maralĝo. Krome ni ricevis kimĉion kaj sezamoleajn fabĝermojn kun rizo, stufita legomo kaj sezamoleaj lotusofolioj. Helpe de Vera mi lernis kiel oni devas manĝi en tiuj fisrostaj restoracioj. Kimĉion kaj fabĝermojn oni povas ricevi senlime,

la servistinoj donas novan porcion al la gastoj senpage, se ili vidas, ke ne plu estas sur la telero.

Post tagmanĝo mi adiaŭis al Vera kaj tuj veturis al Suyu, kie Oh Sonmo (Brila) atendis min en la stacidomo. Ŝi invitis min al sia hejmo vespermanĝi kaj mi rigardis kun ĝojo ilian belan loĝejon en nordorienta kvartalo de Seulo. La edzo de Brila estas pastro de ŭonbulismo (Won budhismo), li faris multajn artajn fotojn pri sia edzino kaj tiuj fotoj ornamis la murojn. Baldaŭ alvenis ankaŭ la fratino de Brila kun kiu mi babilis angle. Mi tre miris, ke ŝi estis 50 jaraĝa, mi pensis, ke ŝi havis nur 30 jarojn.

Ĉar ankaŭ ŝi partoprenis en la preparoj de la vespermanĝo, ĝi estis preta post kelkaj minutoj. La vespermanĝo estis tipa korea manĝaĵo: kuirita bovaĵo kun diversaj saŭcoj, ĉina brasiko, sezamoleo, freŝa ostrigo, supo el marplantoj aŭ marbestoj kun konkoj, kimĉio kaj rizo. Ni trinkis korean bieron kaj sakeon kun la vespermanĝo. Ĉio estis tre bongusta, la ostrigo tre freŝa, sed mi ankaŭ al la manĝado de konkoj ne alkutimiĝis, ĉar Hungario ne havas marbordon. Nun la kruda ostrigo estis la manĝaĵo, kiun mi ne gustumis, kvankam ĉiuj aliaj homoj trovis ĝin la plej bongusta.



Minmin, ĝenerala sekretario, Brila, vicprezidantino kaj Kanguruo, vicprezidanto de KEA

Post vespermanĝo la edzo de Brila prezentis teoceremonion, en kiu unue ni povis gustumi specialan korean teon. Ĝia nomo estis „*ruĝa ĉielo*” kaj post tio ni trinkis originalan japanan verdan teon. Apud la teo ni manĝis tre bongustan molan ĉokoladon. Tiom molan, ke eblis manĝi ĝin nur per forko. Post la bonetosa babilado mi alvenis hejmen je la deka vespere al mia gastejo en Myeong-dong.

La venontan tagon mi planis veturi du horojn sude de Seulo al Iksan por partopreni la internacian meditatedan renkontiĝon. En la pasinta jaro mi vojaĝis tien per trajno, sed nun mi veturis per aŭto. Mia amiko, Hong Sungcho veturis samtage tien per sia aŭto kaj li ankoraŭ havis unu liberan lokon. Do, matene mi iris al Songnae per la unua linio de la seula metroo por renkonti lin kaj poste ni kune vojaĝis al la ĉefsidejo de ŭonbulismo, do al la religia centro de la ŭonbulisma eklezio en urbo Iksan.

Tiu vojaĝo estis por mi tre grava, ĉar tie mi povis lerni legi kaj skribi la koreajn ideogramojn, kiel mi jam parolis pri tio antaŭe. En la metroo sur ekrano estis laŭvice skribitaj la nomoj de la stacioj. Ĉe la unuaj haltejoj mi ankoraŭ ne komprenis en kiu kazo oni skribas la signojn unu apud la alia kaj kiam unu sub la alia. Post kelkaj haltejoj mi ekkomprenis la logikon de la skribsistemo kaj poste mi pasigis la tempon provante transskribi la latinliterajn nomojn de la stacioj al koreaj hangul-signoj.

La informsistemo de la seula metroo faciligis mian lernadon, ĉar la nomoj de la stacidomoj aperis en kvar lingvoj: koree, japane, ĉine kaj angle. Mi facile povis legi la skribaĵojn en angla kaj japana lingvoj, kelkfoje ankau en ĉina lingvo. Ĝis mi atingis urbojn proksime al Incheon, la terminalo de la metroolinio, mi sentis, ke mi kapablis legi kaj skribi koree pli ol 90 procentojn de la stacidomaj nomoj ĝuste. Poste miaj amikoj en Iksan diris, ke nur 70% de miaj skribaĵoj estis ĝustaj.

Mi renkontis Hong Sungcho en la metroohaltejo kaj ni iris tuj al proksima restoracio, kie atendis nin eta kompanio. Tie ni tagmanĝis kun la loka esperantista komunumo kaj ni gustumis la incheonan nudelosupon, kiu estis specialaĵo de la restoracio. Estis du diversaj spe-

coj, unu kun blanka, alia kun bruna saŭco. La lokuloj tiom ŝatis ĝin, ke tre ofte estiĝis longa vico de homoj antaŭ la enirejo de la restoracio.

Post la agrable spicita tagmanĝo ni veturis plu al Iksan, kie mi konstatis, ke krom la manĝado de silkvermaj krizalidoj estis ankaŭ alia loka kutimo, kiun mi ne sukcesis ellerni. Tiu loka specialaĵo estis la orient-azia kutimo sidi surplanke, en tiu regiono multaj homoj dum sia tuta vivo sidiĝis nur en tiu maniero. Mi spertis, ke en multaj koreaj kaj japanaj domoj kaj budhismaj temploj eĉ seĝo ne estis por sidi.

Kaj en la meditada renkontiĝo kaj en la posta konferenco por lingvoinstruistoj ni partoprenis la programojn sidante surplanke de la sesa horo matene ĝis la deka horo vespere. Por mi tio estis pli malfacila ol por la koreoj, ne parolante pri la budhismaj pastroj kiuj kapablis sidi senmove dum la 40-minutaj meditadaj ekzercoj. Kelkajn poziciojn, ekzemple la lotusan sidon mi eĉ ne sukcesis ellerni kaj estis malgranda konsolo por mi vidi, ke la aliaj eŭropanoj sukcesis fari tion eĉ malpli sukcese ol mi. Ili eĉ ne partoprenis tiujn ekzercojn kaj la prelegojn ili aŭskultis en la lasta vico sidante sur seĝo.



Daebong, fotisto de esperantaj eventoj kaj Ĝoĵa, redaktoro de La Lanterno Azia, membroj de la incheona esperantista komunumo

Post la solena malfermo en la interkona vespero ĉinoj prezentis graciajn dancojn, iuj gitarludis aŭ kantis, sed la pinto de la amuzprogramo estis la nuntempe furore moda orient-azia rajdodanco kaj ĝia instruado. Tiun dancon ekmodigis fama kantisto Psy (prononce: Saj). En liaj prezentadoj miloj aŭ eĉ dekmiloj da gejunuloj saltadas ritme kun specialaj rajdaj movoj je la ekzotika orienta muziko.

Kiam la kantisto ekkriis ”오빠는강남스타일”, tiam ankaŭ ni devis aliĝi al tiu komuna danco kaj ni devis provi lerni la specialajn danco-paŝojn kiuj similis al rajdaj movoj. Tiujn melodiajn vortojn oni prononcas jene „*oppa gangnamstajl*”, kaj la frazo signifas: „*mia frato vivas vivon laŭ Gangnam stilo*”. Gangnam estas unu el la sudaj urbo-partoj de Seulo, kie okazas dumtage tre riĉa kaj eleganta vivo kaj nokte monduma.

Post kelkaj minutoj mi konstatis, ke mi tute ne havis talenton lerni tiajn dancojn kaj nur sidante rigardis kiel pli aĝaj koreoj, inkluzive budismaj pastroj adaptiĝis al la pulzanta ritmo de la dancanta amaso. La pli junaj saltadis laŭ la instruoj de la du diskotekaj dancistoj tiom ritme kvazaŭ ili estus la nuntempaj posteuloj de Ĝingis kan, kiuj ekde ilia 5-6 jara aĝo rajdadis sur sovaĝaj ĉevaloj en la senlimaj mongolaj ebenaĵoj.



La „*Unu Cirklo*” estas la adorobjekto de la ŭonbulisma religio, kiu estas simbolo de unueco kaj perfekteco de la Universo

LA RELIGIO DE BONFARO

Se budhismo estas la religio de kompatato, konfucismo la religio de bona volo, kristanismo la religio de amo, tiam ŭonbulismo povas nomiĝi la religio de bonfaro. Ĝi estis fondita en Koreio antaŭ cent jaroj kaj la fondinto de la nova eklezio estis Sotaesan (esperantlingve: Sotesano). Li metis tiun penson en la centron de la instruo de tiu nova religio.

Tiu religio estas reformita budhismo. Ĝia ceremonio konsistas el studado de sanktaj skriboj, trejnado de personeco kaj meditataj ekzercoj. La gvidantoj de la eklezio jam de longe subtenas tradukadon de la sanktaj skriboj al aliaj lingvoj por ke ankaŭ aliaj popoloj povu konatiĝi kun la instruo de tiu nova religio. Por helpi tion ili aranĝis kaj aranĝas ĉijare jam la okan fojon la Internacian Esperanto-Renkontiĝon de Meditado en urbo Iksan, en la centro de la religia organizo.

Pli ol kvardek personoj aliĝis al la renkontiĝo el diversaj landoj. El Hungario ĉijare nur mi partoprenis la renkontiĝon. Gjongsan, la ĉefmajstro de la Ŭonbulana Eklezio sendis novjaran saluton al la partoprenantoj. En ĝi li anoncis, ke li preĝis por ke la estonteco de la tuta kredantaro, la tuta popolo kaj la tuta homaro estu plena de la bonfaro kaj lumo de la Darmkorpa Budho.

La ĉefmajstro, do la Granda Darma Majstro de la eklezio atentigis nin, ke la mondo estas plena de urĝe solvendaj taskoj. Li substrekis, ke en la homoj malpliigi la bonkoreco, pligrandiĝas la distanco inter la sociaj klasoj kaj ankaŭ la teron endanĝeriĝas la grandskala malpurigado de la naturo. Li memorigis nin, ke tio povus kaŭzi grandegajn katastrofojn. Por malhelpi ilin li donis kelkajn praktikajn konsilojn.

- Ni kreskigu la virtojn kiujn ni denaske havas, ĉar ne la egoismo nek la sovaĝa konkuro faros nin feliĉaj. La bazo de la vera feliĉo estas la virto!
- Ni plivastigu la bonkorecon en nia ĉiutaga vivo, ĉar la bazo de la moralo estas la konstruo de nova mondo, kiu estas plena de bonkoreco.

- Kunlaborante kun aliuloj ni provu atingi niajn celojn, ĉar nur tiel eblas fortigi la familion, la socion kaj la ŝtaton! Speciale gravas kunlabori por medioprotektado. Unuopaj homoj ne estas kapablaj solvi tiun taskon, sed kunlabore la homaro povas eviti la grandegan katastrofon. Ĉar sen tiu kunlaboro mondskala naturkatastrofo tre verŝajne povos okazi iam en la estonto pro la granda poluado de la naturo.

Choi Simgyeong, la direktorino de la internacia fako de ŭonbulismo, diris, ke eble ni venis al la renkontiĝo por plifortigi la virton de kompato simile, kiel faris tion la Budho, nomata Ŝakjamunio. Aŭ eble ni venis por pligrandigi la amon en ni, kiun Jesuo disradiis en sia instruo. Aŭ povas esti, ke ni venis, ĉar ni ŝatus havi la virton de bona volo de Konfuceo. La direktorino emfazis, ke io ajn el tiuj celoj venigis nin, ni faris bone, ke ni decidis ĉeesti la meditanan renkontiĝon. Aplikoj de la meditaj teknikoj, aŭskultado de prelegoj kaj pensado pri la meditaj temoj helpas, ke ni havu belegan sperton. Nia konscio ŝanĝiĝos dum la renkontiĝo kaj ni estos plenaj de amo, dankemo, bonvolo kaj reciproka helpemo.



La naskiĝdomo de Sotesano, fondinto de ŭonbulismo

Mi vivas en Hungario kaj en Eŭropo mi ne kutimas sidi sur planko. Tial praktiki la meditado surplanke sidante estis malfacile por mi. Mi rigardis mirante, kiel bone la koreaj pastroj povis sidi tute senmove dum longa tempo en la azia sidmaniero sur planko.

La matena sidmeditado komenciĝis per sincera memesploro simile al la konfeso en la kristanaj ceremonioj. Ni salutis ĉiujn budhojn, kiuj estis niaj spiritaj gvidantoj kaj patroj. Ni salutis niajn patrojn, fratojn estintajn, estantajn kaj estontajn, kiuj estas niaj korpaj gepatroj kaj gefratoj. Ankaŭ tiu ceremonio similas al la kristanaj diservoj, en kiuj oni salutas la sanktulojn, kiujn ni rigardas kiel niajn spiritajn antaŭulojn kaj vivmodelojn. Kaj ankaŭ en la kristanaj preĝejoj oni regule preĝas por niaj gepatroj kaj gefratoj estintaj, estantaj kaj estontaj, kiuj estas niaj korpaj gepatroj kaj gefratoj.



Kadre de tiu ceremonio ni preĝis al la Darmkorpa Budho (kiu estas nomata en kristanismo Dio, en judaismo Eternulo). Ni preĝis por ricevi por ni kaj ankaŭ por ĉiuj vivuloj forton, lumon kaj bonintencion. Fine ni preĝis, ke li faru ĉion eblan, ke en nia vivo ĉiu vivulo elradiu lumon, kvieton kaj amon kaj vivu eterne en stato de plena klareco. Farinte tion oni facile povis konkludi, ke pli ol unu kaj duona miliard-

doj da kristanoj en miloj da katolikaj preĝejoj faras similajn ceremoniojn tra la tuta mondo. La diferenco ŝajnas esti, ke en la kristana mondo oni uzas la vorton „Dio” anstataŭ „Budho” kaj uzas la vorton „Ĉiela Mondo”, aŭ „Paradizo” anstataŭ la vortoj „stato de plena klareco”, aŭ laŭvorte „la sankta tero de Budho”.

Post tiu parto de la ceremonio ni legis komune la sanktan skribaĵon. Per tio ni rekonis, ke estas nur unu vero, unu mondo, la homaro estas unu familio kaj la tergloba estas unu granda laborejo. Ni samtempe konstatis, ke malgraŭ tiu unueco ekestis malamikecoj, eĉ militoj pro la tribaj, naciaj, religiaj kaj politikaj diversecoj. Por malhelpi tion - ni legis en la sanktaj skribaĵoj – la tuta homaro devas esti malfermita kaj oni devas nuligi aŭ trapasi la tribajn, rasajn kaj religiajn barojn kaj la tuta homaro devas vivi frate sur la tergloba.

Dumtage ni aŭskultis interesajn prelegojn kaj vespere ni havis tempon ankaŭ por amuziĝo, kaj por konatiĝi kun la tre riĉa korea kulturo kaj orient-aziaj tradicioj. Krom tio bongustaj pladoj de aziaj manĝaĵoj, bankedo, interkona vespero, prezento de koreaj kantoj kaj dancoj, kuirkurso kaj interesaj ekskursoj faris neforgesebla la renkontiĝon.



Gjonsan, la nuna Ĉefmajstro

Vespere kutime ni finis nian programon per la 108 riverencoj, kiu estis speciala kvardek minuta tagofina ceremonio. Dum la ekzercado de tiu meditata metodo ni lernis kiel ni evoluigu nian personecon por estiĝi pli modestaj kaj por estiĝi sincere niajn samhomanojn. Ni lernis evoluigi niajn korpon kaj menson por rekoni la valoron de nia ekzisto kaj simile la valoron de ĉiuj aliaj vivuloj. La efikojn de tiu meditata metodo mi resumis la duan tagon en mia prelego jene:

- Per apliko de la medita metodo de la 108 riverencoj eblas helpi la evoluigon de nia interna harmonio kaj en eksteraj rilatoj la disvastigon de pacaj rilatoj. Resume eblas diri, ke la meditata tekniko havas favorajn spiritajn, mentalajn, fiziologiajn, moralajn kaj sociajn efikojn.
- La kvardekminuta farado de la 108 riverencoj havas similan efikon, kiun farado de gimnastiko havas, do konservas la korpon en bona sana stato. Pro tio eblas konkludi, ke tiun trejnan metodon oni povas uzi kiel specialan fizikoterapion.
- La sonoj, aŭdeblaj dum la riverencoj, la gluglado de arbara rivereto, la pepado de birdoj kaj la aŭskultado de monotonaj instruoj pri la pripensendaj temoj dum kvardek minutoj kvietigas la korpon kaj malpliigas la streson pro kio suferas centmilionoj da homoj en nia troŝarĝita mondo.
- La pensmaniero kaj la personeco de la partoprenantoj povas pozitive ŝanĝiĝi aŭskultante daŭre la moralajn instruojn kaj la morala nivelo de la komunumo povas altiĝi. Se la partoprenantoj de la ceremonio sukcesas kompreni la mesaĝon de la instruo, tiam ili povas fariĝi pli modestaj kaj ili emas taksi la sencon kaj la valoron de la vivo pli alta. Resume oni povas diri, ke la vivo de la ĉeestantoj povas esti pli feliĉa. Tiu povas esti la individua utilo de la medita metodo, kiu povas esti tre utila psikoterapio en nia nuna mondo, kie la nombro de memmortigantoj estas tre alta.
- Krom tiu individua utilo tiu metodo de sinkultivo kaj ĝia disvastigo havas ankaŭ socian utilon. Se la morala nivelo de la socio fariĝas pli alta, tiam la krimado estiĝas malpli alta,

malpliigas la media malpurigado, la ekonomia evoluo povas esti pli rapida kaj ankaŭ la internaciaj rilatoj povas pliboniĝi. Tial estus dezirinde disvastigi la ŭnbulismajn meditadajn teknikojn ankaŭ en aliaj sociaj grupoj kaj en la orienta kaj en la okcidenta mondo.

Mia prelego havis favoran reagon kaj oni petis min ripeti tiujn pensojn ankaŭ en la venonta ĉefmajstra aŭdienco. La Granda Darma Majstro aŭskultis mian rakonton afable ridetante kaj poste li transdonis al mi donace artan kaligrafiaĵon faritan de li mem.

Poste - malkiel ni planis antaŭe – oni petis min, ke mi parolu pri miaj impresoj pri la meditada seminario ankaŭ en la dimanĉa diservo nomata darmkunveno. Tiu evento okazis en la granda darmhalo de la ĉefsidejo de ŭnbulismo, kiun partoprenis ĉefe la pastroj kaj pastriroj loĝantaj kaj laborantaj en la religia centro. La vivmaniero de la pastroj similas laŭ la okcidenta senco al la vivo de eŭropaj monaĥinoj. Post la darmkunveno diversaj altrangaj pastroj, kiuj estis pasintaj direktoroj de la eklezio salutis min amike. La filino de la tria ĉefmajstro transdonis al mi foton de la pasinta ekleziestro. Ŝi esprimis sian esperon, ke revenonte al Eŭropo ankaŭ mi servos la homojn en Hungario kiel ŭnbulisma pastro per miaj bonaj agoj.

La venontan tagon la organizantoj petis, ke mi ne iru al la komuna vespermanĝo en la kutima tempo. Ili diris, ke aŭto venos por mi kaj portos min al iu nekonata loko. Oni ne diris precize kien mi veturos, do mi supozis, ke simile al la pasintaj tagoj mi devos denove doni intervjuon al loka gazeto aŭ televida programo.

Baldaŭ mi ekvidis, ke mi renkontos ne ĵurnalistojn, sed unu el la ekleziaj funkciuloj invitis min al eleganta restoracio por bankedeca vespermanĝo. Ni manĝis tie tre bongustan kimĉio-supon, en kiu estis kuirita ankaŭ multe da porkospino kaj multe da nekonataj orientaziaj legomoj kaj spicoj.

La ingrediencojn oni portis krude al nia tablo kaj ĉio estis freŝe kuirita sur nia tablo sur eta gaskuirilo. La manĝaĵo estis tre bongusta, sed ĝi sufiĉus ankaŭ por duoble pli da homoj. En mia infanaĝo - tuj post la dua mondmilito - ni ne kutimis forĵeti manĝaĵojn kaj pro tio mi tre

bedaŭris post la vespermanĝo, ke la plej bongustaj restaĵoj estis forĵetitaj.

Dum la kvartaga programo de la internacia renkontiĝo de meditado ne nur la nuna ĉefmajstro sed ankaŭ la emerita ĉefmajstro persone akceptis nin. Antaŭ la akcepto ni ricevis bongustan teon kaj mielan sekigitan persimonon. Tiu frukto ne estas konata en Hungario, sed en Japanio mi spertis, ke tio estis tre populara en Orienta Azio. La japana nomo de la frukto estas kaki, kaj koree oni nomas ĝin gam. Kiam la ĉefmajstro venis en la salonon, tiam ni ne nur kliniĝis antaŭ li, sed laŭ malnova orienta kutimo ankaŭ genuis tiel profunde, ke ni povis meti niajn manojn kaj nian frunton sur la plankon.

En la lasta tago dum nia restado en Iksan ankaŭ pastrino akceptis nin en sia ĉelo kaj montris al ni siajn nekredible variajn kolorajn artajn bildojn. La pastrino mem faris la bildojn el multkloraj papilioj. Ŝi rakontis, ke dum la meditadoj ŝi sukcesis evoluigi sian kapablon rememori pri siaj antaŭaj vivoj. Ŝi ankaŭ lernis tute memstare specialajn metodojn de simpla linia desegnado. Dum mia mallonga restado en ŝia dometo ŝi faris ankaŭ pri mi tian unikan skizan desegnaĵon.



La kvara Ĉefmajstro kun ĉina, pakistana, hungara, japana kaj rusa esperantistoj post la meditada renkontiĝo

LA SEMINARIO DE LINGVOINSTRUISTOJ

Fine de la meditada renkontiĝo ni vizitis la sanktajn lokojn en la centro de la eklezio kaj ĉiufoje ni kliniĝis profunde antaŭ la pagodoj de la ekleziefondinto Sotesano kaj de la sekvinta ĉefmajstro Gongsano. En tiuj pagodoj estas konservataj la relikvioj de la antaŭaj ekleziaj estroj.

Dum la renkontiĝo okazis ankaŭ du interesaj ekskursoj, ni ekskursis al Naesosa kaj al Gjukpo. Laŭ tradicio monaĥino Hjeguduta fondis la templon de Naesosa ĉirkaŭ sescent jarojn antaŭ Kristo. La sanktejoj estis ruinigitaj en la deksesa jarcento pro japana invado kaj oni rekonstruis kaj renovigis la sanktejon en 1633. La templo troviĝas en belega natura medio ĉirkaŭita de montetoj kaj arbaroj. La vojon kondukitan al la ĉefa enirejo oni elektis unu el la cent plej belaj vojoj en Koreio en la jaro 2007.

Poste ni iris al fiŝista vilaĝo Gyokpo, kie ni trovis interesajn geologiajn restaĵojn. El la maro ĉe la vilaĝo elstaras grandega roko. Sur ĝi bonege videblas la diversaj geologiaj tavoloj, kiuj aspektas kiel paĝoj de plurcentjara antikva libro. La ekskurso estis finite per riĉa bankedo, en kiu ni manĝis bongustajn orient-aziajn specialaĵojn kaj gustumis famajn koreajn rizajn vinojn.



Post la meditada renkontiĝo okazis ankaŭ alia grava evento en Iksan. Tio estis la azia regiona seminario de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. En la unua tago estis laŭtlegita la salutmesaĝo de la prezidanto de la organizo, Stefan MacGill kaj poste Lee Jung-

kee, Prof. Dr. Gong Xiaofeng kaj Isikawa Tieko, prezidantoj de la korea, ĉina kaj japana membroasocioj faris mallongajn prelegojn pri la situacio de lingvoinstruado en sia lando.

La unuan prelegon de la seminario mi faris. Ĉe la komenco mi citis ĉinan saĝaĵon, kiu bone montras la rolon de instruado en la evoluo de la homaro.

如果你作一年计划，请你播种！
如果你作十年计划，请你植树！
如果你作百年计划，请你育人！
如果你播种，你只能收一次谷。
如果你植树，你就可采十年果。
如果你育人，你就可百获其益。

*„Se vi planas por unu jaro, plantu semon!
Se vi planas por dek jaroj, plantu arbon!
Se vi planas por cent jaroj, instruu la popolon!
Se vi plantas semon, vi rikoltos unufoje.
Se vi plantas arbon, vi rikoltos dekfoje.
Se vi instruas la popolon, vi rikoltos centfoje.”*



Song Ping, ĉina lingvoinstruistino prezentas kulturajn programojn

Dum la prelego mi menciis, ke mi venis al la Malproksima Oriento el la Eŭropa Unio, kiu havas 23 oficialajn lingvojn. En Eŭropo ni sper-
tas ĉiutage la komunikadajn problemojn kaj ni vidas klare la signife-
con de la lingvolernado en nia pli kaj pli internaciiganta mondo. Mi
trarigardis mian lingvolernadon dum mia vivo, kaj parolis pri la ling-
voj kiujn mi lernadis. Mi diris, ke krom la angla, rusa kaj japana ling-
voj mi multfoje pli bone povis uzi la esperanton, ne nur en mia faka
agado, sed ankaŭ dum miaj turismaj vojaĝoj kaj ankaŭ en konstruado
de novaj internaciaj amikaj rilatoj.

Pro tio mi proponis al la instruistoj, ke ili alvoku siajn lernantojn al
tiu ebleco. La celo de la lingvolernado ne estu nur fari sukcesan ek-
zamenon, aŭ atingi bonajn kreditpoentojn en la lernejoj. Sed la stu-
dentoj komprenu, ke pere de esperanto ili povas havi efikan ilon por
konstrui pli sukcesan personan karieron.

La programo de la seminario estis tre varia. Koreaj, japanaj kaj ĉinaj
prelegantoj raportis ne nur pri siaj spertoj, sed priparolis ankaŭ ling-
vistajn kaj instruajn metodikajn demandojn. Al mi estis interese vidi,
ke en tiu angulo de la mondo la ĉina lingvo estis la regiona ponto-
lingvo, ĉar ĝis hodiaŭ kaj en la korea kaj en la japana lingvoj oni
uzas multegajn ĉinajn ideogramojn. Tiu komplika skribosistemo mal-
graŭ ĉiuj malfacilaĵoj havas avantaĝon, ke ĉiuj simboloj havas prop-
ran signifon. Tial plurfoje okazis, ke kiam japano aŭ koreo volis
klarigi la signifon de nekonataj vortoj, tiam li skribis la taŭgajn ĉi-
najn ideogramojn sur la tabulon.

Tiu temo videble interesis la partoprenantojn de la seminario. Kiam
mi montris, ke ankaŭ mi traktis tiun temon en mia libro, poste tiuj
libroj estis dum mallonga tempo aĉetitaj.

Ni okupiĝis pri la komunikadaj problemoj ne nur teorie en la prele-
goj, sed ankaŭ praktike, kiam ni uzis la diversajn orientaziajn kom-
putilojn. Mi, kiu kutimiĝis al latinaj kaj cirilaj literoj, miris kiom lerte
uzis la orient-azianoj la silaban korean skribosistemon per iliaj
modernaj komputilaj programoj. Unue mi pensis, ke tio estus komp-
lika, sed kiam ankaŭ mi mem provis, tiam mi spertis, ke mi povis pli
rapide skribi la koreajn signojn per mia komputilo ol per miaj manoj.

Sed mi tute ne povis ellerni dum kelkaj tagoj kiel la ĉinoj povis serĉi kaj trovi plurmil, aŭ plurdekmil ĉinajn signojn en la klavaro aŭ ekrano de la komputilo.

La uzado de modernaj komunikiloj en la Fora Oriento estas multe pli disvastiĝita ol en Hungario. Mi vidis tie, ke preskaŭ ĉiu homo uzis modernajn inteligentajn telefonojn kaj tablet-komputilojn. Se mi demandis iun pri vojo, stacidomo aŭ hotelo, tiam kutime ĉiuj koreoj montris al mi la lokojn per tiuj aparatoj. Se iu ne komprenis miajn vortojn angle aŭ japane, tiam oni uzis tiujn komunikilojn kiel vortaro.

En Koreio 99 %-oj de la uzantoj de inteligentaj telefonoj uzas la „*ka-ka-o talk*” komunikan sistemon kaj en Ĉinio la „*kuku*” sistemon. Per tiuj sistemoj eblas bonkvalite paroli kaj rapide sendi bildojn, filmojn, tekstojn kaj sonojn kiuj preskaŭ tuj atingas la aliajn uzantojn. Kiam oni faris foton pri mi en Busan apud la skulptaĵo de fama korea aktorino, post kelkaj sekundoj mi jam ricevis mesaĝon de plurcent kilometroj, ke mi ne montru tiun bildon al mia edzino. Ĉar la skulptaĵo estis tiom realbilde bonkvalita, ke laŭ tio homoj eblus supozi, ke mi havis sekretan edzinon en Koreio.



Ĉe la fino de la seminario ni partoprenis denove interesan ekskurson, ĉifoje al Jeonju, la urbo de korea kulturo kaj arto. Tie estas videbla la plej granda muzea kvartalo de Koreio farita el tradiciaj domoj. La loko havis la nomon „*vilaĝo Hanok*”. Malgraŭ ke mi jam vidis multajn interesajn muzeojn kaj kulturajn vidindaĵojn en la plurcentjara urbo, por mi tiu tradicia vilaĝo estis la plej interesa. La ekskurson al Jeonju ni finis per bonetosa bankedo, kiu okazis en bela tradicia korea restoracio en la malfrua vespero.



La aŭtoro prelegas en la Wonkwang Universitato

EĈ SE BONA, TRE ESTAS TRO

La orientaziaj homoj estas tre afablaj kaj helpemaj kaj inter ili la koreoj estas nekredeble ĝentilaj kaj gastamaj laŭ plurcentjara tradicio. Tial Koreio estis nomita la Lando de Orienta Ĝentileco. Speciale afabla estis ĉina sinjorino, kiu venis al Koreio el urbo Harbin, proksime al la rusa landlino, por partopreni la internacian renkontiĝon. Ŝia nomo estis origine Song Ping, sed laŭ malproksim-orientaj kutimoj ŝi havis ankaŭ esperantan nomon. Ŝi nomiĝis Paco en la esperantista komunumo. Estis tre kortuŝe vidi kiam ŝi transdonis valorajn pentraĵojn al la reprezentanto de la organizantoj kaj al la ĉefmajstro de la ŭonbulisma eklezio, kiam la Granda Darma Majstro akceptis nin ĉe aŭdienco.

Song Ping instruis anglan kaj esperantan lingvojn en ĉeflernejo de Harbin. Por pli efika lingvolernado antaŭ nelonge ŝi gvidis siajn studentojn ankaŭ al Rusio. Tie ili povis konatiĝi kun esperantistoj de Vladivostok kaj povis konatiĝi kun la kulturo kaj arkitekturo de tiu orientazia urbo. En la seminario en Iksan ni aŭskultis interesan prelegon pri tiu ekskurso kun multaj bildoj kaj muziko. Ŝi uzis sian komputilon por la prelego kaj ŝi sukcesis tiom laŭtigi la muzikon, ke tion eblis aŭdi ankaŭ en la plej fora angulo de la granda salono.



Granda Budho-statuo super domo en Busan

Mi vidis, ke la laŭtigilo tre bone funkciis kaj pro tio mi menciis ŝerco, ke ankaŭ mi ŝatus havi tian laŭtigan aparaton, sed bedaŭrinde en Eŭropo ne eblas aĉeti tian. Tiam mi ne pensis kiom gravan sekvon havos mia ŝerca rimarko. Song Ping diris, ke fine de la seminario ŝi donacos ĝin al mi. Vane mi diris, ke mi ne povus akcepti tiun donacon, ĉar ĝi estis tro valora por donaci, kaj mi eĉ ne sciis, ĉu ĝi estus taŭga konekti al mia komputilo, aŭ ne. Sed la afablan sinjorinon ne eblis konvinki, ke ŝi ŝanĝu sian decidon.

Krom ĉinoj, ankaŭ koreoj kaj japanoj estis tre afablaj, multaj donacis al mi valorajn librojn. Pro tio mi vojaĝis plu per pli kaj pli pezaj valizoj al la venontaj urboj. Post la lingvo-instruista seminario mi veturis al Busan por nostalgie kontroli ĉu la tieaj freŝe rostitaj fiŝoj kaj miele dolĉaj fruktoj estis ankaŭ en tiu jaro same bongustaj en la mondfama Jagalchi fiŝmerkato, kiel mi spertis antaŭ unu jaro .

Mi veturis nun al Busan ne per publika aŭtobuso kiel pasintjare, sed per la aŭto de mia amiko kiu ankaŭ partoprenanis la seminarion, kune kun Song Ping. Alveninte al Busan mi elaŭtiĝis ĉe metrohaltejo, dankis pro la veturigo kaj mi diris, ke ekde tiu loko mi jam povus sole vojaĝi al mia hotelo en Jagalchi.

Mi aĉetis mian bileton por la metroo kaj komencis rigardi la mapon sur la muro de la stacidomo. Mi volis ekscii kiun pordon mi devus uzi por eniri kaj volis kontroli el kiu direkto venis la trajnoj. Kvankam mi jam povis legi multajn koreajn signojn, sed multe malpli rapide ol la lokuloj. Vidante mian hezitudon maljuna korea sinjorino venis al mi kaj invitis min sekvi ŝin tra la ĝusta pordo.

Intertempe mi diris al ŝi mian vojaĝcelon plurfoje: „*Jagalchi, Jagalchi*”. Sed tio ne tre interesis ŝin, eble ŝi eĉ ne komprenis mian prononcon. Ŝi gvidis min al pordo al la inversa direkto. Sed ŝia bona intenco estas senduba. Ŝi vidis, ke mi havis grandan kaj pezan valizon, do ŝi pensis gvidi min al pordo, kie lifto portis min al la kajoj, por ke mi ne iru ŝtupare al la reloj kun peza valizo.

Post kiam la pordokontrolilo validigis mian bileton mi demandadis apudajn homojn ĉu tiu estis la ĝusta direkto al Jagalchi. Tiam evidentiĝis, ke el tiu kajo la trajnoj iris al la inversa direkto. Tial mi reiris

tra la elirejo, kie la pordokontrolilo aŭtomate forprenis mian bileton. Pro tio mi iris al la biletaŭtomato por aĉeti novan bileton.

Vidinte tion alia pasaĝero venis al mi, kaj diris, ke mi ne aĉetu alian bileton. Ĉar li vidis, ke miskompreno okazis kaj mi perdis mian bileton, kvankam mi veturis nenien. Li malfermis la pordon al la ĝusta direkto per sia vojaĝkarto por mi, ke mi eniru tien sen plia bileto. Sed mi ne povis akcepti tion, ĉar mi sciis, ke vojaĝante sen bileto, ĉe la alveno mi ne povus doni mian uzitan bileton al la elira kontrolilo. En Koreio kaj same en Japanio la vojaĝantoj ne povas eliri el la stacidomoj sen validaj vojaĝbiletoj.

Mi dankis la helpemon al la korea sinjoro, sed mi preferis aĉeti novan. Tamen li insistis, ke mi faru nenion, ĉar estus maljuste, ke mi pagu duoble. Pro tio li petis min atendi ĝis li iras al la staciestro por raporti la kazon. Post kelkaj minutoj li revenis al mi kun la deĵoranta oficisto, kiu afable donis al mi senpagan bileton.

En la hotelo Sam Won Jang oni akceptis min same afable, kiel antaŭ unu jaro, eĉ la patrino de la manaĝisto venis saluti min persone. Mi okupis mian ĉambron kaj poste mi iris promeni en la urbon. Pasintjare mi manĝis ĉi tie freŝe frititajn reĝajn salikokojn, eĉ malmultekoste, unu peco kostis nur 500 wonojn (duondolaron). En la orientecaj stratoj vikle pasis la vivo de la fama havenurbo. Meze de la strato ankaŭ nun staris sur tabloj freŝe rostitaj kaŝtanoj, rizfarunaj patkukoj kaj koreaj kaj usonstilaj patkukoj. Ankaŭ silkvermaj krizalidoj estis ofertitaj, same en iu bruna saŭco, kiel mi spertis ĉiutage en Seulo en la Namdaemun bazaro. En tiu vespero mi ne aĉetis reĝajn salikokojn, sed freŝe rostitajn sepiojn. Pasintjare oni diris al mi, ke salikokojn eblas aĉeti nur po ses, do mi pensis, ke ankaŭ sepiojn eblas aĉeti nur tiel. Pro tio mi aĉetis ses pecojn por vespermanĝo, sed baldaŭ mi vidis, ke ili estis tro multaj por mi. Ĉar la densa grasa manĝaĵo troŝarĝis mian stomakon. Poste mi sentis, ke prefere mi manĝu malpli dum la venontaj kelkaj tagoj kaj mi decidis, ke dum la venonta tago mi manĝos nur supojn kaj fruktojn.

Tiu situacio kaŭzis problemon, ĉar la venontan tagon mia malnova amikino Oh Gisook (Granda) invitis min kun Choe Taesok (Ŝtonego)

al eleganta restoracio tagmanĝi krudajn fiŝaĵojn kaj aliajn bongustajn maraĵojn por festi nian novan renkontiĝon. Vespere ankaŭ la membroj de la busana lingva klubo aranĝis festan vespermanĝon por ni je la honoro de eksterlandaj esperantistoj. Krom mi ankaŭ multaj ĉinaj partoprenintoj de la meditada renkontiĝo venis post la instruista seminario al la sud-korea havenurbo. En tiu bankedeca vespermanĝo neniu komprenis, kiel mi manĝis nenion. Oni pensis, ke la korea manĝaĵo ne plaĉis al mi. Sed la situacio estis multe pli simpla, mi ŝatintus ĉion gustumi, sed kiel la malnova hungara proverbo diras : „*Eĉ se bona, tre estas tro.*”



Song Ping, Choe Taesok kaj Oh Gisook antaŭ budhista templo

KIAM MANĜAS MORTINTO KOKAĴON KUN RIZO?

Jam pasis pli ol tri semajnoj ekde mia alveno al Koreio kaj jam proksimiĝis la tempo de le reveturo al Eŭropo. Mi tamen havis ankoraŭ abundan tempon por viziti la pitoreskan Youndusan parkon. Tie mi povis admiri la internacie faman Beomeosa sanktejon kaj viziti denove la grandegan Budho-skulptaĵon super la Hongbeopsa templo. Tiu skulptaĵo estas tiom grandega, ke ĝi kovras la tegmenton de la konstruaĵo kaj interne estas granda templo. Oh Gisook, la ĉiam helpema kaj zorgema gvidantino de la Busana Esperanto Klubo gvidis nin tien kun Ŝtonego kaj Song Ping.

La vorton „Beomeosa” oni prononcas „bamasa”, kie en la unua kaj la dua silaboj la vokalo estas inter la esperantlingvaj „a” kaj „o” vokaloj. En la korea ingvo estas tro multaj vokaloj kaj multaj el ili tute ne troviĝas en la eŭropaj lingvoj. La signifo de la lasta silabo „sa” estas „templo”, do Beomeosa estas Beomeo templo. Tiu templo estas konata pri sia belega enirejo krom ĝia speciala beleco. La enirejo estas registrite kiel nacia trezoro de la lando.

Tiu fama enirejo nomiĝas 일주문 (prononcu ilĝumun). La signifo de la vortoj estas „unukolona pordo”, kvankam ne unu, sed kvar kolonoj subtenas ĝian speciale ornamitan supran parton. Sed tiuj kolonoj estis konstruitaj ne en la kvar anguloj de la konstruaĵo, sed en unu linio unu apud la alia. Tial deflanke rigardante la tegmento aspektas kva-zaŭ nur unu kolono tenus ĝin .

Ni alvenis en la templon ĝuste dum tagmanĝo. Ni estis invititaj de la gvidanto tagmanĝi en la grandega manĝohalo. Intertempe ni parolis pri la eŭropaj kaj aziaj manĝokutimoj. Iu menciis, ke en la fora oriento multloke oni metas freŝe kuiritajn manĝaĵojn al tomboj de familianoj aŭ konatuloj en la tombejoj. En la okcidenta mondo tio estas nekutime. En Ameriko kaj Eŭropo oni portas nur florojn al la tomboj. Por okcidentanoj kiuj ne konas la buntan tutmondan kulturan diversecon tio ŝajnas esti sensenca malŝparo. Foje usonano eĉ demandis pri tio sian ĉinan konatulon:

- *Diru, sinjoro Deng, kiun sencon havas porti freŝajn manĝaĵojn regule en la tombejon? Ĉu manĝos iam via mortinto tiun vian daĵon kun rizo kaj la fruktojn, kiujn vi ĵus metis sur la tombon?*
- *Jes, tiam, kiam via mortinto venos el sia tombo por flari la freŝajn florojn, kiujn vi metis sur sian tombon. - respondis la ĉino.*

Post nia vizito al la Beomeosa mi sukcesis viziti ankaŭ tibetan budhisman templon kie la monaĥoj regalis min per tibeta jaka kazeo sekigita malmole kiel ŝtono. Ni trinkis kun ĝi varmegan tibetan teon kun lakto, simile kiel faris Sándor Kőrösi Csoma, la fama hungara lingvisto dum sia longa restado en tibeta monaĥejo. Li pasigis multajn jarojn tie kun tibetaj budhistaj bonzoj kaj dum tiu tempo li verkis la unuan tibetan-anglan vortaron en la mondo. En Koreio kaj Japanio la budhistaj bonzoj kutime manĝas vegetare. Sed la tibetaj monaĥoj manĝas ankaŭ viandon, ĉar en tiu alteco kaj vetero tio estas bezonata por travivi la malvarmajn monatojn.



Hujimoto Hideko artnivele prezentas japanan te-ceremonion

Antaŭ mia forveturo el Busan mi manĝis grandegan kvanton da „karee raisu” por tagmanĝo en la busstacidomo de Nopo. Granda aĉetis por mi ankoraŭ tri sandviĉojn por la vojaĝo. Mi ne volis akcepti ilin, ĉar mi sciis, ke samtage vespere Kara An volus inviti min vespermanĝi en myeondonga restoracio. Sed ĉar ŝi jam aĉetis la sandviĉojn, mi manĝis ilin survoje kaj vespere mi diris al Kara An, ke mi ne povus partopreni la adiaŭan vespermanĝon. Estis tiel, ĉar ankaŭ mi havis nur unu stomakon.

En la lasta tago de mia restado en Koreio mi renkontis la lokan esperantistaron en Incheon. Tie Hong Sungcho (Avo), vicdirektoro de la loka supermezlernejo montris al mi la vidindaĵojn de la urbo. Tagmeze ni iris tagmanĝi al la haveno, kie la tradiciaj koreastilaj restoracioj estis konstruitaj super la maro. Tiuj domoj staris sur grandegaj pali-soj. Dum nia vizito la akvonivelo en la maro estis malalta, tial ni povis vidi ankaŭ la fundon de la maro. Tajdo okazis dufoje tage, tiam la akvo altiĝis per 10 metroj. Por tagmanĝo ni manĝis krudan fiŝaĵon kun freŝaj legomoj kaj kun kimĉio, kiu estis certe la plej populara manĝaĵo en Koreio.



Antaŭe: Prof. Dr. Gong Xiaofeng ĉina ILEI prezidantino kaj Kim Kwangsoo, prezidanto de Ŭonbulisma Esperanto-Asocio

Post tagmanĝo ni vizitis la ĉinan kvartalon de Incheon kie ni rigardis la skulptaĵon de generalo Douglas MacArthur apud la ĉina kvartalo. Li estis la fama militestro, kiu laŭiris la rangovicon de vicleŭtenanto ĝis kvinstela generalo. Li havis gravan rolon en la elformigo de la orientazia situacio post la dua mondmilito. Lia diro „*En milito nenio anstataŭas la venkon.*” fariĝis fama en la tuta mondo. Ĝi estis ĉizita angle kaj koree en la bazon de lia grandega skulptaĵo sur la monto-pinto.

Ni finis la interesan ekskurson kun la lokaj esperantistoj per adiaŭa vespermanĝo, kie mi denove gustumis la faman nigran nudelon. Ĝi estas ĉindevena unupotaĵo, nekredeble malmultekosta en tiu retorcio, kiun ni vizitis. Unu porcio kostas nur 2000 wonoj kaj pro tio kulture multaj homoj atendas eblecon eniri la restoracion en longa vico sur la strato. Miaj koreaj amikoj elektis rostitan porkaĵon en dolĉa saŭco, kiu troviĝas ankaŭ en ĉinaj restoracioj en Hungario. Sed laŭ mi tiu ĉi ĉina manĝo en la korea restoracio estis multe pli bongusta ol tiu en Hungario. Kiam mi diris, ke mi tre ŝatis la forte spicitajn koreajn manĝaĵojn, tiam miaj geamikoj proponis, ke post kelkaj monatoj mi denove venu al Koreio. Tiel mi povos vojaĝi al Tokio tra Seulo, kiam mi vojaĝos al la jubilea centa kongreso de japanaj esperantistoj. Kaj tiel mi povos denove ĝui la bonguste spicitajn koreajn manĝaĵojn en Seulo.

Post la abunda vespermanĝo mi revenis malfrue vespere al Myeongdong per la incheona metroo. Mi konstatis ĝoje, ke je la fino de mia trisemajna restado en Koreio mi jam kapablis legi ĉiujn koreajn literojn skribitajn sur la informtabulon de la metroo. La venontan tagon matene mi reveturis al Eŭropo. Hazarde mi veturis kune kun Ŝtonego de Seulo ĝis Helsinki kaj tiel en la aviadilo ni povis ankoraŭ babiladi pri la komunaj travivaĵoj kaj spertoj kiujn ni havis en la meditada renkontiĝo.

Per tio mi finis mian laŭvican trisemajnan vojaĝon al Koreio. Reveninte al Budapeŝto mi elpakis mian valizon kaj trovis en ĝi en zorge pakita angulo sendifekte la kaligrafiaĵon ricevitan de la Granda Dharma Majstro de la Ŭonbulisma Eklezio. La teksto de la kaligrafio estas kvar ĉinaj ideogramoj. Rigardante la plurmil jarajn ĉinajn skri-

baĵojn mi pensadis pri la profunda simileco - malgraŭ la surface videbla malsameco - inter la instruoj de la orientaj kaj okcidentaj religioj, kiuj elformis la vivmanieron de pluraj miliardoj da homoj.

Laŭ la doktrino de Sotesano, la fondinto de ŭonbulismo la homoj povas firiĝi feliĉaj per

- la bonfaroj kaj inter aliaj la servoj al aliaj homoj,
- la laboro por konstrui pacon inter landoj kaj popoloj kaj
- la agado por fari harmonion inter la homoj kaj la naturo.

Laŭ la ŭonbulisma instruo la homoj povas tiamaniere atingi la celon de sia vivo, do estiĝi en la stato de iluminiĝo. Jesuo, la fondinto de kristanismo havis similajn pensojn kun emfazo de la amo, kies gravecon li metis en la unuan lokon de sia instruo.

Tiun penson esprimas koncize ankaŭ la kaligrafio farita de la Ĉefmajstro de la Ŭonbulisma Eklezio. Laŭvorte ĝi signifas: „*Servante Budhon ankaŭ vi mem fariĝu budho!*”. En la okcidenta mondo tiun penson ni kutime esprimas jene: „*Servante Dion ankaŭ vi fariĝu sanktulo!*” En Koreio la ŭonbulanoj klopodas atingi tiun celon laŭ la instruoj de Sotesano. En la okcidenta mondo samtempe centmilionoj da kristanoj klopodas sekvi la vivmanieron de Sankta Tereza de Kalkutta por atingi la samajn celojn. Ankaŭ ili opinias, ke ili povas fariĝi feliĉaj per similaj bonfaroj, do helpante orfojn kaj bezonulojn kaj per instruado de junuloj kaj flegado de malsanuloj. Tiuj homoj vivantaj en la okcidenta mondo intencas plibonigi la mondon per similaj bonfaroj, kiujn la fondinto de ŭonbulismo diris antaŭ cent jaroj. Tiel mi konkludis, ke malgraŭ la dekmil kilometraj distancoj la du pensmanieroj ne estas tre diversaj.



DU JAROJN POSTE

Pasis jam pli ol du jaroj depost la lasta parto de mia raportserio pri la Lando de Hibiskoj. Dum tiuj du jaroj mi pasigis preskaŭ unu jaron en la Indramang Universitato en la sudkorea Ĵiri montaro kie mi enkondukis la esperanto-instruadon. Post preskaŭ unujara konstanta foresto mi denove vojaĝis al la Fora Oriento en oktobro 2015. En tiu jaro multaj tre gravaj aferoj okazis en la internacia esperanta mondo. La plej grava el ili estis la jubilea Universala Kongreso en Lille, la fama nordfrancia urbo proksime al la belgia landlimo.

Ni partoprenis tiun kongreson kun 2800 esperantistoj el ĉiuj kontinentoj de la mondo. Tial tiu kongresurbo estis elektita, ĉar ĝi estis proksime al la loko de la unua esperantista mondkongreso en Boulogne sur mer. Oni organizis tiun renkontiĝon en 1905 kaj tie ankaŭ d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de la esperanto internacia lingvo partoprenis. En tiu kongreso pruviĝis laŭ realaj spertoj, ke esperanto povas esti reala komunikilo, ĉar la 688 partoprenantoj el dudek landoj bonege komprenis unu la alian en la nova lingvo.



La Granda Palaco, la kongresejo en urbo Lille

La kreinto de la lingvo estis okulkuracisto loĝanta en Pollando, kiu spertis, ke la diversetnaj komunumoj senĉese malamikadis. Tiu parto de Pollando tiam apartenis al la cara Rusio. En Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof kvar komunumoj vivis unu apud la alia. Krom poloj ankaŭ judoj vivis tie, kiuj parolis jiddisan lingvon kune kun germanoj kaj rusoj. Zamenhof pensis en sia junaĝo, ke unu el la kaŭzoj de la malamikeco inter la diversaj komunumoj povis esti, ke la membroj de tiuj sociaj grupoj parolis diversajn lingvojn. Li supozis, ke se estus facile lernebla neŭtrala internacia lingvo, tiam ĝi eble povus faciligi la komunikadon inter la diversaj popoloj kaj eble povus helpi krei pri pacan mondon.

Ĉar en tiu jaro, en 1905 komenciĝis la rusa-japana milito, estis malcerte ĉu ankaŭ Zamenhof povus partopreni la unuan universalan kongreson. Bonŝance li ne devis iri en la rusan armeon kaj tial ankaŭ la kreinto de la lingvo povis ĉeesti la organizadon kaj sukcesis partopreni la unuan grandan tutmondan renkontiĝon. Ĉijare ni estas 110 jarojn post la grava evento kaj ni povas sperti, ke dum tiu pli ol jarcento la lingvo ne mortis. Eĉ forta internacia movado estis organizita ĉirkaŭ ĝi kaj la esperanto movado disvastiĝis en la tuta mondo. Universala Esperanto-Asocio kunordigas la agadon de la movado en sia rotterdama sidejo kaj tiu organizo estas en konsultaj rilatoj kun UN-ESCO, la kultura kaj scienca faka organizo de la Unuiĝintaj Nacioj.

Por la nunaj multnombraj partoprenantoj ne eblis trovi sufiĉe da tranoktejoj en Boulogne sur mer, tial la kongreso okazis en la proksima grandurbo Lille. Baksa József kaj Ferenczi Ildikó, gvidantoj de la Szegeda Esperanto Rondo organizis buskaravanon el Hungario al la kongresejo. Poste okazis ankaŭ unusemajna rondvojaĝo en Francio, kiun partoprenis dudek-membra orientazia grupo kun gvido de du vicprezidantoj de Korea Esperanto Asocio. Membroj de Hungaria Esperanto Asocio aliĝis al la internacia kavarano kun gvido de Lindwurm Edit ĝenerala vicprezidantino. D-ro Nanovszky György profesoro, honora prezidanto de Hungaria Esperanto Asocio kaj honora membro de Universala Esperanto Asocio aviadile veturis al la kongreso.

En tiu kongreso estis anoncita solene, ke la 2017-jara Universala-Kongreso post du jaroj okazos en Seulo, Koreio, la lando de hibiskoj. Nia hungaria asocio havas tradicie bonajn rilatojn kun la korea asocio, tial ni proponis strategian kunlaboron al la sukcesa organizo de la kongreso. Kadre de tio ni akceptis la proponon de Lee Jungkee, prezidanto de Seula Esperanto-Kulturcentro por verki libron pri Koreio kaj pri la korea esperanto movado. Krome ni entreprenis organizi plurajn lingvokursojn en Seulo por studentoj kaj por volontuloj kiuj deĵoros dum la seula UK. Ni ankaŭ subtenis la alvenon de koreaj partoprenantoj al niaj hungariaj aranĝoj kaj ni proponos al ili komenci en Hungario iliajn rondvojaĝojn tra Eŭropo.

Dum la franca kongreso la estraro de Korea Esperanto Asocio akceptis la gvidantojn de la monda esperantistaro en aparta salono de eleganta hotelo en Lille. La estraro informis la invititojn pri la preparoj de la seula UK. Nagy János, vicprezidanto de nia hungaria asocio informis la ĉestantojn pri nia kontribuo al la organizado de la kongreso. Krome, li transdonis al la koreoj la lernolibrojn, kiujn ni eldonis en korea lingvo, kaj kiujn ni jam sukcese uzis pasintjare en la Indra-mang Universitato kie ni enkondukis la esperanto-instruadon.



Postkongresa ekskurso al la esperanto kastelo de Gresillon

Mi kaj Edit veturis la saman tagon al Boulogne sur mer, kie la urbestro, pasinta parlamenta deputito kaj registarano akceptis nin. Li rakontis al ni ĝoje, ke la urbo ankaŭ nun aktive flegas la memoron de la evento kiu okazis antaŭ cent dek jaroj. Antaŭ la stacidomo kien Zamenhof alvenis siatempe, nun estas Zamenhof-skulptaĵo, kiu memorigas pri la kreinto de la esperanto-lingvo.

Matene ni partoprenis en festo, kie la urbestro kaj d-ro Mark Fettes profesoro, prezidanto de UEA florkronis la skulptaĵon, nuntempe jam faman en la tuta mondo. Poste ni iris al la urba teatro, kie siatempe okazis la unua kongreso kaj kun ĝojo ni vidis, ke esperanta flago flirtis super la enirejo. Tie profesoro Fettes legis la ĉefajn pensojn de la festparolo de la unua kongreso. Tiun eventon partoprenis ankaŭ la nepo de Zamenhof. Li estis tiam pli ol 80 jara, do eble tio estis la lasta fojo kiam li povis renkonti persone la reprezentantojn de la tutmonda movado iniciatita de sia avo.

Kadre de la hungara-korea kunlaboro post la jubilea franca UK mi venis jam la duan fojon en oktobro, 2016 al Seulo. Ĉifoje mi vojaĝis kune kun Zengő Enikő, estrarano de nia hungaria asocio por partopreni la korean nacian esperanto-kongreson kaj la dekunuan internacian meditan renkontiĝon. Kelkajn tagojn post la kongreso ŝi veturis plu al Malajzio, sed mi restis kelkajn semajnojn en Seulo por gvidi tri lingvokursojn kaj por ekskursi denove al la Ĝiri montaro.

Inter tiuj montoj troviĝas mil ducent jara malnova budhisma monaĥejo, kie pasintjare nova universitato estis fondita. Tie oni petis min organizi la fremdlingvan lingvoinstruadon. Pri tiu laboro, do pri la naskiĝo de la Indramang Universitato kaj pri la korea vilaĝa vivo temas la dua parto de ĉi tiu libro, kies titolo estas: „*En la brakumoj de Budho*”. Sed en ĉi tiu jaro mi vojaĝos en la montojn ne pro lingvoinstruado, sed por fari prelegon pri la kultura, politika kaj ekonomia situacio de Eŭropo. Oni petis min prezenti al la studentoj kiel la homoj vivas en la Eŭropa Unio dekmil kilometrojn for de la Ĝiri montaro, tra cent montoj kaj mil riveroj.

LA MONO NE ESTAS MANĜEBLA

En ĉi tiu jaro mi alvenis el Eŭropo al Orienta Azio per la fina flugentrepreno tra Helsinki, la finlanda ĉefurbo. Kutime mi ŝatas flugi per la Qatar Airways, la kvinstela flugentrepreno, sed nun iliaj malmultekostaj vojaĝbiletoj rapide elĉerpiĝis. Mi vojaĝis al la budapesta flughaveno per aĉa loka aŭtobuso, kiu estis detruita per malbelaj skribaĵoj, eĉ la fenestroj estis detruitaj per kemikaĵoj. Grafitioj kaŭzas gravajn problemojn en Orienta Eŭropo post la falo de la komunismo.

La etoso en la aŭtobuso estis malbona. Unu el la vojaĝantoj aĉe parolis al la ŝoforo ĉar laŭ li la aŭtobuso malfruiĝis du minutojn. Aliaj homoj plendis pro la nefunkciantaj aŭtomatoj. Ĉar la aŭtomatoj ne funkciis, ili ne povis validigi la biletojn dum la tuta vojaĝo. Alveninte al la flughaveno mi vidis multajn ĵurnalojn, kiuj raportis sur la unua paĝo pri la amasa enmigrado, la plej grava socia krizo de la Eŭropa Unio post la dua mondmilito. La situacio tiam estis vere malfacile tolerebla, kiam centmiloj da nekonataj homoj sen iu ajn dokumentoj promenis el lando al alia lando dum la noktoj sen iu ajn kontrolo.. Kiam landlim-gardistoj aŭ policanoj volis kontroli ilin, tiam ili rifuzis la kontrolon kaj ĵetis ŝtonetojn al la policistoj.



Koreaj esperantistoj en la budapesta domo de la aŭtoro

Pro tio por mi estis granda ĝojo sperti en la korea flughaveno normalajn vivkondiĉojn. Tie elegante vestitaj landlim-gardistoj kontrolis la pasportojn kaj ĉiuj vojaĝantoj sen plendo permesis, ke oni registru la fingroprintojn kaj faru fotojn pri la vizaĝoj. Ankaŭ la aŭtomatoj bone funkciis en la metrostacio. Kiam mi metis mian vojaĝkarton sur la aŭtomaton, tiam ĝi tuj validigis mian bileton kaj aperigis sur la ekrano la restintan monon kiun mi ankoraŭ havis en mia konto.

La sistemo perfekte funkciis, kvankam ĝi estis nekompareble pli komplika ol la primitiva budapesta trafik-kontola maŝino, kiu devus simple trui la paperbiletojn se ĝi povus funkcii sen eraroj. Kvankam pli ol dudek milionoj da vojaĝantoj uzis la korean ĉefurban trafiksystemon, tamen la bone evoluita elektronika sistemo sen eraroj kapablis kontroli la tutan komplikan trafikan procezon.

Estas granda problemo en Budapesto, ke multaj homoj sen biletoj kaj vojaĝkartoj uzas la veturilojn kaj ili rifuzas doni identifikilojn al la kontroloficistoj, do oni ne povas puni ilin. Pro tio la trafika entrepreno suferas pro malprofito dum multaj jaroj kaj la stato de la veturiloj estas mizera.



Koreaj studentoj apud la Danubo antaŭ la Hungara Parlamentejo

Estas granda kontrasto inter Hungario kaj Koreio ke en Seulo la trafik-kontrola sistemo ne malfermas la pordon por ebligi la vojaĝanton eniri en la stacidomon, se la bileto de la vojaĝanto ne estas valida. La eliro el la stacidomo okazas simile. La vojaĝantoj devas meti ilian bileton sur la kontrolmaŝinon. Poste la maŝino kontrolas, kie la vojaĝo komenciĝis kaj kiom longa ĝi estis. Laŭ tio la elektronika sistemo kalkulas la vojaĝprezon kaj se la vojaĝkarto ne enhavas la kalkulitan sumon, tiam la sistemo ne malfermas la elirpordon.

La korea trafik-kontrola sistemo estas ege komplika kaj alte evoluita. Ĝi uzeblas en ĉiuj veturiloj, do kaj en la aŭtobusoj kaj en la metrooj kaj en la trajnoj kaj dekoj da milionoj da kunvojaĝantoj povas uzi ĝin en la sama tempo. Laŭ mondbankaj statistikoj la porpersona nacia enspezo en Koreio estas 50% pli alta ol en Hungario sed laŭ miaj personaj spertoj mi konkludis, ke Hungario kaj eble ankaŭ granda parto de Orienta Eŭropo eĉ dum generacio ne povos atingi la nuntempan altan teknikan nivelon de Koreio.



Koreaj esperanto-instruistinoj ripozas en budapesta parko

Dum mia dekmilkilometra vojaĝo mi spertis la seriozajn sociajn problemojn de Eŭropo kaj vidis la altegajn prezojn en la flughaveno de Helsinki. Pro tio mi ĝojis sperti la bonan etoson en la restoracioj de la korea flughaveno en Incheon, kie la prezoj estis malaltaj kaj akcepteblaj. Ankaŭ la homoj estis helpemaj kaj amikecaj en la flughaveno, oni ofertis al mi senpagajn mapojn en la informoficejoj. Ankaŭ la senpaga interreto bone funkciis.

En la 2015-a jaro centoj da liberalaj eŭropaj kaj amerikaj ĵurnaloj publikigis artikolojn pri la morala devo de la evoluitaj landoj, ke ili devas akcepti amason de enmigrantojn. Alveninte en Incheon mi vidis, ke ankaŭ en Koreio eblis peti enirpermeson por la rifuĝintoj. Oni informis pri tio sur grandaj afiŝoj en la flughaveno. Sed tiu procezo okazis laŭ leĝo. La rifuĝintoj devis doni iliajn dokumentojn al la landlingardistoj, devis doni fingroprintojn kaj devis permesi ke oni fotu ilian vizaĝon. Samtempe doganoficistoj kontrolis la kofrojn kaj kuracistoj kontrolis ĉu ili suferis pro danĝeraj malsanoj.

Mi spertis, ke en Koreio la ĉiutaga eŭropa fenomeno, ke centmiloj da enmigrantoj sen kontrolo trapasas landlimojn atakante policistojn kaj militistojn tute ne estus imagebla. Pro tio mi sentis, ke vojaĝante el Eŭropo al Koreio mi elvojaĝis el la tria mondo kaj post unutaga vojaĝo mi alvenis al la civilizita, alte evoluita unua mondo

Kutime la flughavena kontrolo en Incheon ne daŭras tro longe, sed nun estiĝis longa vico antaŭ la pasportkontrolo. Aranĝite la aferon mi legis miajn elektronikajn leterojn en la flughaveno kaj poste mi vojaĝis al la centro de Seulo por ricevi mian ĉambron en mia kutima modesta hotelo en Sadang. Alveninte al la hotelo mi vidis, ke du koreaj geamikoj provis kontakti kaj saluti min. Unu el ili estis profesoro Lee Jungkee, kiu petis, ke en la venonta tago mi instruu en la seula kampuso de la fama Kyunghee Universitato por doni motivojn al la studentoj por ke ili pli diligente studu fremdajn lingvojn en la Humanistika Fakultato.

La alia amiko, kiu salutis min estis Oh Soonmo, vicprezidantino de la Korea Esperanto Asocio. Ŝi proponis, ke ni kune vespermanĝu. Ŝi bone sciis, ke post longa vojaĝo eble mi estis iom laca kaj pro tio ŝi

diris, ke ni manĝu en sadanga restoracio proksime al mia hotelo. Estas multaj malmultekostaj bonaj restoracioj en tiu parto de la korea ĉefurbo, do tiel mi jam dum la unua tago de mia restado en Koreio povis denove gustumi la fame konatan jukkeĵang supon. Tiu supo estas iom akra, tre bongusta, kiu similas al la gulaŝsupo, fama manĝaĵo ne nur en Hungario, sed ankaŭ en la tuta Eŭropo. Ĉar manĝo en Koreio preskaŭ ĉiam enhavas kimĉion, ankaŭ ĝin mi povis gustumi jam dum la unua vespero.

Sepdek studentoj ĉeestis mian prelegon en la universitato. Ili ĉiuj havis eblecon demandi min, do mi ricevis sepdek demandojn rilate al la eŭropa kulturo, ekonomio kaj socio. Krome, profesoro Lee Jung-kee petis, ke pere de mia persona vivo kaj faka kariero mi klarigu kiel kono de fremdaj lingvoj ebligas konstrui sukcesan profesion karieron en nia moderna tutmondigita vivo. Post la prelego ni kune vespermanĝis kaj tiel mi denove havis ŝancon gustumi bongustan korean supon kun kimĉio kaj rizo.



La aŭtoro antaŭ la pordego de la suwona kampuso de la Kyunghee Universitato

Dum la venontaj du tagoj mi partoprenis la korean nacian Esperanto-kongreson en la kampuso de la Hankuk Fremdlingva Universitato. Oni organizos la 102-an Universalan Kongreson en la sama loko en la 2017-a jaro. Tiu universitato estas altprestiga eduka institucio en Koreio kie oni instruas altnivele ne nur fremdajn lingvojn sed ankaŭ diversajn aliajn studobjektojn kiuj rilatas al la internaciaj kaj diplomaciaj rilatoj. La profesoroj de la universitato estas tre famaj kiuj havas multjarajn personajn spertojn laborante sur la faktereno de la internaciaj rilatoj. Ekzemple ekde 2015 la iama usona ambasadorino al Koreio instruos la diplomatian historion kiel profesoro kaj ŝi prelegos eble ankaŭ pri siaj personaj spertoj en siaj kursoj.

Mi informiĝis en la universitato, ke en ĉi tiu jaro oni enkondukis novan plenumopritaksan metodon kaj tio malfaciligis la vivon de multaj studentoj. Ĝis nun la profesoroj pritaksis la plenumojn kaj la nivelojn de la studentoj laŭ absolutaj kriterioj, sed laŭ la instruoj de la Eduka Ministerio on devis enkonduki novan relativan plenumopritaksan metodon en 2015. La esenco de tiu nova metodo estas, ke la profesoroj pritaksas la plenumojn de la studentoj laŭ la niveloj de la aliaj studentoj de la klaso.

Dum la lastaj jaroj la profesoroj rajtis difini la kriteriojn laŭ kiuj la studentoj povis ricevi “A”, “B”, “C”, ktp. klasifikojn simile kiel la studentoj ricevas “1”, “2”, “3”, ktp. klasifikojn en Hungario laŭ la rezultoj de iliaj ekzamenoj. Sed laŭ la relativa plenumo pritaksa metodo estas regulo, ke 30% de la studentoj povas ricevi “A0” kaj “A+” klasifikojn kaj 65% de la studentoj povas ricevi “A0”, “A+”, “B0” kaj “B+” klasifikojn. Sekve de tio 35% de la studentoj povas ricevi nur pli malbonajn klasifikojn.

Nek la studentoj nek la profesoroj ŝatis tiun metodon, ĉar ofte okazis ke en tiu nova eduka sistemo studentoj elektis studobjektojn laŭ personaj subjektivaj motivoj. Do, il ne elektis studobjektojn kiujn oni instruis tre altnivele, aŭ studobjektojn kiuj estus la plej utilaj por ili. Anstataŭ ili elektis kursojn kie la nivelo de la aliaj studentoj estis relative malalta, do kie ili pensis ke estos ŝanco ricevi bonajn klasifikojn. Kvankam oni antaŭvidis la negativajn efikojn de tiu ŝanĝo, la koreaj universitatoj tamen akceptis la proponon de la ministerio por

enkonduki la novan metodon, ĉar 18% de la enspezo de ilia buĝeto venas de la Eduka Ministerio.

La organizantoj de la kongreso petis min, ke je la komenco de la evento mi instruu la komencantan grupon per la rekta metodo, same kiel mi faris antaŭ jaro en la Indramang Universitato. Ankaŭ tiam mi instruis komencantojn kaj por helpi ilin kompreni la signifojn de la nekonataj vortoj mi klarigis la situacion en korea lingvo je la komenco. La eduka eksperimento estis sukcesa kaj en la kongreso kaj en la Indramang Universitato, ĉar je la fino de la leciono ĉiuj studentoj kapablis sin prezenti per dek aŭ dek unu frazoj en esperanto sen gravaj eraroj. Oni kutime ne povas atingi similan rezulton en la edukado de aliaj lingvoj, ekzemple multaj japanaj, ĉinaj kaj koreaj studentoj tute ne povas komunikiĝi kun alilandanoj en angla lingvo eĉ post multjara lernado.

Oni legis la oficialajn salutmesaĝojn de diversaj eminentuloj al la korea kongreso en la granda halo de la postbakalaŭra lernejo de la universitato kaj poste Dr. Lee Young-Koo, profesoro de ĉina literaturo kaj prezidanto de la Korea Esperanto Asocio solene transdonis al mi honorigilon. Ĝi estas 25 centimetra artnivela metala memortabulo kun hibiskoj, la simbolaj koreaj floroj. Ene oni skribis en du lingvoj, ke KEA honorigis min pro mia eduka agado en Koreio.

Oni organizis diversajn sciencajn prelegojn en la kongresa universitato dum la kongreso kaj krome abundis interesaj kulturaj programoj. En la fakaj programoj estis speciale interesaj la ŭonbulisma fakkunsido kaj la kristana ekumena diservo kiu okazis dimanĉe. La multkolora amuza renkontiĝo finiĝis per unika prezentado de amatora magiisto. La prezentado estis tiel amuza kaj altnivela, ke ne nur la koreoj kaj eŭropanoj, sed ankaŭ la ĉinaj partoprenantoj miris kaj aplaŭde aprezis la magiiston kvankam estas konate, ke la ĉina magia arto estas eble la plej altnivela en la tuta terglobo.

Dum la kongreso mi kun ĝojo konstatis, ke Kristalo, mia malnova amikino plenumis la taskon de ĝenerala sekretario de KEA kiu kreis amikecan atmosferon dum la tuta evento. Ankaŭ Ho Song efike kontribuis al la sukceso de la kongreso, kiu jam vizitis min en Eŭropo

antaŭ jaroj. Poste li instruis korean lingvon kaj pentroarton en ĉina universitato kaj mi estis feliĉa denove renkonti lin kaj transdoni al li la sincerajn salutvortojn de la estraro de nia Hungaria Esperanto Asocio.



Post la fino de la kongreso mi prelegis en angla lingvo en la Moonil Yeoja Godeung Hagkyo supermezlernejo pri la eŭropa kulturo kaj ekonomio kaj pri la hungara literaturo de la unua jardeko de la dudeka jarcento. La granda klasĉambro de la supermezlernejo estis plena kun la elegante vestitaj studentinoj kiuj jam naskiĝis kaj kreskis en riĉa kaj alte evoluita industria lando. Mi pensis, ke por ili estos malfacile komprenebla la malriĉeco kaj la manko de manĝaĵo kio estis ĉiutaaga vivsperto por milionoj da homoj en Orienta Eŭropo antaŭ la unua mondmilito. Pri tiu malriĉeco temas la rakonto de Móra Ferenc, fama hungara verkisto en tiu epoko, kies titolo estas “*La birdvidita pano*”.

Kvankam mi tre ofte spertis en Orienta Azio ke studentoj ne bone komprenas angle, la studentoj de la Moonil Yeoja Godeung Hagkyo supermezlernejo estis esceptoj. Ili atenteme aŭskultis mian prelegon kaj ŝajnis al mi, ke je la fino de la prelego ili komprenis la mesaĝon de la eŭropa verkisto. Ili komprenis, ke kvankam estas lokoj en la mondo kie la vivkondiĉoj estas nekredeble bonaj, tamen okazis antaŭ cent jaroj en Eŭropo kaj eĉ nun okazas en multaj landoj de la tria mondo, ke milionoj da homoj suferas pro malriĉeco kaj pro la manko de manĝaĵo kaj trinkebla akvo.



Prelego en la Moonil Yeoja Godeung Hagkyo supermezlernejo

Pri tiu temo mi planis prelegi ankaŭ en la suwona kampuso de la Kyunghee Universitato kaj ni diskutis la saman temon en la dekunua internacia meditada renkontiĝo dum la postkongresaj tagoj. Je la fino de la diskuto ni ĉiuj samopiniis, ke estas serioza socia problemo en nia dekunua jarcento, ke en la riĉaj landoj la loĝantaro malŝpareme uzas energion, forĵetas manĝeblan manĝaĵon kaj uzeblajn industriajn produktaĵojn kaj farante tion ili malpurigas kaj malbonigas la naturon. Samtempe centoj da milionoj da homoj tute ne havas ŝancon sane vivi en Afriko kaj Suda Azio.



Kiel strategia manaĝero de la Hungara Petrola Korporacio, la plej granda industria organizo en Hungario kaj kiel komitatano de Universala Esperanto-Asocio mi havis unikan eblecon viziti multegajn landojn en ĉiuj kontinentoj. Tiel mi povis vidi kia nekredebla estas la diferenco inter la enspezoj kaj la vivniveloj en la landoj de la unua kaj la tria mondo.

Laŭ mondbankaj statistikoj la porpersona nacia enspezo en Suda Koreio estas pli-malpli tri mil dolaroj monate, sed en kelkaj afrikaj landoj tio estas nur okdek aŭ naŭdek dolaroj. Krom la regionaj militoj

pro tiu netolerebla vivnivela diferenco estiĝis nekredeble serioza popolmigrado en Eŭropo. Oni pensas, ke unu miliono da enmigrantoj povos aperi en 2015 en Germanio, kies ekonomio estas la plej forta en la Eŭropa Unio. Tiu enmigrado kaŭzas la plej signifecan socialan problemon al la Eŭropa Unio tuj post la tempo kiam oni povis trovi eblecon por Greklando eviti la financon krizon.

Ĉi tie en Koreio, dek mil kilometrojn de Eŭropo la aŭskultantoj de miaj prelegoj kun surprizo aŭdis, ke centmiloj da rifuĝintoj promenadas el landoj al landoj sur la Balkana insulo sen dokumentoj kaj sen kontroloj. Ĉi tie en Orienta Azio similaj fenomenoj estus tute neimageblaj. Ĉi tie ĉiuj homoj vidas ĉiutage, ke soldatoj kaj landlimgardistoj atenteme gardas la landlimojn kaj per altaj metalaj bariloj preventas, ke nekonataj homoj sen kontrolo eniru en la landojn.

Ĉiuj ĉeestantoj de niaj sociaj konferencoj en Koreio konsentis, ke estas la respondeco de la riĉaj landoj helpi la evoluon de la tria mondo kaj estus bezonata urĝe solvi la problemon de la malpurigo de la naturo, ĉar tio estas fundamenta kondiĉo de la daŭripova evoluo. Kiel la amerikaj indianoj diras koncize: *“Kiam vi pafos la lastan sovaĝbeston kaj kiam vi kaptos la lastan fiŝon kaj kiam vi tranĉos la lastan arbon, tiam vi komprenos, ke la mono ne estas manĝebla.”*



Dumina kaj la reĝfilineto apud la Danubo

Dua parto

부처님의 품안에서

EN LA BRAKUMO DE BUDHO

„청년의 꿈과 도전, 마을공동체와 사회변혁의 주체”

„La songo kaj defio por la junularo estas organizi la komunumon kaj plibonigi la socion en kiu ni vivas.”

Slogano de la Indramang Universitato

LA GRAVA AGO NULIĜIS

Por orient-azianoj estas tute nature viziti sanktejojn en siaj gravaj familiaj aŭ religiaj festoj. Por multaj azianoj estas agrable pasigi iom da tempo en budhista monaĥejo. Mi bone vidis tiun fenomenon kiam mi estis en Japanio antaŭ tridek jaroj. Tiam mi apenaŭ kredis al miaj okuloj vidante, ke en la dumiliona grandurbo Nagoja pli ol du milionoj da homoj vizitis sanktejon dum la unaj tagoj de la jaro. Pluraj dekmiloj invadis la sanktejon dum la unuaj minutoj de la nova jaro, tial specialaj gardistoj devis kunordigi la homamason.

En la Fora Oriento la estimo de prauloj estis grava parto de la kulturo dum jarmiloj. La tago de mortintoj estas grava okazo memori la forpasintajn familianojn. Tiam la parencoj kunvenas en budhismaj temploj kaj preĝas kortuŝe por la prauloj.

Ankaŭ en mia lernejo, en la Nanzan Universitato oni forte proponis, ke eksterlandaj studentoj pasigu kelkajn tagojn en monaĥejo por profundigi la konojn pri la japana kulturo kaj orienta pensmaniero. Oni portis nin tiam en Eiheiji, unu el la plej konataj sanktejoj, kie ankaŭ pluraj eminentuloj de la japana socia elito pasigis tempon. Pluraj tokiaj ministroj skribis fiere en sian aŭtobiografion, ke ili pasigis tempon krom la riĉaj kaj famaj usonaj kaj japanaj universitataj kampusoj ankaŭ en la trankvila arbara Eiheiji monaĥejo for de la urba bruoj.

En Koreio la situacio estas simila. Ankaŭ tie estas kutimo kaj modo ke junuloj kaj maljunuloj pasigas kelkajn tagojn en budhisma templo, kiun oni reklamas por eksterlandanoj sub la nomo „*Temple stay*”. Tio signifas, ke la vizitantoj ne nur kelkajn horojn vizitas la templon, sed ankaŭ loĝas en la monaĥejo dum unu aŭ du tagoj.

Antaŭ kelkaj jaroj la internacia Esperanto-mondo informiĝis surprize, ke estrarano de UEA, d-ro So Gilsu, profesoro de fama seula universitato, kiu estis honorigita preleganto en multaj usonaj, eŭropaj kaj aziaj universitatoj, post emeritiĝo ne iris prelegi al Usono, sed pasigis tri jarojn en budhisma monaĥejo, for de grandurbaj briloj. Tie li ĉesigis ĉiujn kontaktojn kun la ekstera mondo, li ofertis sian tempon al la studado de plurmil jaraj hindaj skribaĵoj. Lia celo estis kompreni

pli bone la sencon de la cirkulado de mondaj procesoj kaj la funkcia-
don de la universo kaj baze de tio ankaŭ sian vivocelon. Nuntempe
pluraj riĉaj usonaj kaj okcident-eŭropaj junuloj vojaĝas al Hindio por
studi de guruoj en arbaroj, por ekkoni tiun specialan vivkoncepton,
kiu karakterizas la azian kulturon.

Antaŭ monatoj mi ricevis peton organizi la instruadon de esperanto
en la nove fondita Indramang Universitato kies korea nomo estas 인
드라망대학. La unumil ducentjara fama budhisma monaĥejo, la Sil-
sangsa, (koree: 실상사) fondis la universitaton. La monaĥejo tro-
viĝas en la suda parto de la korea duoninsulo en pitoreska valo de du-
mil metraj Ĝiri montaro. La nomon de la montaro oni skribas koree
지리산, angle Jirisan kaj prononcas Ĝirisan aŭ eble Ĉirisan. La pro-
nonco de koreaj literoj estas malsamaj al la eŭropaj sonoj, tial la
transliterigo de koreaj vortoj al la latina alfabeto estas tute kaosa.



Belegaj azaleo-floroj en la ĝardeno de la Silsangsa (Silsang-templo)

Multaj koreoj ne kapablas skribi latinlitere eĉ sian nomon, kaj ankaŭ la nomoj de urboj kaj vilaĝoj estas skribitaj en diversaj formoj en diversaj oficialaj dokumentoj. La plej granda suda urbo de Koreio estas Busan kaj la nomo de la urbo estas foje skribita Pusan. Antaŭ kelkaj jaroj la urba estraro decidis, ke la oficiala nomo de la urbo estu Busan, sed malgraŭ tio pluraj institucioj daŭre uzas la Pusan nomon. Inter ili estas ekzemple la Pusan Universitato kies estraro decidis tiel, ĉar la universitato jam estas konata kiel Pusan Universitato en la scienca mondo.

La fondintoj de la Indramang Universitato opiniis, ke krom la budhisma filozofia kaj socia teorio ankaŭ medioprotektado, bioekonomio, evoluigo de sociaj rilatoj kaj sekurigo de mondopaco estu en la centro de la instruado. Ili pensis, ke al tiu tematiko tre bone harmonius la instruado de esperanto, la neŭtrala lingvo de paco kaj internacia komunikado, kiun oni jam instruas en pluraj alternativaj supermezlernejoj kaj universitatoj en tiu ĉi lando. Je la komenco oni petis min organizi tiun lingvoinstruadon, sed poste evidentiĝis, ke mia tasko estos multe pli interesa kaj varia kaj pro tio mi devos multe vojaĝi dum la venontaj monatoj.



Malnova templo kun du ŝtonpagodoj en la Silsangsa

Post kiam oni eksciis, ke mi akceptis la peton kaj tiel mi pasigos kelkajn monatojn en Koreio, tiam ankaŭ aliaj edukaj kaj kulturaj institucioj petis min fari diversajn prelegojn. Tio signifas, ke mi instruos esperanton ankaŭ en la Wonkwang Universitato en Iksan kaj en la seula kaj suwona kampuso de la Kyunghee Universitato kiel vizitanta profesoro. Krom tio unufoje semajne mi iros el la Ĝiri montaro al la ĉefurbo, kie mi faros lingvokurson en la ĉefoficejo de Korea Esperanto-Asocio kaj prelegserion pri la sociaj problemoj de Hungario post la falo de komunismo en Orienta Eŭropo kaj pri la elvolubloj de la eŭropa ekonomio. Krome mi instruos ankaŭ en elementaj lernejoj.



En la unua duono de aprilo mi prezentos miajn librojn en la centro de la asocio. En majo en la Tago de Pioniroj mi raportos pri miaj instruaj spertoj en la Indramang Universitato en la Ĝiri montaro. En la dua duono de aprilo mi faros lingvokurson en la Namkang Esperanto-Lernejo en urbo Chengdo. Krome mi gvidos ankaŭ anglan konversacian kurson en la Silsangsa Jakeun Hagkyo supermezlernejo kies korea nomo estas 실상사작은학교. Tie la estraro de la lernejo pensis, ke mia kurso estus utile por la studentoj ĉar koreaj studentoj malofte havas eblecon ekzerci eŭropajn lingvojn kun eŭropanoj. Krom tio mi

veturos kvarfoje ankaŭ al Busan, al la 중앙 여고 (Jungang Yeogo) supermezlernejo, por helpi la instruadon de fremdaj lingvoj.

Dum mia restado en Koreio mi loĝos en la universitata kampuso sur montopinto de la Ĝiri montaro. La kampuso troviĝas proksime al la Silsang-templo kaj oni povas iri tien de la Silsangsa per dudek minuta promeno supren sur arbara vojeto. En tiu montara ĉirkaŭaĵo ne estas fortaj stratlampoj, kiel en grandurboj. Pro tio kiam mi estas en nia monaĥeja universitata kampuso, tiam mi bone povas vidi tra mia fenestro la stelojn sur la ĉielo kaj la panoramon de la vilaĝo. La ĉiela konstelacio Granda Ursino ne estas samloke en la ĉielo kiel en Hungario, ĉar unu el iliaj steloj estas ĝuste super nia kapo en la centro de la ĉielo.

La universitata kampuso ne estas ĉirkaŭbarita, ĝiaj naturaj limoj estas du arbaraj riveretoj okcidente kaj oriente kaj malantaŭ ili estas plurcentjara arbaro. Meze de la monaĥejo nun en aprilo jam floras la orhidecaj violkoloraj ornamarboj. La azaleoj kaj magnolioj estas speciale belegaj. Ankaŭ la belaj floroj de fruktarboj allogas la abelojn el la proksimaj arbaroj. Kvankam la printempa panoramo de la montoj estas vere tre bela, mi pensas, ke pro miaj multaj programoj mi ne havos multe da tempo en la venontaj monatoj ĝui la glugladon de riveretoj kaj kantadon de birdoj kaj la panoramon de la Ĝiri montaro.

Mi ekveturis el Hungario kelkajn tagojn antaŭ la landaj parlamentaj elektoj, tial dum la lastaj tagoj antaŭ mia forveturo mi ricevis multegajn aŭtomatajn telefonvokojn kun la voĉo de famaj politikistoj. Inter ili estis la nuna kaj ankaŭ la antaŭa ĉefministroj kaj ili petis min nepre voĉdoni kaj ili deklaris, ke mia ĉeesto estas speciale grava por ili. Pli frue mi tute ne imagis, ke mi estas tiom grava homo, sed nun ĉiutage plurfoje oni atentigis min, ke mia voĉo estas grava por ŝanĝi, respektive ne ŝanĝi la nunan registaron. Do, por mi evidentiĝis, ke estas tute neeviteble, ke mi partoprenu la elektojn.

Rekonante la gravecon de la afero mi nuligis mian registriĝon en la nomlisto de elektantoj en Budapeŝto kaj mi anoncis, ke mi voĉdonos en la seula hungara ambasadejo, ĉar dum la tago de elekto mi jam estos tie. Mi pensis, ke mi alvenos al Seulo la antaŭan tagon de la

elekto, do mi supozis, ke mi havos sufiĉe da tempo por dormi kaj antaŭ mia pluveturo en la sekva tago mi ankaŭ havos tempon iri al la ambasadejo por voĉdoni. Por havi sufiĉe da tempo aranĝi tiun aferon mi aĉetis busbileton pluveturi el Seulo suden al la Jirisan nur je la 13:20 horo posttagmeze.

Tamen mi ne kalkulis du aferojn. Unue, inter Hungario kaj Koreio estas okhora (somere sephora) tempodiferenco, do kiam en Eŭropo estas mateno, tiam en Koreio estas jam posttagmezo. La alia afero estas, ke en Koreio la stratoj ne havas nomojn kaj la domoj ne havas numerojn kaj pro tio oni tre malfacile povas trovi nekonatan lokon.

Pro la grandaj tempozonaj diferencoj mia korpo ne ŝanĝiĝis dum unu nokto al la korea tempozone kaj tial mi vekigis ne je la sesa matene kiel kutime, sed kelkajn minutojn antaŭ la deknua horo. Mi pensis tamen, ke la du kaj duon horoj sufiĉos pro atingi la ambasadejon, sed en la dekmiliona Seulo tio ne estis tiel. Mi iris unue de mia apuda myeongdonga metrohaltejo al Ichon kaj de tie per alia metroo al Hannam ĉe la riverbordo de Han. Laŭ mia mapo la hungara ambasadejo devus esti proksime al tiu stacio.



Rivereto en la Ĝiri montaro apud la Silsang templo

Elirinte el la metrostacio mi vidis, ke malkiel en la mapo, estis pli da stratoj krucantaj unu la aliajn en tiu loko kaj ankaŭ tiuj stratoj ne havis nomojn. Kelkaj preterpasantoj provis helpi min per siaj poŝtelefonoj serĉante la adreson de la ambasadejo, sed kiam mi vidis, ke ankaŭ la lokuloj nur demandadas unu la alian, mi rezignis. Por mi estis pli grave atingi mian Hamyang-Jirisan aŭtobuson je la 13:20 ĝustatempe, ol pasigi multe da tempo por trovi la ambasadejon. Ĉar en la universitato oni demandis min kelkfoje kiam mi alvenos, mi supozis, ke verŝajne iu atendos min en la bushaltejo antaŭ la Silsangsa.

Tial mi reiris al la proksima metroostacio kaj post pliaj du ŝanĝoj mi veturis al Gangbyeon. Tie troveblas la Dong Seul Intercity Bus Terminal, do la Orient-Seula Interurba Busstacio kie la aŭtobusoj ekveturas al la suda parto de la lando. Dum tiu tago mi ankoraŭ ne matenmanĝis kaj pro tio mi aĉetis en la busstacio varmegan, akre spicitan „ramyeon” nudelosupon kun kimĉio kaj kun flave pekligita daikonrafano. La supo estis tiom varmega, ke oni puvus uzi ĝin ankaŭ kiel malsano-inhalaĵo kontraŭ gripo. Mi tagmanĝis bonguste kaj poste enbusiĝis en la komfortan, klimatizitan aŭtobuson, kie estis nur ses aŭ sep kunvojaĝantoj. Tiam estis jam la 13:17 kaj post tri minutoj nia aŭtobuso ekveturis precize laŭ la horaro de la lumabunda korea ĉefurbo al la trankvila kaj paceca Ĝiri montaro. Tiel, malgraŭ miaj ĉiuj klopodoj mi ne povis partopreni la plej gravan agon de la demokratiaj politikaj sistemoj, do mi ne ĉeestis la hungariajn parlamentajn elektojn.



La Hamyang Jirisan Express aŭtobuso

LA VOJAĜO AL ITHAKA

En la antikva greka tempo Ithaka, la reĝlando de Oduseo (latine: Ulysses) estis la insulo de feliĉo. Vojaĝo al Ithaka simbole signifis la serĉon de feliĉo. Laŭ malnova rakonto la gepatroj instigis siajn gefilojn al tiu vojaĝo, en vasta senco, vagi tra la vivo jene:

„Vekiĝu kaj eku al Ithaka! Ne hastu, sed rigardu kaj vidu! Ne esperu, ke Ithaka akceptos vin riĉe! Ithaka estas nenio alia, ol la vojaĝo mem al Ithaka. Nur tio gravas kio vi fariĝos dum via vojaĝo.”

La senco de tiuj konsiloj estas, ke oni devas ekiri al la ekstera mondo por akiri sperton pri la vivo. Sed ne indas kuri tra la tuta vojo, oni devas foje-foje halti kaj miri pri la beleco de le mondo. Neniam oni devas kredi, ke li aŭ ŝi estos atendata ĉie afable kaj bonvenige, sed oni mem devas labori por la sukceso. Dum la paso de la vivo oni mem devas evolui. Gravas, ke oni ŝanĝiĝu pozitive dum sia vivo kaj tiel oni farigu sian vivon valora kaj kompleta. Mi pensadis pri tiuj instruoj je mia alveno al la Silsangsa monaĥejo post mia dekmil kilometra veturado.

En la pasintaj jaroj mi flugis kutime per la Qatar Airways, la kvinste-la flugentrepreno, sed antaŭ kelkaj monatoj mi provis vojaĝi ankaŭ per la Korean Air. La kialo estis, ke per tiu entrepreno mi sen ŝanĝo, rekte povis flugi la dekmil kilometran distancon inter Eŭropo kaj Orient-Azio. Sed ĉifoje la turka flugkompanio estis la plej favorpreza, tial mi flugis tra Istambulo al Seulo. En la Ferihegy flughaveno en Budapeŝto mi havis ankoraŭ duonhoran libertempon, tial mi pasigis tempon en la atendejo por „premium” bankkarto-posedantoj kie mi bonguste matenmanĝis, ĉar antaŭ la ekiro mi ne havis tempon fari tion. Mi manĝis du reĝosalikokojn kun rukolo kaj frukta suko.

En la turka aviadilo oni servis orientajn manĝaĵojn kaj eblis ricevi ankaŭ alkoholaĵojn. Mia apudulo ricevis tiom multe da viskio, ke li ne povis drinki eĉ la duonon. Sed laŭ miaj spertoj multaj aliaj servoj estis malpli bonaj ol similaj servoj en aliaj aviadiloj. Mi trovis ŝtopingon por 230V tensio sub la sidloko, sed ĝi ne funkciis. Ankaŭ la

ekranojn ne eblis uzi antaŭ mia seĝo. Dum longdistanca vojaĝo tio estus bezonata kaj utila, ĉar per tiuj ekranoj la vojaĝantoj povus rigardi filmojn aŭ oni povus informiĝi pri la flugo-detaloj. Laŭ la informtabuloj de la istambula flughaveno estis senpaga interreta aliro en la aviadilo, sed ankaŭ tio ne funkciis, nek en la aviadilo, nek en la flughaveno.

Aldone al ĉio ankaŭ mia valizo estis rompita dumvoje, unu el la piedoj de la nova valizo estis difektita. En la korea flughaveno la deĵoranta oficisto ĝentile faris la protokolon kaj forprenis la sendokvitancon de la valizo. Kelkajn tagojn poste mi ricevis retmesaĝon de la Turkish Airlines, ke ili povas okupiĝi pri la afero nur, se mi sendos al ili denove la kvitancon kiun mi jam ne plu havis, ĉar ĝi estis forprenita en la incheona flughaveno.

Post tiaj etaj malagrablaĵoj mi eliris tra a pordo de la incheona flughaveno. Laŭ miaj antaŭaj spertoj mi rutine veturis per la flughavena rapidtrajno al la centro de la korea ĉefurbo. Simile kiel pli fue, ankaŭ nun mi rezervis malmultekostan hotelĉambron en kvartalo Myeongdong, unu minuton apud la Seula Esperanto-Kulturcentro. Mi metis miajn librojn tien, kiujn mi intencos prezenti en la tutlanda kunveno post unu semajno.



Mi sciis, ke mi estos en Koreio ĉifoje pli longe, ol kutime. Pro tio antaŭ du semajnoj mi aĉetis korean lernolibron en la budapeŝta Universitato Eötvös Loránd por lerni almenaŭ la plej gravajn vortojn. La koreajn signojn mi jam povis legi, sed mi sciis nenion pri la signifo de la vortoj. Dum la pasintaj du semajnoj mi sufiĉe bone ellernis la unuajn tri lecionojn, la vortojn kaj frazojn mi komprenis 95-96 %-e. Sed mi tute ne sciis kiel oni prononcas tiujn vortojn.

Tial mi kunportis magnetofonon, kiun mi povis konekti al mia komputilo kaj mi petis Lee Jungkee, la prezidanton de la Kulturcentro, ke li petu legi unu el liaj studentoj antaŭ mikrofono laŭte la tekstojn de la unua parto de la lernolibro. La rezulto estis malgaja. La prononco de koreaj sonoj estas tiom malsimila al la eŭropaj sonoj, ke mi tute ne komprenis 95%-ojn de la legita teksto laŭ aŭskultado. Temis pri 95%-oj de la vortoj, kiujn leginte en la libro mi jam bone komprenis. Aŭskultante la magnetofonon mi aŭdis nur nekonatajn, nekompreneblajn kaj sensencajn orientecajn vortojn, kiel ekzemple: dong, ĉung, kim kaj sin.

Post mia vizito al la Kulturcentro mi iris dormi en la proksiman hotelon ĝustatempe por ripozi post la pli ol dekhora flugo, ĉar la venontan tagon mi volis partopreni la parlamentan elekton. Pro tio mi ne volis pluveturi per nokta buso tuj post mia alveno al Koreio al la sudaj montoj de la Jirisan. Kiel mi skribis antaŭe la venontan tagon je la 13:20 mi ekis per buso suden al la Silsangsa templo kaj monaĥejo. Pri la Silsang templo mi sciis nur ke ĝi estis unu el la plej malnovaj zen-ceremoniaj budhismaj monaĥejoj en Koreio. La orumita homgranda Budho-skulptaĵo estas „nur” 4-500-jara en la centra templo, sed la alia fera Budho-skulptaĵo en la angulo de la renovigita monaĥejo estas 1300 jaraĝa. Tio signifas, ke je la fondo de la hungara ŝtato antaŭ mil jaroj tiu skulptaĵo estis jam plurcent jaraĝa kaj tiam la monaĥoj en la Silsangsa instruis la lokanojn vivantajn en la proksimaj vilaĝoj jam dum plurcent jaroj.

Tiutempe la Ĝiri-montaro estis ĉefe neloĝata arbara loko kaj nur post la fondo de la templo ekloĝis kamparanoj en la apudaj valoj por ke ili ĝuu la kulturan elradion de la monaĥejo kaj estiĝu en la brakumo de Budho. Sub la gvido de la bonzoj la loĝantoj lernis pri la agrikulturo

kaj en la lernejoj de la templo la infanoj povis lerni legi kaj skribi. Gvide de la monaĥoj elformiĝis komunumoj helpantaj unu la alian, kie la pli junaj zorgas la malsanulojn kaj maljunulojn en la apudaj vilaĝoj. Tie oni fondis nun en ĉi tiu jaro la Indramang Universitaton apud la ekzistantaj lernejoj, kie oni petis min partopreni en la organizado de instruado de fremdaj lingvoj. Laŭ la doktrino kaj filozofio de la nove fondita lernejo ĝi estas universitato de la komunumaj retoj

Nia buso ekveturis en Seulo en sunbrila printempa vetero kaj dum nia tuta pli ol tricent kilometra veturo kiu bezonis pli ol tri horojn, ni povis ĝui la belan printempan sunbrilon. Kiam ni alvenis al la montaro, tiam policano haltigis la buson kaj kontrolis ĉu ĉiu ligis la sekurzonon. En urbo Hamyang granda parto de la pasaĝeroj forlasis la buson kaj en la venonta stacio Inwol ankaŭ la aliaj, do poste mi restis la sola pasaĝero en la buso. Ĝi haltis baldaŭ denove kaj tiam la ŝoforo laŭte kriis „Silsangsa”, atentiginte min, ke ankaŭ mi elbusiĝu.

Plurfoje oni demandis min el la universitato per kiu buso mi alvenos, tial mi espere supozis, ke iu atendos min en la bushaltejo. Sed mi vidis neniun en la bushaltejo kaj neniun en la proksimaj lokoj atendi. Bonŝance mi trovis proksime turisman inform-oficejon, kie mi vidis ŝildon kun litero „i”. Mi supozis, ke eblus ricevis tie informojn angle, ĉar „i” estas mallongigo de angla vorto „*information*”. En Koreio oni instruas la anglan lingvon en ĉiu lernejo dum multaj jaroj, malgraŭ tio mi spertis, ke koreoj apenaŭ parolas angle. Malgraŭ tio, ke duono de la mondo opinias, ke nuntempe la angla fariĝis la komuna internacia lingvo de la homaro.

Ankaŭ en tiu informoficejo ne parolis angle la deĵorantino. Sed ŝi estis helpema, do ŝi eliris el la oficejo kaj surstrate ŝi montris al mi per sia mano la vojon al la monaĥejo. Post ĉirkaŭ 80-100 metra promeno mi rimarkis tabulon, sur kio en korea lingvo estis skribite, ke la vojo al la monaĥejo troviĝis dekstre. Bonŝance mi jam bone povis legi tion en la hangul-skribosistemo, do mi trovis facile la ĉefan enirejon de la monaĥejo tra irinte ponton sur eta montara rivero.

En la informejo de la monaĥejo neniuj parolis angle, do mi diradis nur du koreajn vortojn „*Indramang Daehak*”, kiu signifas Indramang

Universitato. Aŭskultante tion la oficistino komencis telefonadi kaj ŝi parolis nur koree la tutan tempon. Mi jam pensis pri reiro al la bushaltejo kaj volis serĉi eblecojn por veturi al paroksima urbo por serĉi hotelĉambron por mi ĝis la situacio klariĝos. Reirinte eĉ bushaltejon mi ne trovis, do nek horaro, kaj nek ŝildo montris ke oficiala bushaltejo troviĝis ie en la ĉirkaŭaĵo.

Poste mi denove reiris al la monaĥejo serĉi miajn okulvitrojn kaj paperon por skribi per koreaj literoj kion mi serĉis kaj kien mi volis iri. Sed tuj post mia eliro el la oficejo mi aŭdis salutkrion el alia flanko de la placo. La salutkrianto estis unu el la gvidantoj de la universitato, kiu mansvingis al mi kaj salutis ĝoje. Li estis la homo kiu promesis al mi veni al la bushaltejo por akcepti min, sed li pensis, ke la buso alvenos duon horon poste. Tial li ne atendis min en la bushaltejo. Komprenante la situacion mi konkludis, ke simile kiel mi legis en la rakonto pri la ithaka vojaĝo, mi ne devus tro forte kredi, ke It-haka (ĉi kaze la Indramang Universitato) akceptos min riĉe.

Poste jam ĉio okazis glate. La universitata gvidanto portis miajn pakojn per sia aŭto al la universitata kampuso, kiu estis konstruita en bela libera placo sur pinto de monteto meze de granda arbaro. Ĝis nia alveno la studentoj jam finpreparis la freŝan vespermanĝon kaj manĝante la bongustaĵojn ni komencis nian komunan vivon en la novfondita universitato per sinprezenta babilado. Tiamaniere post iom da malfacilaĵoj ankaŭ mi alvenis en tiu bela sunbrila aprila tago en la brakumon de Budho.



Lanternoj en la Silsangsa korto dum la naskiĝtaga festo de Budho

UNU LECIONON ANTAŬ LA STUDENTOJ

Post la dua mondmilito la politika mapo de Centra kaj Orienta Eŭropo ŝanĝiĝis. Tiu ĉi flanko de Eŭropo apartenis al la sovetia zono laŭ la decido de la Jalta Konferenco. Tial ankaŭ en Hungario restadis la rusa armeo pli ol kvardek jarojn post la fino de la milito kaj en la hungaraj lernejoj oni devis instrui kaj lerni la rusan lingvon. La problemo estis, ke la ekzistantaj lingvoinstruistoj antaŭe instruis aliaj lingvojn: la germanan, latinan aŭ la francan, kaj praktike neniu parolis ruse. Komence la instruadon devis fari tiuj instruistoj, kiuj mem ne parolis ruse.

Nun jam oni povas aŭdi anekdotojn, kiel tiuj instruistoj komencis la novan laboron. Ankaŭ ili aĉetis la lernolibrojn kiujn oni verkis por lernantoj kaj praktike la instruistoj lernis kune kun la lernantoj. Kutime ili estis nur unu aŭ du lecionojn antaŭ la lernantoj. Kiu estis jam tri aŭ kvar lecionojn antaŭ ili, tiu instruisto jam estis kvazaŭ profesoro. Tiu metodo havis sian rezulton. La plej multaj lernantoj post du aŭ trijara lernado ne povis peti eĉ glason da akvo ruse. Mi persone devis lerni dek jarojn ruse, kvar jarojn en la elementa lernejo, kvar jarojn en la mezlernejo kaj ankoraŭ du jarojn en la universitato. Sed ankoraŭ eĉ en nia universitato estis studentino, kiu ne konis ĉiujn rusajn literojn. Ekzemple kiam Ж (j) aperis en nia lernolibro tiam ŝi povis legi ĝin nur se alia studento flustre helpis ŝin.

Laŭ miaj spertoj la situacio ankaŭ en Koreio estas simila. Koreaj homoj apenaŭ parolas angle, malgraŭ plurjara lernado en la lernejoj. Vidinte tiun malsukceson oni povus klarigi la kialon de tiu malsukceso pro la malfacileco de la angla lingvo. Estus evidente konkludi, ke jam pro tio indus instrui kaj lerni pli facile lerneblan lingvon pli vaste, ekzemple esperanton. Sed bedaŭrinde ankaŭ la instruado de esperanto ne ĉiam estas sukcesa. Antaŭ kelkaj monatoj en Seulo mi parolis kun esperantistino, kiu diris al mi kun tre multaj eraroj apenaŭ kompreneble, ke ŝi lernis esperanton de fama lingvisto-profesoro antaŭ dek jaroj. Tiam la ĉeestanta profesoro turnis sin al ŝi kaj diris al ŝi ŝerceme: „*Vi devintus diri: antaŭ dek tagoj*”.

Ofte la kaŭzo de la malsukceso, ke multaj lernantoj eĉ post longa lernado ne povas prezenti sin kaj diri kelkajn gravajn vortojn pri sia vivo en fremda lingvo estas metodika problemo de lingvoinstruado. La nuntempe kutimaj lingvoinstruaj metodoj apartenas al du grupoj. En la unua la instruisto klarigas en sia gepatra lingvo la plej gravajn gramatikajn regulojn kaj en la dua temas pri la rekta metodo. Tio signifas, ke la instruisto jam dekomence parolas fremdlingve al la studentoj. En la famaj British Council lingvolernejoj la anglalingvaj instruistoj eĉ ne parolas la gepatran lingvon de la studentoj.

Ambaŭ metodoj havas kaj avantaĝojn, kaj malavantaĝojn. La unua metodo estas la pli facila kaj por la instruisto kaj por la studentoj, ĉar en tiu kazo ambaŭ parolas en sia gepatra lingvo. Granda avantaĝo estas, ke oni povas preparoli ĉiujn detalojn en sia gepatra lingvo. Sed se al tiu teoria lernado ne apartenas ankaŭ intensiva ekzercado, tiam facile povas okazi, ke la studentoj povas diri senerare en sia gepatra lingvo kio estas la ĝusta vortordo aŭ kiel finiĝas la substantivoj, sed ne povas flue komunikadi en la fremda lingvo.



Studentoj de la Indramang Universitato sidmeditas en la kampuso

En la dua kazo la instruisto jam dekomence fremdlingve parolas al la studentoj. Signifeca avantaĝo de tiu instrumentado estas ka la oreloj de la studentoj povas alkiutimiĝi al la lingvo. Estas tamen granda malavantaĝo, ke la studentoj ne povas demandi, se ili ne komprenas ion, ĉar komence ili ne kapablas demandi fremdlingve.

Por pliefikigi la instruadon mi evoluigis specialan instruadon. Baze mi uzas la rektan metodon, kie la ekzercado kaj la parolkapablo-evoligo de la studentoj estas en la fokuso de mia instruado. Sed estas grava afero, ke komence mi ĉiam diras la signifojn de la vortoj ankaŭ koree Per tio mi helpas, ke la studentoj komprenu ĉion je la komenco kaj en la posta parto de la leciono jam la studentoj povas paroli unu kun la alia esperantlingve dum la tuta tempo..

En multaj lingvoternejoj ŝokas kaj malentuziasmigas la studentojn la lernado de multegaj vortoj, kaj la timo pro multaj nekonataj vortoj timigas ilin ekparoli dum la studhoroj. Sed ne en miaj studhoroj. Mi ĉiam instigas ilin ekzerci kaj uzi tiujn kvin aŭ dek vortojn, kiujn ni ĵus lernis. Ili rajtis kaj rajtas uzi ankaŭ koreajn vortojn en la esperantlingva parolo, kiujn ni ĉiukaze ne tradukus alilingven. Tiel ili rapide ellernis la plej oftajn bazajn vortojn esperante: „*estas, lernas, laboras, malgranda, granda, bona, bela*”, kaj poste ili mem miris, ke ili povis dum minutoj libere paroli en tiu nova lingvo.

Ĉiu rakontis kiel li aŭ ŝi nomiĝis kaj kie li aŭ ŝi laboris aŭ studis. Ili povis klarigi: ĉu ili studis en la Indramang Daehak en la Jirisan aŭ en Seulo, ĉu Seulo estis granda kaj la Silsangsa estis malgranda, aŭ Seulo estis malgranda kaj la Silsangsa estis granda. Ĉu la Silsangsa estis en la Jirisan, aŭ ĉu ĝi estis en Seulo en la Namsan, ktp., ktp. Neniu uzis la vortojn „*Indramang Universitato*” por la Indramang Daehak, „*Silsang templo*” por la Silsangsa, „*Ĝiri montaro*” por la Jirisan kaj „*Suda monto*” por la Namsan, tamen ĉio estis komprenebla. Bone montris la ekspoda rido, ke ĉiu komprenis pri kio temis, kiam mi demandis ĉu Jagalchi estis en la Jirisan aŭ en la Namsan. Ĉiu respondis korse, ke Jagalchi estis nek en la Jirisan, nek en la Namsan, sed ĝi estis en Busan. Ĉar kiel oni povus imagi, ke unu el la plej granda marborda fiŝmerkato de Orienta Azio estu sur dumil metra alta montaro.

Estis do tre grave, ke jam en la tria studhoru la studentoj daŭre parolis unu kun la alia en fremda lingvo. Dum la naŭdekminuta leciono mi parolis eble nur dek kvin aŭ dudek minutojn pri la signifo de la vortoj kaj dum pli ol unu horo la studentoj parolis unu kun la alia. Tio donis al ili grandan memfidon kaj en la ventonaj tagoj jam ofte okazis, ke ili salutis min esperante en la korto kiam ni renkontiĝis kaj ili demandis min esperante kiel mi fartis.

La novaĵo pri la sukcesa instruado rapide disvastiĝis en la ĉirkaŭaĵo kaj post la unuaj lecionoj venis al niaj studhoroj ne nur niaj studentoj, sed ankaŭ pluraj oficistoj de la lernejo, unuavice la ĝenerala sekretario de la universitato. Sed aliĝis studentoj al nia kurso ankaŭ el la najbaraj vilaĝoj kaj ankaŭ laboristino de la loka kafejo decidis lerni esperanton. Nia kurso komencis transformiĝi al malfermita universitato, simile al la populara „*Open University*” en Ameriko.

Tiu speciala instrumentado postulis ankaŭ de mi mem grandan laboron. Ĉar komence mi kutimis diri ankaŭ koree la signifon de la vortoj, tial ankaŭ mi devis lerni koree la tekstojn. Simile, kiel okazis la instruado de la rusa lingvo en Hungario je la komenco post la milito, mi estis almenaŭ du lecionojn antaŭ la studentoj. Tial mi komencis lerni la korean lingvon pli intensive el mia lernolibro kiun mi aĉetis tri semajnojn antaŭ mia forveturo en Budapeŝto, en la librovendejo de la Eötvös Lóránd Universitato.

Tio ne estis facila, ĉar la libro estis plene kun mistajpoj kaj eraroj, kaj multaj vortoj ne estis menciataj en la vortlisto. Kvankam koreoj opinias, ke ili havas la plej logikan skribosistemon en la mondo, tamen ne eblas ellerni ĝin tre facile. Temas pri fonetika skribo, do la korea hangul skribosistemo estas certe pli facile lernebla ol la ĉina aŭ la japana, sed la prononco de la vortoj estas tre malfacila. Unue tial, ĉar malgraŭ la fonetikeco estas nekredeble multaj esceptoj. Ekzemple la literon „b” oni devas prononci foje „b”, foje „p”, sed povas okazi ankaŭ „m”. Estas multaj esceptoj, jam la unua vorto en la libro estas escepto, kaj ni ekscias, ke ankaŭ ĉiujn aliajn similajn vortojn oni devas prononci malregule.

La situacio estas eĉ pli komplika, ĉar en la hungara lingvo estas nur naŭ vokaloj, esperante kaj japane nur kvin, sed en la korea lingvo mi trovis dudek unu vokalojn. Inter ili dek estas sole sonaj kaj dek unu estas duoble sonaj vokaloj. Por ĉinoj, japanoj kaj koreoj ĉe lernado de eŭropaj lingvoj la ĉefa problemo estas distingi la literojn „r” kaj „l”, ĉar tiuj konsonantoj mankas en iliaj lingvoj. Tial mi ofte ricevas leterojn eĉ de konataj lingvistoj en kiuj ili erare uzas tiujn literojn..

Laŭ tiu vidpunkto koreoj lernas fremdajn lingvojn iom pli facile ol alilandanoj, ĉar ili devas lerni nur unu aŭ du nekonatajn fremdajn sonojn. Sed ne gravas eĉ se ili ne prononcus tiujn sonojn perfekte ĉar la partnero laŭ la kunteksto facile povas kompreni kion la koreo volas diri.

Se iu koreo ne povus prononci la sonon „ö”, kiu estas vaste uzata litero en la hungara, germana kaj franca lingvoj, tiam lia kunparolanto tamen facile povas trovi kion li volis diri kaj ili povas kompreni unu la alian. Ekzemple anstataŭ la hungara vorto „Hódmezővásárhely”, alilandanoj povas diri „Hodmezovasarhely”. En tiu kazo la hungaroj sentas ke la prononco estas malĝusta, tamen ili komprenas kion la alilandanoj volis diri. Oni facile komprenas la tiutipajn malĝuste prononcitajn vortojn, ĉar se nur unu sono malĝustas, la ceteraj aliaj bone difinas la vorton. Sed kiam mi parolas koree, tiam mi devas uzi ofte tiajn koreajn vortojn, en kiuj eĉ ne unu sono prononceblas laŭ kutima eŭropa prononcmaniero.

La Indramang Universitato estas alternativa universitato. Tie ne tio estas la plej grava celo, ke la studentoj estu la plej bonaj en ĉiuj studobjektoj por ke ili atingu brilan karieron kaj laboru ĉe la plej bonaj firmaoj kie ili ricevus la plej altajn salajrojn. En tiuj alternativaj lernejoj la plej grave estas, ke ĉiu fartu bone kaj ĉiu vivu feliĉe. Pro tio ankaŭ por mi estis grava tasko krei amikan etoson tuj ĉe la komenco.

En la alternativaj lernejoj la instruistoj parolas al la lernantoj uzante iliajn personajn nomojn kaj ankaŭ la lernantoj uzas la karesnomojn de la instruistoj. La karesnomojn la instruistoj mem elektas. Se iu ne elektas karesnomon, tiam la aliuloj nomas lin ankaŭ per persona nomo. En Eŭropo ofte okazas, ke studentoj donas moknomojn al la

instruistoj, sed tio tute ne estas kutime en la koreaj lernejoj. Anstataŭ la ceremonie uzata „sensei” (majstro, instruisto) en Japanio, aŭ la korea „sangsengnim” ankaŭ ni uzas personajn nomojn kiam ni parolas unu al la alia en la Indramang Universitato.

Kvankam la etoso estas tre amika kaj gaja dum la studhoroj kiam ni multe ridas pri la amuzaj situacioj, tamen ankaŭ en nia instruado estas iom da ceremonio. Kiam mi envenas la klasĉambron, tiam mi ne tuj komencas la instruadon per „malfermu la libron...” aŭ simile. Sed tiam unu el la studentoj batas ber bambuo-stango trifoje signali la komencon de la studhoroj kaj tiam ĉiu kunplektas siajn manojn preĝe salutante la instruiston kaj dankante la eblon partopreni en la instruado.

Por havi grandan sperton en la uzado de la fremdaj lingvoj, oni bezonas daŭre legi, skribi kaj paroli en la lernata lingvo. Tial mi kutime donas multege da hejmtasko al la studentoj. Ili faras tion volonte, ĉar per tio ili sentas, ke ili estas kapablaj ellerni la lingvon. Je la komenco mi donas ofte tekstojn en korea lingvo al la studentoj por ke ili traduku la tekstojn en esperanton.. Mi faras tiujn taskfoliojn en la biblioteko de la universitato, ĉar en mia komputilo mi ne havas koreajn literojn.



En la biblioteko estas komputilo kiu havas ankaŭ koreajn hangul-literojn, tial mi kutime tajpas la koreajn tekstojn per tiu komputilo. Mia instrumentado estas iom pli kompleksa ol la rekta metodo, ĉar tie la studentoj eĉ ne rajtas ekparoli en sia gepatra lingvo. Sed mi pensas, ke je la komenco mi devas daŭre kontroli ĉu la studentoj komprenas bone la vortojn, aŭ ne kaj pro tio mi ĉiam tradukigas tekstojn dum la unuaj kelkaj lecionoj. Mi spertis, ke ankaŭ por mi tio estis utile, ĉar tralegante ĉiujn hejmtaskojn ankaŭ mi povis ellerni iom pli efike la korean lingvon.

Kelfoje la studentoj malaperas el la kampuso por la tuta tago, ĉar ili iras al la kampoj por fari ian agrikulturan laboron. Tiam nur mi estas sole en la universitato. Tio okazis ankaŭ en la dua parto de la antaŭa semajno, kiam post du pluvaj tagoj subite venis sunbrila tago. Tiam subite serpentoj aperis en la korto de la universitato. Mi pensis ke tio estis tute normale, ĉar post la longa vintra malvarmo ankaŭ la serpentoj bezonas la sunan varmon. Videble ankaŭ ili ŝatas sunumi kaj ili povas tion fari en la korto de la univertato pli bone ol en la ĉirkaŭa arbaro, kie la sovaĝaj plantoj ombras la sunon. Laŭ la lokaj loĝantoj la serpentoj estas danĝeraj ĉefe printempe kaj aŭtune, sed mi supozas, ke ne ĉiu speco mordas venene.

La unua serpento, kiun mi ekvidis, estis ĉirkaŭ duonmetra longa kaj ĝi sunumis sur la pavimo antaŭ nia loĝeja domo en la kampuso. Kiam ni rimarkis unu la alian, tiam mi haltis kie mi estis kaj poste ĝi malrapide retiriĝis inter la plantojn en la herbejo. Post duon horo mi iris brosi miajn dentojn al la fonto malantaŭ la universitataj domoj. Ankaŭ tie sunumis serpento apud la fonto, ĝi estis pli longa ol la antaŭa. Feliĉe nek ĉifoje okazis malagrablaĵo, ĉar post kiam ĝi ekvidis min, ĝi kaŝis sin inter la rokojn.

Mi jam vizitis multajn landojn de la kvin kontinentoj kaj mi jam estis en multaj partoj de la mondo, do mi emis kredi, ke mi estis preta por ĉia situacio. Sed ĉifoje mi konsciis, ke oni neniam povas esti preta vojaĝante al ekzotikaj lokoj. Dum la lastaj jaroj mi faris longan liston de nemalhaveblaj aĵoj kiujn mi nepre metu en mian valizon, sed neniam venis al mia kapo ke mi kunportu ankaŭ gumbotojn.



Nun mi jam vidas, ke estus pli sekure nokte iri ĉi tie en la korton en gumbotoj, kiam en mallumo ne eblas vidi la bestojn en nia ĉirkaŭaĵo. Sed ĉar mi ne havas gumbotojn, mi provas ellerni la kutimojn de la sovaĝaj bestoj vivantaj apud la kampuso. Tiel mi povas malgrandigi la ŝancon renkonti ilin. Kiel malnova hungara diro instruas: „*A mér- ges kígyót is meg kell hogy értsük, csak kellő szempont kell, ahonnan nézzük.*” (Ni devas kompreni ankaŭ la venenan serpenton kaj por tio nur taŭga vidpunkto estas bezonata.)



ĜIS LA DIKA VIRINO NE KANTAS

Antaŭ mia vojaĝo al Koreio ŝajnis al mi, ke tie mi havos multe da libera tempo krom la instruado en la Indramang Universitato. Mi pensis, ke plurajn laborojn, kiujn mi jam prokrastis dum monatoj, mi povos tie fari kviete. Mia komputilo aĉetita en Florido antaŭ dek jaroj havis malmulte da loko en la storejo kaj pro tio mi planis forviŝi la ne bezonatajn dokumentojn kaj datenojn. Krome, mi kunportis dek dvd diskojn por kopii la bezonatajn (kaj ankaŭ la superfluajn) datenojn kaj konservi ilin sur la diskoj. Mi kunportis ankaŭ plurajn anglalingvajn romanojn legi en mia libertempo.

Krome mi kunportis ankaŭ la korean lernolibron aĉetitan en la budapeŝta universitato, supozante, ke mi povos tie lerni pli efike, ol en Budapeŝto. Mi supozis tiel, ĉar mi pensis, ke se mi bezonos helpon, tiam mi povos tuj demandi koreojn kiel oni prononcas la nekonatajn vortojn. Ankaŭ pri budhismo mi kunportis libron por legi ĝin en la monaĥejo. Mi planis ankaŭ redakti miajn du librojn, kiuj de du jaroj kuŝis en mia skribotablo, ĉar antaŭ mia ekveturo mi esperis havi tempon ankaŭ por tio.

Tiam hejme mi pensis, ke en la nova universitato konstruita sur montetopinto en la Ĝiri montaro mi estos ĉirkaŭita de la naturo, mi aŭskultos la ĉirkadon de birdoj en la arbaro kaj la glugladon de riveretoj en la orienta kaj okcidenta flankoj de la universitato. Mi pensis, ke kiam mi ekenuos tion, tiam mi enlegados en bonan libron aŭ komencos studi la ekzotikan orientazian kulturon kaj la korean lingvon. Komence aspektis, ke mia vivo tie estos varia, multkolora kaj riĉa, mi povos fari multajn interesajn kaj utilajn aferojn kaj mi havos multe da tempo ankaŭ por ripozi. Sed nun mi vidas, ke ne tiel okazos.

Post mia alveno Hae Kang Suenim, la prezidanto de la universitato akceptis min kaj ni interparolis pri la startigo de la instruado en la universitato. Dume laŭ la plurmiljara monaĥeja kutimo ni sidiĝis sur la planko kaj trinkis agrablan teon kaj manĝis freŝajn fragojn. Kiam li eksciis ĉe la fino, ke ankaŭ min interesis la budhismo, tiam li donis al mi libron de profesoro Walpola Rahula, doktoro de la Colombo

Universitato. La titolo de la libro estis: „*What the Buddha taught*” (La doktrino kiun la Budho instruis). Tiu libro estis grava, ĉar la aŭtoro estis la unua bhikkhu (budhisma monaĥo) en la mondo, kiun oni elektis profesoro en la okcidenta mondo. La usona Northwestern University nomumis lin universitata profesoro en la Katedro de Religiohistorio kaj Literaturo. La prezidanto de mia universitato, kiu estis ankaŭ mem budhisma monaĥo, helpeme ofertis al mi iam ajn viziti lin, se mi ŝatus konsulti demandojn pri miaj studoj. Tio signifas en la praktiko, ke krom la instruado li enkondukos min en la budhisman doktrinon per „*guided independent research*” (gvidata memstara esplorprogramo) dum mia restado en la monaĥejo.

Kaj la Silsangsa monaĥejo kaj la Indramang Universitato havas orientecan stilon. Tio signifas, ke nek en la loĝĉambroj, nek en la lernoĉambroj, nek en la kuirejo, nek en la biblioteko estas mebloj kaj dum la preĝejaj ceremonioj kaj dum la universitataj prelegoj ĉiu sidas surplanke. Same en la universitata manĝejo oni manĝas sidante surplanke. Nur en du lokoj estas malsama kutimo: en la monaĥeja manĝejo kaj en la akceptejo de la monaĥejo oni manĝas kaj sidas sur seĝo farante siajn aferojn. Kaj estas nature, ke laŭ malnova korea kaj japana tradicio ni dormas ankaŭ surplanke en niaj loĝejoj en la universitata kampuso.

La matenmanĝo kaj la vespermanĝo okazas en la kampuso, sed tagmeze ni iras tagmanĝi en la monaĥejan manĝejon. Tiucele ni devas grimpi alten, ĉar la monaĥejo estas en valo sed la universitato en montopinto sur senarba placo. Inter la du lokoj oni povas iri en romantika arbara vojeto, kiu ne iras laŭ la monto serpente, sed ĉiufoje oni devas iri ĝis la montopinto de malalta monteto inter la du ejoj, de kie oni povas vidi bonege la panoramon de la ĉirkaŭantaj Ĝiri-montoj.

La manĝokomencon signalas interesa ekzotika ceremonio. Kvankam ĉiu konas la manĝotempojn: metenmanĝo okazas inter la sepa kaj la oka horo, tagmanĝo vespere inter la sesa kaj la sepa horo, tamen ne estas kutimo simple eniri la manĝejon sen ajna ceremonio. La komencon de la manĝoj en la monaĥejo signalas tamburo farita el ligno kaj bambuo-stangetoj batitaj sur manplato en la universitato. Antaŭ la

manĝoj okazas duon minuta silenta meditado starante, kaj poste eksidante okazas plia dankesprimo kaj nur post tio oni ekmanĝas. La komencon de la manĝoj do signalas tamburo kaj bambuostangetoj, sed ankaŭ antaŭ la studhoroj oni uzas ilin por montri, ke la leciono komenciĝas.

Laŭ novtipa usona proverbo „*la afero ne estas finita ĝis la dika virino ne kantas*”. La origino de la proverbo devenas el iu sporta stadiono, kie post la fino de la matĉo aŭ alia sporta ludo iu dika virino ĉiufoje sen oficiala peto memvole kantis la usonan himnon. En la stadioj okazis plurfoje, ke multaj homoj en la publiko ne atendis la finon de la matĉo, sed pli frue ekforiris por ne havi grandan amason da homoj ĉe la elirejo. Ili verŝajne pensis, ke en la lastaj unu aŭ du minutoj okazos nenio interesa, sed tamen plurfoje okazis lastminuta grava evento kion ili ne vidis.

Tiam naskiĝis tiu proverbo, do komence la proverbo havis tre konkretan signifon. Poste la signifo de tiu proverbo fariĝis pri ĝenerala. Do, se en Usono oni dirus, ke nenio estas finita ĝis la dika virino ne kantas, la slogano en la Ĝiri montaro sonus aliel: nenio komenĉigas ĝis la bambuo-tamburo ne eksonas.



LA JUVELOJ DE LA REĜINO

„Vivis reĝo iam en la mezepoko, kiu havis sekretan amatinon. La juna virino tre plaĉis al la reĝo, tial li decidis doni al ŝi belan kaj valoran donacon. Li eniris kaŝe la trezorejon, prenis tie la orajn braceletojn de la reĝino kaj donacis ilin al la amatino. La reĝo pensis, ke la reĝino havis tiom multe da juveloj, ke ŝi tute ne povis rememori ilin, do eble ŝi ne rimarkos ĉu iu el la juveloj mankos.

Post kelkaj semajnoj vojaĝanta teatra grupo venis en la urbon. La programo ŝajnis esti interesa, tial ankaŭ la reĝa paro partoprenis ĝin kune kun multaj aliaj homoj. Ankaŭ la amatino de la reĝo venis al la prezentado kaj ŝi sidiĝis proksime al la reĝa paro.

La amatino estis vanta, ekshibicia, kaj fanfarona virino. Tial ŝi havis siajn braceletojn ĉirkaŭ la manoj kaj ŝi tenis siajn manojn super la seĝo tiel, ke ĉiu vidu ŝiajn belegajn juvelojn.

Post la unua akto nekonata viro iris al la seĝo de la amatino kiu havis uniformon de la reĝa korpogardistaro. Li salutis ĝentile soldate kaj diris, ke la reĝino rimarkis la belegajn juvelojn sur la brakoj de la virino kaj la reĝina moŝto ŝatus rigardi ilin pli proksime. La viro petis ke ŝi transdoni unu el la juveloj al li por ke li poste montru la valoraĵon al la reĝino.

La amatino transdonis la juvelon feliĉe, ĉar ŝi esperis sekrete, ke la reĝino invitos ŝin poste al sinprezento en la reĝan kortegon. Si pensis, ke ŝi povos konatiĝi tie kun famaj kaj riĉaj aristokratoj kaj aliaj eminentuloj.

Poste pasis la dua akto kaj venis nova paŭzo. Tiam alia nekonata viro iris al la seĝo de la amatino. Malgraŭ, ke li ne havis uniformon, tamen li asertis ke li estis la gvidanto de la urba policejo. Li diris, ke antaŭ kelkaj minutoj policistoj arestis viron kaj ili trovis oran juvelon en la poŝo de tiu viro. Post mallonga konfesprenado la viro konfesis, ke li akiris ĝin de iu nekonata virino en la teatro, kaj la trovita juvelo tre similis al la braceleto kiun la sinjorino havis sur sia mano.

La viro petis, ke la virino transdonu al li sian braceleton por ke policistoj povu kompari ĝin kun la alia juvelo, kiun la arestita viro posedis en la policejo. Tiel la virino donis ankaŭ sian alian braceleton al la viro kiu metis ĝin en la poŝon kaj rapide foriris....” - Tio estas la unua parto de la rakonto, sed estas demando kiel la rakonto finiĝas.

Kiam mi venis al Koreio tiam temis nur pri organizado de instruado de fremdaj lingvoj en la Indramang Universitato, sed intertempe mi ricevis ankaŭ aliajn taskojn. Dum la lastaj semajnoj disvastiĝis la famo pri miaj specialaj instrumentoj, kiuj ŝajnis esti efikaj ĉar ili havis tre rapidajn kaj facile videblajn rezultojn. Tial oni petis min instrui ankaŭ en la seula filio de Korea Esperanto-Asocio. Tio estis dudekhora kurso por membroj de la progresanta grupo en Mapo, proksime al la Han rivero.

Tie mi devis organizi la instruadon aliel ol kiel mi instruis la komencantojn en la Indramang Universitato. En la universitato mi elektis la konversaciajn temojn laŭ la lernolibro por komencantoj. Sed en la seula progresanta grupo mi faris mallongajn prelegojn pri diversaj sociaj, ekonomikaj, kulturaj kaj historiaj temoj kaj en la cetera tempo de la studhoru ni diskutis tiun temon kun la partoprenantoj en seminaria formo. Estas grave, ke la prelegoj ne estu tro enuaj kaj tedaj kaj pro tio mi foje-foje donis taskon al la partoprenantoj de la kurso, ke ili finu senfinan amuzan rakonton laŭ siaj pensoj.

Poste ĉiu kursano laŭtleĝas sian propran version pri la fino de la rakonto kaj la grupo diskutas kiu versio estas logika, kredebla kaj amuza, aŭ la tuta rakonto estas tute malracia kaj nekredebla. Post la unua studhoru mi disdonis la superan rakonton al la kursanoj por ke ili hejme pripensu la aferon kaj verku taŭgan finon al la rakonto.

En la dua studhoru mi ĝoje spertis, ke malgraŭ la multaj relative malofte uzataj vortoj kaj komplikaj esprimoj ĉiu kursano komprenis la rakonton kaj ĉiu provis trovi spritan finon per interesaj ideoj. Por mi la plej sprita rakontofino estis la jena:

„Ambaŭ viroj kiuj vizitis la amatinon de la reĝo en la teatro estis membroj de la reĝina korpogardistaro. La reĝino rekonis siajn juvelojn sur la manoj de la amatino kaj suspektis la ruzan kaŭzon kiel la juveloj troviĝis ĉirkaŭ la manoj de la nekonata virino. Sed la reĝino volis eviti laŭtan skandalon kaj tial ŝi ordonis siajn korpogardistojn ke ili provu rehavigi la juvelojn diskrete, sen aparta skandalo.”



Chon Changsong, generalo de la Korea Aera Forto (apud la aŭtoro) estis la plej diligenta kaj multkolora kursano kiu ĉeestis ĉiujn kursojn



TRAGEDIO EN LA MARO

Unu semajnon post mia alveno al Orienta Azio grava mara tragedio ŝokis la mondon kaj la korean socion, kiu okazis ĉe insulo Kvanmedo en Sudkoreio. La Sewol pramŝipo post subita turno falis flanken, fariĝis nekontrolebla, renversiĝis kaj dum du horoj tute subakviĝis.

476 homoj estis sur la pramŝipo dum la tragedio kaj nur 174 travivis la akcidenton. La viktimoj estis grandparte studentoj de la Danwon supermezlernejo el urbo Ansan, kiuj studvojaĝis de Incheon al insulo Jeju, populara kaj konata feriejo en Koreio.

La unuaj informoj pri la ŝipakcidento en la medio estis ŝokigaj. El tiuj informoj eblis ekscii, ke dum la katastrofo ne la kapitano estis ĉe la stirejo, sed juna triagrada nesperta oficiro stiris la ŝipon. Onidire ankaŭ la fajrobrigadon informis unue ne la personalo de la ŝipo, sed la studentoj telefonis peti helpon pro la sinko de la ŝipo.

Laŭ informoj en la ŝipo estis pli ol kvardek savboatoj, sed nur unu (laŭ aliaj informoj du) estis uzata kaj la kapitano ordonis la pasaĝerojn resti en ilia loko en la rapide subakviĝinta ŝipo. Intertempe la kapitano savis sin inter la unuaj. Li eskapis el la ŝipo kun siaj pluraj oficiroj kaj tiel forlasante la ŝipon, ili lasis, ke la pasaĝeroj strangoliĝu en la renversiĝita ŝipo.

La kapitano poste diris, ke li ordonis al la pasaĝeroj resti en la ŝipo, ĉar li pensis, ke en la 12 C-grada akvo ili tro malvarmumus kaj forflosigus ilin la oceano. Tamen ne estis klare, ke se laŭ li tio estis tiom danĝera, kial li mem saltis en la akvon kaj sidis en savboaton inter la unuaj. La nekredeble granda nombro de la viktimoj devenis ankaŭ de la koreaj tradicioj, laŭ kiuj la homojn oni edukas tiel, ke ili devas ĉiukaze agi laŭ la ordonoj. Ĉar ankaŭ en tiu kazo multaj obeis la ordonojn de la ŝipoficiroj, sekve de tio multaj el la pasaĝeroj mortis. Mi pensas, ke se ili saltindus en sia savzono en la marakvon por atingi la savboatojn, tiam multaj povintus travivi la akcidenton. Ĉar kiam la ŝipo Titanic karambolis kun glacimonto, tiam la temperaturo de la marakvo estis eĉ pli malalta ol 12 C gradoj. Kaj oni bone scias, ke

tiam multegaj homoj travivis la katastrofon, preskaŭ ĉiuj kiuj povis atingi la savboatojn.

La nombro de mortintoj estis pli alta ol la nombro de la homoj kiuj dronis dum la subakviĝo de la ŝipo. Kelkajn tagojn post la akcidento subakvisto mortis serĉante viktimojn en la ŝipo kaj mortis ankaŭ instruisto kiu povis eskapi el la ŝipo dum la tempo de la katastrofo. Kang Minkyu, 52-jara instruisto pri etiko saviĝis el la ŝipo, sed post du tagoj li mem mortigis sin sur arbo per ŝnuro. Li estis vicdirektoro de la Danwon supermezlernejo kaj li iniciatis, ke siaj studentoj partoprenu tiun perŝipan studekskurson. Kiel li skribis en sia adiaŭa mesaĝo li ne povis vivi plu, kiam li vidis, ke siaj multaj lernantoj mortis.

Li respondecis pri la sekureco de la studentoj kaj li sentis, ke li ne povus plu vivi kiam li ne sciis kie siaj studentoj estis. Li aldonis, ke en la transa mondo super la ĉieloj eble li ankoraŭ povos pluinstrui siajn amatajn studentojn. En sia lasta mesaĝo li petis cindrigi sin kaj verŝi siajn cindrojn tien, kie la studentoj mortis. En Koreio ne estas entombigaj ceremonioj kaj ne estas kutimo fari laŭdajn parolojn.

La korpon de la mortinta instruisto oni metis en ĉerkoan ŝtonon je la kvara kaj duono matene antaŭ sunleviĝo kaj la parencoj akompanis lin ĝis la parkejo. Poste la funebrantoj sidiĝis en siajn aŭtojn kaj veturis al la kremaciejo. La ĉerkoan ŝtono sekvis ilin, sed unue ĝi ankoraŭ faris kromvojon ĉirkaŭ la kampuso de la Danwon supermezlernejo. Per tio montriĝis, ke la vicdirektoro lastfoje vizitis sian amatan lernejon.

La eventojn la televido elsendis rekte kaj tio pli ekscitis la korean socion kaj faris la doloron persone travivebla, kiun tiu tragedio kaŭzis por plurcent familioj. Laŭ koreaj tradicioj ne estas entombigaj ceremonioj en la eŭropa senco, tamen en la funebra salono estis multegaj florkronoj kaj la parencoj akceptis la kondolencojn de la kolegoj kaj geamikoj. En la funebran salonon de la instruisto venis liaj kolegoj ankaŭ el liaj antaŭaj lernejoj kaj ankaŭ estintaj studentoj por espimi siajn kondolencojn per senvorta kapklino.

Laŭ la paso de tagoj eblis ekscii pli kaj pli da malregulaĵojn kaj preterlasojn de gravaj reguloj pri la evento. Oni eksciis, ke la ŝipo estis troŝarĝita kaj la mara gardistaro jam kvin minutojn post la unua SOS-

signalo mesaĝis al la kapitano ke li tuj komencu evakui la ŝipon. Poste ankaŭ klariĝis, ke la ŝipo estis konstruita en Japanio kaj ĝi venis al Koreio antaŭ unu jaro. Tiam ĝi estis rekonstruita aŭ alikonstruita per aldono de plia ferdeko, kiu malbonigis la stabilecon de la ŝipo. Ankaŭ aliaj informoj venis pri la maraferaj instancoj, kiuj intence ne rimarkis diversajn malregulecojn. Tial komenciĝis pluraj esploroj rilate al la afero, ankaŭ pri koruptado.

Post esplor-ekzameno preskaŭ la tuta personalo de la ŝipo estis arestitaj. La malmultaj esceptoj, kiujn la kompetentaj instancoj ne arestis, estis la maristoj kiuj okupiĝis pri la pasaĝeroj kaj la kuirejistoj. Oni arestis ankaŭ la ĝeneralan direktoron kaj kvar fakdirektorojn de la entrepreno, kiu posedis la ŝipon. Post la tragedio ankaŭ la ŝtatprezidentino iris surloken kaj esprimis kondolencon al la familianoj de la viktimoj. Kiel ŝi diris, ankaŭ ŝi bone povis senti la doloron de la perdo, ĉar oni murdis ankaŭ ŝian patron kaj patrinon. Poste ankaŭ la ĉefministro abdikis kaj la ŝtatestrino ekceptis tion.

Estas fakto, ke multaj homoj serioze kulpis en la tragedio, sed estis ankaŭ aliaj homoj, kiuj kondukis heroe en la malfacilaj minutoj. Ekzemple Park Jee Young, 22-jara junulino helpis disdoni savovestojn. Ŝi disdonis ĉiujn, do ŝi mem jam ne povis surhavi unu. Tio kaŭzis ŝian morton kaj tiel ŝi fariĝis nacia heroo. Ankaŭ la 17-jara Choi Dukha savis multajn vivojn, sed poste li mortis pro la sekvoj de la akcidento.

Laŭ la moderna 21-jarcenta tekniko pluraj studentoj povis filmi la okazaĵojn per sia poŝtelefono kaj tiel multaj adiaŭis siajn gepatrojn, kiam ili vidis, ke la situacio estis senespera. Kiam estis jam granda paniko, iu ankoraŭ sukcesis sendi lastan mesaĝon al sia patro aŭ patrino por sciigi, ke li multe amis ilin. Sed iris ankaŭ helpopetaj informoj ĉien ajn. Unu el la infanoj petis sian patron sendi rapide fajrobriĝadistojn al la ŝipo, ĉar tiam multaj studentoj ankoraŭ vivis en la kajutoj kiuj estis duonplenaj kun akvo.

Multaj pasaĝeroj luktis pro sia vivo ĝis la lasta spiro. Tio nur poste videblis, kiam subakvistoj trovis plurajn viktimojn kun rompitaĵoj fingroj en la dronita ŝipo. Tio signifis, ke ili klopodis eskapi ankaŭ el la akvoplena ŝipkorpo kaj provis iel liberiĝi.

Multaj gepatroj ankaŭ post la subakviĝo de la ŝipo esperis blinde en iu miraklo, ke sia filo tamen restis vivanta ie en la suba angulo de la ŝipo. Kelkajn tagojn post la tragedio aperis en la medio adiaŭa mesaĝo de patro al sia filo: „*Pardonu min, ke mi tiom longe ne lasis vin for kaj ke mi esperis plu. Tie kie vi estis verŝajne estis tre malvarme kaj mallume. Dio estu kun vi, mi esperas, ke ni iam renkontiĝos.*”



Kondolencna ceremonio por la viktimoj en la Silsangsa



VIVO EN LA KAMPUSO

Post mia alveno la tuta universitata personaro iris al la monaĥejo por kelkaj semajnoj, tial dum iom da tempo mi estis sole en la universitato de mateno ĝis vespero. Tial ni ne uzis ankaŭ la universitatan kiurejon. Dum tiu tempo mi iris ĉiutage dufoje de la kampuso al la monaĥeja manĝejo tra arbara vojeto grimpante sur monteton inter la du lokoj. Tiaj eventoj ne estas maloftaj, kiam la studentoj estas en la kampoj por fari fakajn ekzercojn aŭ kiam ili partoprenas diversajn kursojn en la monaĥejo.

La studkostoj en la Indramang Universitato ne estas tro altaj kompare al la kostoj de aliaj universitatoj kaj altlernejoj. La studentoj pagas unu milionon da wonoj po duon jaro, kaj al tiu sumo aldoniĝas 250 mil wonoj da registra kosto kaj 50 mil wonoj da procedura kosto. Krom tio ili pagas 1.200.000 wonojn por la loĝado kaj manĝado. Tio estas malmultekosta en Koreio, ĉar la kuracistaj studentoj onidire pagas ĉirkaŭ tri milionojn da wonoj po duon jaro.



En nia universitato la etoso estas pli amika ol en aliaj universitatoj kaj inter la studentoj kaj la instruistoj estas pli proksimaj rilatoj. La studentoj helpas unu la alian en la ĉiutaga vivo, ĉar la Indramang Da-

ehak estas Universitato de Komunumaj Retoj. Ni festas ĉiam kune la naskiĝtagon de la studentoj, kaj se iu studento ial ne povas partopreni la prelegojn, tiam poste la aliaj helpas al li lerni la studendaĵojn.

Ĉi tie estas tute nature, ke se iu studento havas propran problemon, tiam li aŭ ŝi povas foriri kelkajn tagojn. Poste la aliaj rakontas al tiu studento pri la lecionoj kiujn li ne povis partopreni. Laste unu el la studentinoj iris prizorgi sian avinon por kelkaj tagoj en Daegu, ĉar la avino malsaniĝis kaj estis bezonata la helpo de la nepino. Ankaŭ okazis, ke junulino el la najbara vilaĝo venis al la gestudentoj por kunlerni kaj konsultiĝi pri la esperantaj lecionoj kiujn ŝi ne povis ĉeesti.

Laŭ la malnovaj budhismaj instruoj la ĉefa principo por la homa vivo estas la senperforteco. La plej ĉefe emfazita parto de la budhisma doktrino estas senperforto kaj paco. Tial la pacedukado kaj la instruado de pacrilataj sociaj sciencoj ankaŭ en tiu universitato estas en la centro de la studprogramo. La instruado ne koncentriĝas al religiaj demandoj, malgraŭ ke budhismaj monaĥoj fondis la universitaton. Krom budhismaj bonzoj ankaŭ pluraj kristanaj instruistoj instruas en nia universitato. Mi havis ankaŭ miskomprenon pro tio en la unua semajno.



Hajeong, Soyeon, Maneog, Unil kaj Hanna

Kiam mi komencis la instruadon de fremda lingvo en la lernejo, tiam mi spertis, ke preskaŭ ĉiu ĉeestis, kiu vivis en la kampuso. Kvankam ni ne parolis pri tio, mi pensis, ke ĉiu studento devis lerni esperanton. Ĉar la ĝenerala sekretario de la universitato informis min, ke ili ĝuste elektis instrui esperanton, la facile lerneblan intenacian lingvon, ĉar dum la pasinta jarcento evidentiĝis, ke ĝi estis la lingvo de paco kaj internacia paca interkompreniĝo.



Tial mi ne komprenis dum la unuaj tagoj kial la tuj apud mi loĝanta viro ne venis al mia lingvokurso, ĉar krom li ĉiu aliulo venis. Kiam mi havis okazon babilu kun li, tiam mi eksciis, ke mi miskomprenis la situacion. Tiu viro ne apartenis al la instruistaro de la universitato, li venis el Seulo por kelkaj semajnoj kiel gastoprofeso por instrui specialan studobjekton. Li mem estis kristano kaj antaŭe li akiris doktoran gradon en fama usona universitato pri kristana kulturhistorio. La plej ĉefaj studobjektoj, kiujn la Indramang studentoj studas estas la jenaj:

- 인드라마철학 Filozofio
- 고전의 지혜 Antikva prudento
- 평화영성 Spiritologio de paco

- 지리산학 Ĝirimontologio
- 자본주의 문명사 해석 Historio de kapitalismo
- 우주이야기 Kosmologio
- 몸의 이해 Bioekonomio
- 사회변화와 리더십 Socio-evoluigo kaj direktado
- 근현대사 Moderna historio
- 평화인문학 Scienco pri paca kunvivado
- 0 공동체와 마을학 Organizado de vilaĝaj komunumoj
- 사회경제 Socio-ekonomio
- 대안사회기획실무 Alternativa socio-organizado kaj entreprenado-praktiko
- 심리이해와 치유 Metodologio de psikologia interkompreniĝo
- 인문학과 글쓰기 Humanistiko



La prelegĉambro de la Inmangdae (Indramang Universitato)

Por mi estis vidi surprize la diferencon inter la kampusa vivo en eŭropaj kaj usonaj universitatoj kaj la kampusa vivo ĉi tie en Koreio. Ĉi tie la vivo de la studentoj estas pli loza, libera, sed aliflanke ĝi estas pli severa.. En la okcidentaj universitatoj prelegoj estas ĉefe antaŭtagmeze kaj eble posttagmeze, ĉi tie mi vidas plurfoje, ke la studentoj dumtage babilas, foje iras al la ĝardeno de la universitato aŭ legas libron en la biblioteko de la universitato. Sed okazas ne malofte prelegoj malfrue vespere ĝis la deka horo, ĉar la studentoj ofte partoprenas prelegojn kaj seminariojn ankaŭ post vespermanĝo.



Unu mil tricent jara granda Budho-statuo en la Silsangsa

Kaj en la monaĥejo kaj en la universitato estas vigla komunuma vivo kaj ĉiu okazaĵo havas sian tempon. Semajna vestaĵlavado okazas ĵaŭde. Tiam ĉiu iras al la banejo, kie estas grandkapacitaj lavmaŝinoj por la uzo de la universitata komunumo. Marde kaj vendrede okazas la ceremonio de cent riverencoj. En budhismaj komunumoj tiu ceremonio estas vaste konata, kvankam kelkloke, ekzemple ĉe la Won budhisma (nomata Ŭonbulisma) eklezio estas ne cent, sed cent ok riverencoj.

Dum la ceremonio ni aŭdas trankviligan muzikon el magnetofono kun meditataj pensoj pri nia loko kaj rolo en la mondo: de kie ni venas kaj kien ni iras kaj kio estas la celo de la eterna ciklado de la vivo en la universo. Inter la Ĝiri montoj la ceremonio havas specialan etoson, tra malfermitaj fenestroj aŭdeblas la gluglado de la rivereto apud la kampuso kaj pepado de birdoj. En monaĥejoj en grandurboj dum la ceremonio oni aŭskultas la glugladon de akvo kaj pepadon de birdoj per magnetofono.

Laŭ profesoro So Gilsu, loĝanta en Seulo kaj pasigita tri jarojn en budhisma monaĥejo, la riverencaj ceremonioj havas la jenajn trajtojn:

- Oni esprimas estimon al Budho.
- Oni malpliigas la karmojn, kiujn oni faris per siaj faroj dum la vivo. (Karmo signifas interrilaton inter kaŭzo kaj sekvo en la hinduisma, taoista kaj budhisma praaj religioj, kaj oni uzas la vorton en la sama senco ankaŭ en la dokumentoj de modernaj mondkonceptoj.)
- Oni preĝas por siaj propraj intencoj.
- Oni humiligas sin kaj rekonas la gravecon de modesteco per observado de la grandega universo, kiu funkcias laŭ difinitaj reguloj dum jarmiliardoj, en kiu universo homo estas nur eta parto.
- Oni meditas pri fenomenoj kaj aferoj pri kiuj oni pensas ke pri ili indas meditati.

- Kiam oni atingas la staton vidi sin ekstere dum la meditado, tiam tio estas jam ne plu riverenco, sed la Zen mem.

Fine de la ceremonio ĉiu povas rakonti sian impreson akiritan dum la meditado. Tiam mi parolis pri miaj sentoj ke mi alte taksis la eblecon partopreni la ekzotikan ceremonion en tia renoma, sankta loko kun grandaj tradicioj. Ĉar tiun monaĥejon oni fondis antaŭ pli ol mil ducent jaroj kaj la feran Budho-statuon oni faris antaŭ mil tricent jaroj. Do, tio okazis en la tempo kiam Hungario, mia lando ankoraŭ ne estis, eĉ hungaroj ankoraŭ ne migris al la Karpat-baseno, la loko kie hungaroj nun vivas. Sed en tiu tempo tiu ferskulptaĵo jam ekzistis plurcent jarojn kaj antaŭ ĝi jam tra generacioj faris la praaĵn ceremoniojn la proksime loĝantoj.

Poste mi aldonis, ke mi jam plurfoje partoprenis similajn ceremoniojn en la Ŭonbulisma eklezio. Sed aliloke ni aŭskultis la glugadon de rivereto kaj pepadon de birdoj per magnetofono dum la 108 riverencoj. Ĉi tie en la Ĝiri montaro estis sufiĉe nur malfermi la fenestrojn por aŭdi tiujn sonojn el la apuda arbaro en sia natura beleco.

Dum pluvo oni ne povas iri tagmanĝi de la universitato al la monaĥejo, tial la studentoj kutime tiam faras manĝaĵojn en la manĝejo de la universitato. La manĝaĵo preskaŭ ĉiam estas bibimbap. Ankaŭ tie estas kutimo ĉiutage antaŭ manĝoj fari duonminutan silentan meditado kaj antaŭ komenci la manĝon ni kapkliniĝas ĉe la tablo. La restaĵojn de la manĝaĵoj oni ankaŭ tie ne forĵetas, same kiel en la monaĥejo, kie eĉ ne estas loko por manĝrestaĵoj. Kutime ĉiu prenas nur tiom da manĝaĵo al sia telero kiom oni povas manĝi. Post la manĝo oni lavas la teleron per ia amara teo kaj trinkas tiun likvaĵon por ke oni forĵetu nenian manĝeblaĵon.

En la unuaj tagoj, kiam mi ne konis ankoraŭ sufiĉe bone la lokajn manĝaĵojn, mi ĝoje ekvidis stufitajn junajn pizojn sur la manĝobreto apud diversaj legomoj. Tiam mi jam dum monatoj ne manĝis pizojn kaj tial mi metis iom pli sur mian teleron. Nur kiam mi gustumis ilin, tiam mi spertis, ke ili ne estis junaj pizoj. Ili estis tre akragustaj kapsikoj, el kiuj mi devus meti nur iomete sur mian teleron. Sed ĉar ĉi tie ne estas kutimo forĵeti manĝaĵojn, tial mi heroe manĝis la tuton

kaj ĉe la fino mi forlavis la teleron kaj mian gorĝon per trioble pli da teo.

Iun sunbrilan posttagmezon studentoj el arta altlernejo venis al nia kampuso en la monto por pentri la banejon kaj la kuirejon. Ĉio estis tre bela, sed estis tiom granda farboodoro en la kampuso, ke tiun vesperon ni iris denove en la manĝejon de la monaĥejo por vespermanĝi. Tiutage ni iris denove dufoje supren kaj suben la monteton inter la monaĥejo kaj la universitato. Aldone ni faris la cent riverencojn antaŭtagmeze, do nia gimnastiko por konservi sanon estis farita denove por la tuta tago.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi iom malkontentis pri mia flugkompanio, ĉar ili ne volis pagi rekompencon pro mia rompita valizopiedo. Ili skribis retpoŝte, ke ili povas fari nenion ĝis mi sendas la fakturon de tiu valizo kaj ekspertan pruvilon pri la prezo de tia valizo. Krome, ili menciis, ke mi devus sendi denove la identigan ŝildeton de mia valizo. Temis pri ŝildeto kiun mi jam pli frue donis al ili en la flughaveno kiam ili faris la protokolon kaj sekve de tio mi ne plu havis ĝin.

Iun matenon oficisto neatendite telefonis de la kompanio Turkish Airlines por demandi ĉu mi havas konton en Koreio. Tiu oficisto telefonis ĉar ŝajnis esti ke ili tamen volis pagi iom kaj ŝatus sendi la monon al mi tiamaniere. Mi diris, ke mi ne havis konton tie, kaj ankaŭ ne volas malfermi novan konton en korea banko, ĉar mi estas nur provizore en Koreio. Poste okazis iom da korespondado, ĉar ili bezonis atestilon, ke mi vere instruis en la universitato. Kelkajn tagojn poste ili vere sendis kvindek mil wonojn (ĉ. kvindek dolarojn). Tiel la problemo estis bone solvita, malgraŭ ke laŭ iliaj antaŭaj leteroj antaŭ kelkaj semajnoj mi tute ne esperis ke ili pagos pro mia rompita valizo.



BIBIMBAP

Eksterlandanoj vojaĝantaj al Koreio jam en la aviadilo povas konatiĝi kun la bibimbap, kiu estas unu el la plej popularaj koreaj manĝaĵoj. Ĝi konsistas el kuirita rizo, freŝaj kaj sekigitaj plantoj, etaj fiŝeroj aŭ aliaj viandaĵoj kaj acidaj garnaĵoj. Tiujn ĉiujn aĵojn la apude sidantaj koreoj verŝis en grandan poton, bone miksis ĉion kaj manĝis ĝin kun bastonetoj bonguste en la aviadilo.

En mia kampuso kutime ni matenmanĝas kune kun la studentoj ĉiam en la manĝejo de la universitato kaj vespere ĉu en la universitato, ĉu en la manĝejo de la monaĥejo, depende kie estas la studentoj en tiu tempo. Se ili estas supre, tiam oni kuiras supre, sed se iliaj kursoj estas en la monaĥejo, tiam ili manĝas vespere ankaŭ en la monaĥejo. La tagmanĝo estas ĉiam en la manĝejo de la monaĥejo, tial mi ĉiutage havas eblon bone promeni sane, ĉar tiukaze mi devas dufoje fari la distancon inter la universitato kaj la monaĥejo.

Kvankam la membroj de mia universitata komunumo manĝas diversloke, sed estas komuna trajto kaj en la monaĥejo kaj en la universitato la ceremonia salutkliniĝo. Oni preĝe kunmetas la manojn dum ceremonia kliniĝo kaj nur post tio oni komencas manĝi. Same ĉe la manĝofino. Krom tio en la manĝejo de la monaĥejo estas kutimo kliniĝi ankaŭ ĉe la eniro, ankaŭ tiukaze, kiam neniu estas en la manĝejo.

Mi ne spertis aliloke kion oni faras kutime en la Silsangsa kaj ankaŭ en la Indramang Universitato post ĉiuj manĝoj. Tiam oni verŝas amaran verdan teon en sian teleron por purigi la manĝilojn. Poste oni zorge lavas la teleron kaj eltrinkas la teon atente, ke eĉ ne iu rizero restu en la telero por forĵeti.

En la monaĥeja kuirejo laboras ankaŭ personalo, sed same kiel ankaŭ en aliaj budhismaj monaĥejoj ĉiu manĝanto mem lavas sian teleron kaj manĝilaron kaj mem remetis ilin sur la bretaron. La monaĥoj uzas alian manĝilaron ol la laikuloj. Niaj teleroj estas blankaj sed iliaj estas nigraj kaj ili uzas ĉiam sian propran, kiun ili metas sur apartan bretaron en la manĝejo.

Kvankam oni ceremonie manĝas en nia universitata kaj monaĥeja komunumoj, mi pensas, ke la manĝoj estas pli gravaj ol la ceremonioj. Ni manĝas preskaŭ ĉiam samtipan modestan (sed tre sanan) manĝaĵon, plej ofte bibimbapon kaj en la universitato kaj en la monaĥejo. Kaj por matenmanĝo, kaj tagmanĝo kaj vespermanĝo oni manĝas la saman rizon kun plantoj kaj acidaj legomoj. Monaĥoj manĝas vegetare, en ilia kuirejo tute ne estas viando, sed en la kuirejo de la universitato la studentoj metas kelkfoje ankaŭ sekigitajn fiŝpecojn en la manĝaĵon.

Tiu kutimo ŝajnas esti tro monotona por eŭropanoj, sed koreoj tre ŝatas tiajn manĝaĵojn kaj ili trovas ilin variaj kaj bongustaj. Ili pensas, ke la bibimbap ĉiutage tute ne estas monotona, ĉar oni povas miksi malsamajn legomojn en la manĝaĵojn tagmeze kaj vespere. Krome ankaŭ tio malsimiligas la manĝojn ke kelkfoje oni kuiras blankan rizon, kelkfoje brunan, ĉar tiam ankaŭ brunaj faboj estas enkuiritaj.



Oni konservas la sonorigilon de la Silsangsa en tiu konstruaĵo

Oni miksas la rizon kun variaj manĝaĵoj, kiuj estas faboĝermoj, kimĉio el ĉina brasiko, kimĉio el granda blanka rafano, maceritaj sezamfolioj, maceritaj verdaj cepotigoj, rafanofolioj en akvo, folioj de sovaĝaj montaj plantoj kaj krudaj verdaj aŭ ruĝaj laktukofolioj. Krom tio kelkfoje troveblas ankaŭ stufitaj fungopecoj maldike tranĉitaj kaj oni povas meti ankaŭ ilin en la manĝaĵon.

Kimĉio, la ŝatata korea acidaĵo ĉiam troveblas surtable, tion multaj koreoj manĝas al ĉiuj manĝoj matene, tagmeze kaj ankaŭ vespere. Ĝi estas farata per peklado de legomoj per salo. La kimĉioj faritaj el ĉinaj brasikoj aŭ rafanoj havas diversajn gustojn, eĉ varias la gusto laŭ la tranĉo-formo. Kaj ankaŭ varias la gusto laŭ la aldonitaj legomoj (ekzemple verdaj aŭ ruĝaj kapsikoj, fungoj, ktp.) kiujn oni aldonas al la brasikoj kaj rafanoj.

Ŝajnas al mi, ke en la monaĥejo la kimĉio farita el rafano-strioj enhavas pli da zingibro kaj la alia, kiu estas farita el ĉina brasiko enhavas iom pli da kapsiko kaj ajlo. Koreoj opinias tion tre variaj, ĉar la menciitaj aldonajoj ŝanĝiĝas je ĉiu manĝo kaj ili mem povas decidi kion ili manĝu en diversaj tagoj.



Malgranda preĝejo en la Silsangsa

Krom bibimbap oni preskaŭ ĉiutage manĝas ankaŭ tason da ia supo en la monaĥeja manĝejo. Ĝis nun mi vidis tri diversajn supojn sur la servotablo. Inter ili la fabĝermo-supo estis la plej bongusta por mi. Tion ankaŭ mi ŝatas, mi ĉiam gustumas ĝin kiam mi trovas tiun supon sur la tablo. La dua supo estas la maralĝo-supo, mi prenas nur foje-foje duonan tason da tio. Ĉar en Hungario manke de maro en mia infanaĝo mi ne al kutimiĝis al tiaj interesaj manĝaĵoj. La tria ofta kaj populara supo estas ia peklita kaj longe fermentita fab-odora supo. Kvankam ĝi estas tre ŝatata en la fora oriento, mi eĉ ĝian odoron ne ŝatas. Mi memoras, ke mi vidis similajn longe fermentitajn fabojn ankaŭ en Japanio kaj ĝia nomo japane estas „*natto*”. Kiam mi estis studento de la Nanzan Universitato en Japanio en la okdekaj jaroj tiam unu el la unuaj frazoj kiujn mi ellernis en la japana lingvo estis, ke „*Natto wa oishiku nai to omoimasu*” (Mi ne ŝatas natton.)

Mi vidis en Japanio kiel oni faras natton. Oni trempas fabojn kaj pekligas ilin ĝis ĝi fariĝas densa, gluema, salivoza manĝaĵo. Ĝi glu-gutas malbele kaj havas strangan odoron. Simile kiel en Eŭropo la tro longe fermentitaj kaj malbonodoraj fromaĝoj, kiujn multaj homoj ŝatas kaj trovas ilin saniga dum aliaj eĉ ilian odoron ne povas toleri.

Vidinte tiujn manĝaĵojn mi jam komprenis pli bone kial surpriziĝis miaj koreaj gastoj en Budapeŝto kiam mi donis al ili matenmaĝi salamon kun buterita bulko kaj bonodora nigra teo. Tiu manĝaĵo estas kutima matenmanĝo en Eŭropo, sed por koreoj tio havas tute nekutiman guston. Tio estas tro riĉa kaj energioplena manĝaĵo por ili kaj ilia stomako ne al kutimiĝis al tio. Mi jam sciis pli frue, ke orientazianoj ne povas digesti la laktosukeron, tial ili ne trinkas lakton kaj kakaon, sed mi jam vidas, ke ankaŭ niajn dolĉajn eŭropecajn teojn ili ne ŝatas trinki.

Por koreoj teo signifas la amargustan verdan teon, kion oni trinkas sen dolĉigilo laŭ natura gusto. Teotrinkado en fora oriento havas grandan tradicion kaj la tieaj homoj povas distingi tre multajn diversajn verdajn teospecojn. Por mi tiuj ŝajnas esti samgustaj, sed por koreoj inter ili povas esti tre grandaj diferencoj.

Foje mi vizitis korean familion kie la familiestro mem preparis speciale brogitan dudek kvin jaran ĉinan teon, kiu kostis dumil dolarojn po 357grama pakaĵo Mi ne volis malkaŝi mian neinformitecon pri teokulturo kaj mi ne menciis, ke por mi la kelkdolaraj anglaj teoj kun mielo ŝajnas havi pli bonan guston.

Mi kondukis preskaŭ kiel mia hungardevena amiko loĝanta dum multaj jaroj en Svedio, kiu fariĝis tie posedanto kaj direktoro de bone prosperanta industria entrepreno. Iam li invitis sian patron el malgranda hungara vilaĝo por montri al li kia estas la vivo en la fora Skandinavio. La patro alvenis kaj la filo volis doni al li iun tre multekostan mondfaman francan vinon. Post tagmanĝo la filo demandis la patron ĉu plaĉis al li tiu unika kaj multekosta fama franca vino. Tiam la patro respondis dece, ke ĝi estis ne malbona, sed la lokaj vinoj ĉe sia hejmvilaĝo en Hungario estis pli bongustaj.

Poste la filo serĉis ankoraŭ aliajn multekostajn kaj tre famajn rejnajn, hispanajn kaj italajn vinojn, sed la patro daŭre opiniis, ke siaj lokaj vinoj kiujn oni produktis en Csepreg, en sia hejmvilaĝo tamen estis pli bongustaj. La filo rakontis tion al siaj amikoj en Svedio kaj ili proponis al li ke li aĉetu la plej malmultekostajn ordinarajn vinojn. Li faris tion kaj tio pleje plaĉis al sia patro: „*Vidu, filo, ĝi estas vere bongusta.*” - diris al li fine kontente la maljuna patro.

Krom la teoj mi havas similajn spertojn ankaŭ rilate al la koreaj manĝaĵoj. La akragustaj ekzotikaj manĝaĵoj estas vere interesaj kaj bongustaj dum kelkaj tagoj, sed dum semajnoj manĝi la samon mate ne, tagmeze kaj vespere estas tro monotona por mi. Kaj en la monaĥejo kaj la universitato ni manĝas ĉiutage bibimbapon, kaj nur tio farigas la manĝojn iom variaj ke kelkfoje estas ankaŭ sekigitaj algofolioj sur la tablo. En koreaj restoracioj tiuj estas ĉiutagaj partoj de la manĝaĵoj, sed en la monaĥejo tiuj ne estas ĉiutagaĵoj, ili estas maloftaj frandaĵoj.

En la fora oriento oni kutime metas rizon en tiujn algofoliojn kaj oni metas tiujn volvitajn rizobulojn en la buŝon. Ĉar ni ne ricevas sekigitan algon ĉiutage en la Silsangsa manĝejo, tial la lokaj homoj ofte metas la rizon en krudajn laktuko-foliojn aŭ stufitajn sezamajn foli-

ojn. Unufoje semajne estas ankaŭ kareo en la manĝejo de la monaĥejo, sed koreoj manĝas ĝin nur aldone al la bibimbap. Sed por mi gravas, ke mi ne manĝu ĉiutage la samon kaj pro tio en tiuj tagoj mi metas neniun legomon en la rizon. Do en tiuj tagoj mi ne manĝas bibimbapon sed nur kareon kun rizo.

En Koreio la bibimbap estas ne nur konkreta manĝaĵo, sed tuta aro da diversaj manĝaĵoj. Depende kiujn aliajn aldonajojn oni metas en la kuiritan rizon, la manĝaĵo havas diversajn nomojn. La plej popularaj estas:

- 회 비빔밥 (hói bibimbab – bibimbap kun kruda fiŝo),
- 김치 비빔밥 (kimchi bibimbab – bibimbap kun kimĉio),
- 새싹 비빔밥 (saessak bibimbab – bibimbap kun maldikaj, tigaj, junaj ĝermoj),
- 열무 비빔밥 (yeormu bibimbab – bibimbap kun junaj legomoj),
- 콩나물 비빔밥 (kongnamul bibimbab – bibimbap kun tute kreskintaj ĝermoj), kaj la
- 전주 비빔밥 (Jeonju bibimbab – bibimbap laŭ maniero de urbo Jeonju).

En tiu jaro mia naskiĝtago estis samtage kun la naskiĝtago de Budho. Tial la studentoj proponis, ke ni festu mian naskiĝtagon unu tagon pli frue, ĉar en la naskiĝtago de Budho ili faros diversajn servojn en la monaĥejo kie okazos tiutage tuttaga festivalo. Je mia naskiĝtago la studentoj preparis specialan, tradician naskiĝtagan vespermanĝon kiu estis maralgo-supo kaj bibimbap.

Sed nun la ingrediencojn de la bibimbap oni ne metis en grandajn potojn sur la manĝobreton, kiel kutime en aliaj tagoj, sed ĉiuj aĵoj (ĝermoj, kimĉioj el ĉina brasiko, kaj el blanka rafano kaj sekigitaj etaj fiŝoj) estis en apartaj elegantaj, etaj potoj sur la festa tablo. Post la vespermanĝo ni iris al la prelegejo kie jam brulis la naskiĝtagaj kan-

deloj sur mia festa torto. Mi blovis la kandelojn dum kantado de „*Happy birthday to you*”.

Tiun kanton la studentoj kantis angle kaj koree kun gitaro, ĉar venis al la festo ankaŭ gitaristo el proksima vilaĝo kun sia filo. La filo amuzigis la publikon per magia prezento. En la manĝejo de la monaĥejo ne troveblas tranĉilo kaj forko, tial ni laŭ korea maniero manĝis la fragotorton kun laktoŝaŭmo per manĝobastonetoj.

Mi pasigis la venontan tagon en la Silsangsa. Tie plurcent homoj partoprenis diversajn ceremoniojn. La partoprenantoj ricevis senpagan tagmanĝon, kompreneble bibimbapon, same kiel okazas en la monaĥejo ĉiutage. La diferenco estis nur, ke la manĝaĵoj ne estis konservitaj sur la servotablo, sed ili jam estis dozitaj en telerojn al la homoj kiuj atendadis la tagmanĝon en plurcent metra longa vico.



La lotuso estas populara planto en Orient-Azio. Partoj de la planto kaj ankaŭ ĝiaj semoj estas manĝeblaj kaj bongustaj

La venontan tagon post la naskiĝtago de Budho mi veturis per buso al Hamyang, kie mi ŝanĝis al alia buso por vojaĝi al Busan, grandurbo ĉe la bordo de la Orienta maro. En Eŭropo multaj homoj uzas la vorton „*Japana maro*” por tiu maro, sed tio tute ne plaĉas al la koreoj. Ili ne komprenas ke la maro ĉe la korea marbordo kiel ne nomiĝas „*Korea maro*”. En urbo Busan mi faris modellecionon por la studentinoj de knabina supermezlernejo 중앙여자고등학교 (Jungang Yeojagodeung Hagkyo).

Sed verdire mi volis iri al la ĉemara urbo ne nur pro lingvoinstruado. En Eŭropo se ni la trian tagon manĝis la samon, tiam ĝi estis iom enua por ni, sed ĉi tie en Koreio mi manĝis bibimbapon en la lastaj tridek tagoj almenaŭ okdek foje. Kvankam temis pri diversaj bibimbapoj, kiujn oni faris el diversaj ingrediencoj. Tial mi pensis, ke estus jam bone por mi gustumi ankaŭ aliajn mangaĵojn. Mi sciis, ke Busan estis plena de eŭropecaj „Paris Baguette” bakejoj, italecaj picejoj, KFC-rapidrestoracioj kun rostitaj kokaĵoj kaj en la marborda fiŝmerkato oni rostas antaŭ niaj okuloj la plej bongustajn vivantajn fiŝojn.



Onidire ankaŭ la koreaj penisofiŝoj estas tre bongustaj. Ili abundas en la Jagalchi fiŝmerkato en Busan

Kiam nia aŭtobuso alvenis al la busana finhaltejo, tiam mi tuj promenis al metrohaltejo Sasang. En Koreio unueca loka trafika sistemo funkcias en la tuta lando, tial mi povis uzi mian seulan vojaĝkarton ankaŭ en Busan. Pro tio mi ne devis zorgi pri biletaĉeto. Mia unua vojo estis al Jagalchi, la fama fiŝmerkato, kie ĉio estis la sama kiel mi vidis lastfoje. Mi vidis la samajn silkvermajn krizalidojn stufitajn en bruna saŭco apud rostitaj dolĉterpom-stangetoj en la bone konata vojkruciĝo kaj antaŭ la budo kie oni vendis dolĉajn kukojn estis same longa vico kiel mi spertis antaŭ kelkaj monatoj, kiam mi estis tie en la sama loko.

Ankaŭ la glaciaĵejo kie oni vendis 32 centimetran longan glaciaĵon fukciis en sia kutima loko, tie mi ankaŭ nun aĉetis du bulojn da vanilo-ĉokolado glaciaĵo. Poste mi iris al la marbordo, kie mi povis aĉeti duon-, aŭ trionpreze melonon ol en urbeto Inwol proksime al mia Silsangsa monaĥejo. Estas preskaŭ nekredeble, ke en la preskaŭ samgeografia loko kiel Hungario oni povas aĉeti melonon kiujn oni kreskigis sub folioj jam en aprilo kaj majo, do en la tempo kiam la arbofolioj eĉ ne aperas en la ĝardenoj..



Krizalidoj de silkvermoj en bruna saŭco

Verdire tiuj melonoj estas tre malgrandaj, sed ilia gusto estas same dolĉa kiel la aliaj melonoj kiuj maturiĝas kutime meze de somero. Poste mi aĉetis aron da dolĉa terpomo por kuiri ion freŝan, kiam en pluvaj tagoj mi ne povos trairi al nia monaĥeja manĝejo por tagmanĝi. En la fiŝmerkato ankaŭ nun rostis virinoj freŝajn fiŝojn antaŭ niaj okuloj. Ili provis konvinki ankaŭ min eksidi kaj gustumi la freŝe rostitajn bongustaĵojn. Sed nun mi ne volis gustumi ilin, ĉar mi sciis, ke mi baldaŭ vespermanĝos kun la membroj de la loka Esperanto-klubo kaj en mia maljuna aĝo mi ne povus dufoje tagmanĝi aŭ vespermanĝi

Mi renkontis kun Oh Gisuk, mia malnova busana amikino kaj mia nuna gastiganto en metroohaltejo 동래역 (prononcu: Dongné) en la planita tempo. Ŝi havis grandan fragotorton kun laktoŝaŭmo en siaj manoj. Ŝi diris, ke tiutage oni festis la tagon de gepatroj kaj oni planis festi ilin per tiu torto. Poste aperis ankaŭ aliaj membroj de la loka Esperanto-klubo kaj ni iris kune al proksima restoracio por festi nian denovan renkontiĝon.

En la restoracio mi eksciis, ke mi ion miskomprenis, ĉar ili volis festi ne la gepatrojn, sed min. Ĉar ili iel eksciis, ke ankaŭ mi havis naskiĝtagon dum tiu semajno. Sed ne nur mi miskomprenis la aferon, sed ankaŭ la dolĉaĵisto, ĉar li ne metis kandelojn sur la torton. Eble li ne faris tion, ĉar tiutage kutime ĉiuj mendis torton por la geapatra festo. Do ni manĝis la torton sen kandeloj, dum la klubanoj kantis esperantlingve la popularan kanton „*Gratulon al vi*” laŭ la melodio de „*Happy birthday to you*”. La torton – pro manko de forkoj - ankaŭ tie ni manĝis per manĝobastonetoj.

Nia komuna programo ne finiĝis per la tortomanĝado, ĉar la klubanoj invitis min ankaŭ al vespermanĝo. Sed unue Oh Gisuk petis min ke ŝi pagu mian vespermanĝon okaze de mia naskiĝtago, do mi estu ŝia gastulo. Mi nun ĝoje akceptis tion, sed en aliaj kazoj mi ĉiam nepre volas pagi mem mian manĝon. Kaj por helpi min ke mi havu bonan apetiton al la vespermanĝo ili ĝoje diris al mi, ke en tiu restoracio oni metas ankaŭ sekigitan maralgon en la manĝaĵon, do mi havos unikan eb-
lon por manĝi speciale bongustan bibimbapon...

LA MORTO DE ZAMENHOF

En la tuta mondo oni memorfestas la naskiĝtagon de Zamenhof, la kreinto de esperanto. Sed ĉi-tie en la Fora Oriento mi vidis la unuan fojon, ke ne nur la naskiĝtagon, sed ankaŭ la mortotagon de la iama pollanda juda okulkuracisto oni memorfestas. Por tiu evento en tiu jaro oni organizis memorkunsidon en la Centro de Korea Esperanto-Asocio al kio oni invitis min kiel preleganto.

Tial unu semajnon post mia alveno al la Silsangsa en la Jirisan (Ĝiri montaro) mi devis reveturi al la ĉefurbo. Sed surprize tio ne estis tiom facila ol mia antaŭsemajna veturo de Seulo al la Jirisan. Ĉar mi povis veturi ĉi-tien per komforta, rekta buso el la busstacio Dong Seoul (Orienta Seulo) apud metroostacio Gangbyeon (Riverbordo). De la ĉefurbo eblas veturi per rekta buso al la Silsangsa, sed ĉi-tie mi eksciis, ke de la Silsangsa ne eblas reiri al Seulo en la sama maniero.

Mi ne povis kompreni tiun strangan situacion dum multaj monatoj, sed poste niaj studentoj klarigis la aferon al mi. En tiu aŭtobuso ne eblas aĉeti bileton en la aŭtobuso, do oni devas aĉeti la biletojn kaj rezervi seĝon en stacidoma biletvendejo. La vojaĝantoj povas fari tion en Seŭlo, sed ne en la Silsangsa haltejo, ĉar tie ne funkcias biletvendejo. Tamen eblas aĉeti bileton ankaŭ per interreto kaj en tiu kazo la ŝoforo ricevas informon de sia oficejo ke li haltu apud la Silsangsa por akcepti vojaĝanton.

Sed ne tiu malfacilaĵo estis la sola problemo por vojaĝi al Seulo, sed almenaŭ la unuan fojon mi havis ankaŭ alian problemon. Tio estis, ke ne estis facile trovi la bushaltejon apud la Silsangsa. Ĉi-tie ne nur bushaltejo ne troviĝas, sed eĉ tabulo ne montras kie devus halti la buso. Kvankam al la ĉefurbo ne iras busoj de ĉi-tie (sen antaŭa interreta biletaĉeto), sed regule iras loka buso al proksima vilaĝo (aŭ urbeto) Inwol, kiu trafikas ĉiuhore.

La lokuloj scias, ke la loka buso al Inwol haltas antaŭ eta vendejo, sed tion montras neniun ŝildo. Oni diris al mi en la universitato, ke mi povas veturi per buso al Inwol je la 8:05 matene, kie mi trovos alian busstacion. Tie mi povos aĉeti bileton al Seulo kaj tie mi povos ŝanĝi

al la Hamyang Jirisan Express Buso por revojaĝi al la ĉefurbo. Tie en la suda parto de Koreio praktike neniu parolas eŭropajn lingvojn kaj la surksriboj en la busoj estas skribitaj nur per koreaj hangul signoj.



Estas do iom malfacile veturi de la Silsangsa al la ĉefurbo, ĉar oni devas ŝanĝi la buson de la loka sistemo al aŭtobuso de longdistanca bus-entrepreno. Sed ankaŭ en Seulo estas problemo rilate al la biletaĉeto al la Silsangsa. Ĉiufoje kiam mi volis aĉeti bileton en la Dong Seoul Bus Terminal, mi pagis diversajn prezojn. Tial mi pensis, ke ankaŭ la biletvendistoj ne sciis la prezojn. Tial venontfoje mi skribis en korea lingvo per hangul literoj de kie al kien mi volis veturi, sed ankaŭ tio ne helpis.

La biletvendistino ankaŭ nun kalkulis pli altan prezon ol la kutima tarifo. Kiam mi diris, ke laŭ mi ŝi kalkulis malbone, tiam ŝi sendis min al la informejo. Tie la deĵoranta oficisto longe serĉadis per sia komputilo kie estas la Silsangsa kaj resendis min al la bileta giĉeto, dirante, ke ili pravis pri la pli alta prezo. Mi reiris al la biletvenda giĉeto, sed nun sidis tie alia vendisto, kiu ne sciis pri la antaŭa kalkulo kaj donis al mi malpli kostan bileton. Por eviti similajn postajn diskutojn


mi decidis konservi tiun bileton ĉiam ĉe mi por montri al la biletvendistoj kian bileton mi volos havi denove.

La centro de Korea Esperanto-Asocio estas proksime al metroohaltejo Mapo, ĉe la bordo de rivero Han, en la 16-a etaĝo de moderna nubskrapulo. La asocio posedas la oficejon, tra ĝiaj panoramaj fenestroj oni povas bone rigardi la pulsantan vivon de la dekmiliona mondurbo. En la interna zono de Seulo vivas tiom da homoj kiom en tuta Hungario. Kun siaj antaŭurboj la metropolo havas 25 milionojn da loĝantoj.

La memorkunveno okaze de la mortotago de Zamenhof komenciĝis per kantado de la Himno de Esperanto, kies tekston verkis Zamenhof mem. Poste ni honormemoris la lastatempe forpasintajn membrojn de la korea esperanto-movado kaj oni laŭtlegis la mesaĝon de la prezidanto de la asocio. Poste sekvis la konatigo de biografio de Zamenhof. Ni povis aŭdi, ke la kreinto de la internacia lingvo naskiĝis en pollanda juda familio la 15-an de decembro 1859 en urbo Bialystok, kie la vivon de judoj malfaciligis, ke en tiu tempo tiu parto de Pollando apartenis al Ruslando.

Kvar nacioj vivis en la urbo unu apud la alia kaj la gepatraj lingvoj de tiuj grupoj estis la germana, la pola, la rusa kaj la jiddis. Tiuj nacioj ne tre ŝatis unu la alian kaj la diversaj grupoj jam infanaĝe disiĝis kaj mokis unu la alian surstrate. La naskiĝnomo de la eta Zamenhof estis Eliezer Levi Samenhof, sed la rusa administracio registris lin per la ruslanda kutimo laŭ patronomo en la oficialaj dokumentoj. Laŭ tio la oficiala nomo de la kreinto de Esperanto estis Lazar Markoviĉ Zamenhof, cirile: *Лазаръ Маркович Заменгофъ*.

La humanisma pensmaniera Zamenhof jam en sia studenta aĝo revis pri la kaŭzoj de la malamikaj rilatoj inter popoloj. Li vidis, ke la diversaj homgrupoj vivis en similaj cirkonstancoj, manĝis similajn manĝaĵojn, havis similajn problemojn kaj nur unu afero distingis ilin: la alia lingvo. Tial li pensis, ke la enkonduko de komuna lingvo eble helpus la pli bonan komunikadon inter la diverslingvaj homoj, kaj tio helpus ankaŭ la kreon de pli paca mondo.



Zamenhof-portreto en la Esperanto-kastelo en Gresillon

Tial li ellaboris la facile lerneblan, simplan kaj logikan artefaritan lingvon, kiun li nomis „*lingvo internacia*”. La unua lernolibro de la nova lingvo aperis en 1887 ruslingve, kiun baldaŭ sekvis eldonoj en aliaj lingvoj. Kiel aŭtoro li aperigis ne sian propran nomon, sed li uzis pseŭdonomon D-ro Esperanto (homo kiu esperas). Tiu vorto tiom ligiĝis al la lingvo mem, ke poste ĝis hodiaŭ oni nomas la lingvon mem laŭ tiu nomo en la tuta mondo. La nomo de la kreinto estas konata esperantlingve „*Ludoviko Lazaro Zamenhof*.”

Post la apero de la unuaj lernolibroj la internacia lingvo rapide disvastiĝis en la mondo. Esperanto-kluboĵi fondiĝis unu post la alia en diversaj landoj kaj plirapidiĝis la eldonado de esperantlingvaj libroj kaj revuoj. La unua internacia Esperanto-mondkongreso okazis en 1905 en la franclanda urbo Boulogne-sur-mer. Poste la tuj eksplodinta mondmilito malhelpis la disvastigon de la lingvo kaj ankaŭ la disvastigon de la pacifisma kaj filantropa pensmaniero. En tiu etosa epoko mortis la kreinto de Esperanto la 14-an de aprilo 1917 en Varsovio. Pri tiu dato ni rememoris nun en la korea ĉefurbo.

Post la festparolo oni petis min koncize prelegi pri miaj vojaĝspertoj en sud-orientaj landoj, en kiu mi parolis pri agadoj de vietnama kaj sud-ĉina esperanto-asocioj. Mi ĝoje konstatis, ke mian prelegon aŭskultis ankaŭ lingvista akademiano. Laŭ li mi uzis en mia prelego nur unu malĝustan vorton kaj miaj aliaj diritaĵoj estis klaraj kaj bone kompreneblaj. Mi speciale ĝojis pri tio, ĉar mi ĉiam ŝatas paroli libere, sen papero. Tio eble pliigas la ŝancon erari, sed mi spertas, ke la aŭskultantoj povas sekvi min pli bone ol samtone legante tekston sur papero.

Poste komenciĝis komuna fotado, kaj post la festo ni iris al proksima ĉina restoracio, kie ni esceptokaze manĝis ne bibimbapon, sed akragustan ĉinan nudelosupon kun multe da legomoj kaj kun la populara kimĉio kiu estas trovebla en ĉiuj restoracioj en Koreio. Ni finis la tagon per tiu bankedeca vespermanĝo je la naŭa horo vespere kaj poste mi promenis de tie al mia gastejo inter la 40-50-etaĝaj nubskrapuloj apud metrohaltejo Mapo.

LINGVOINSTRUADO EN OK LERNEJOJ

La novaĵo pri mia sukcesa lingvoinstruado en la 인드라마대학 (Indramamang Universitato) rapide disvastiĝis kaj evidentiĝis, ke per mia instrumentado la studentoj povis rapide progresi kaj atingi okulfrapajn sukcesojn. Pro tio mi ricevis petojn unu post la alia por fari prelegojn kaj gvidi parolkapablajn kursojn ankaŭ en aliaj universitatoj kaj altlernejoj. Eĉ ankaŭ en la ĉefurbo, en la centro de KEA (Korea Esperanto-Asocio) oni petis min fari deksemajnan kurson por progresantoj, do por la membroj de la seula filio de KEA.

Utiligante mian restadon en Seulo Oh Soonmo (Brila) proponis al mi, ke ankaŭ en sia elementa lernejo, en la 수송 초등학교 (Susong Chodeung Hagkyo) mi provu instrui per tiu speciala parolkapablo-evoluiga metodo. La rezultoj ankaŭ tie estis surprize bonaj, la lernantoj jam post la unua studhorro povis flue paroli per kelkaj simplaj frazoj pri sia vivo kaj pri sia lernejo. Tial mi interkonsentis kun la ĝenerala sekretario de KEA por fari similan kurson por komencantoj ankaŭ en la centro de KEA. Simila instruado ĝis nun ne ekzistis, antaŭe alia organizo, la Seula Esperanto-Kulturcentro gvidis lingvokursojn en sia oficejo en Myeongdong.

Poste oni petis min ke per specialaj prelegoj mi donu motivojn por lerno de fremdaj lingvoj al la studentoj en Iksan, proksime al la Flava maro en la fama 원광대학교 (Wonkwang Universitato), same kiel en la Seula kampuso, kaj ankaŭ en la Suwona Kampuso de la 경희 대학교 (Kyunghee Universitato). Urbo Suwon estas 25-30-km-ojn for de Seulo en la sudo. Tiuj universitatoj estas multe pli grandaj kaj famaj ol mia nove fondita Indramang Universitato, kiu nun funkcias kiel alternativa universitato. En la Wonkwang Universitato ekzemple studas 25 mil studentoj en la medicina, jura, socioscienca, ktp. fakultatoj. Pluraj el tiuj studentoj fariĝis tre famaj personoj en la lastaj jardekoj. Ekzemple Shin Joon-Sup gajnis oran medalon en la opimpikaj ludoj en 1984.

Krom tiuj kursoj mi ne havis multe da libera tempo por gvidi pliajn lingvokursojn, tial dum la nuna periodo de mia restado mi ne povas

iri al Dankook Universitato por prelegi. Sed pro nostalgio mi tamen akceptis escepte instrui en Busan, ĉe la Orienta maro (kiu en Eŭropo estas konata kiel Japana maro), en la 중앙여자고등학교 (mallonge: 부산 중앙여고, per latinaj literoj: Busan Jungang Yeogo) kiu estas knabina altlernejo, aŭ supermezlernejo laŭ la usona lerneja sistemo.

Ĉio tio rezultis, ke mia vivo tute ne estis unuflanka kiel mi imagis komence, aŭ kiel multaj homoj supozus pri la monaĥeja vivo. Dum la universitata semestro mi praktike ĉiam vojaĝadas inter la Ĝiri montaro kaj la ĉefurbo kaj inter la Ĝiri montaro kaj la suda marbordo. Tial estiĝis necese por mi, ke dum mia restado en Seulo mi rezervu ĉambron en gastejo por tranokti.



Park Yongsung, vicprezidanto de KEA kun eŭropaj esperantistoj

Miaj koreaj amikoj proponis konatan hotelon al mi, por ke mi tranoktu tie, kiam mi estos en Seulo en la venontaj monatoj. Ĝi estis tradicia korea hotelo, kie la gastoj dormis surplanke, kaj ricevis korean aŭ eŭropan matenmanĝon laŭdezire. Ne estis facile trovi la hotelon, kvankam la unuan fojon ankaŭ An Jinsim, mia malnova korea amikino venis kun mi. Mi jam eĉ ne surpiziĝis, ke du domojn apude neniu sciis kie tiu hotelo estis..

Mi demandis multajn homojn kiujn mi renkontis proksime, sed neniu el ili sciis, kie la hotelo troveblis. Ili ĉiuj demandadis unu la alian pri la loko de la hotelo, sed ili ne trovis ĝin eĉ en la interreto. Kiel estas konate, en la Fora Oriento la stratoj ne havas nomojn kaj la domoj ne havas numerojn. Tial antaŭ ekiro mi faris skizan mapon kaj mi indikis la gravajn ejojn (bankojn, bakejojn, lignajn dometojn, ktp.) sur la skizo. Laŭ tiu skizo mi sciis, ke la hotelo devis esti ĉi tie en la proksimo. Pro tio mi ekpromenis en la ĉirkaŭaĵo kaj surprize mi, alilandano pli rapide trovis la hotelon ol la koreoj, kiuj loĝis en la proksimaj lokoj.

Post mia alveno al la hotelo mi tuj volis pagi la loĝkostojn kaj la rezervokostojn por la venontaj fojoj, kiuj estis 50%-oj de la prezo. La oficistino ne volis akcepti tion, ĉar ŝi ne komprenis kial mi volis pagi nur la duonon de la prezo. Mi diris, ke mi trovis tiun informon en la anglalingva hejmpaĝo de la hotelo, kaj laŭ tiu informo 50% de la prezo estas la rezervokosto de ĉambro. Ŝi diris, ke ŝi sciis nenion pri tio kaj ŝi legis neniam tiun hejmpaĝon. Ni serĉis komune per ilia komputilo la hejmpaĝon de la hotelo kie ŝi legis surprize pri tiu 50%-antaŭpago.

Intertempe la virino afable invitis min trinki diversajn malvarmajn trinkaĵojn kaj manĝi freŝajn fruktojn, eĉ tagmanĝon ŝi ofertis al mi. Sed pro miaj malbonaj spertoj mi diris, ke mi ne plu havis emon tranokti tie en la venontaj monatoj. Tial, ĉar ĉi tie ĉio estis malcerta kaj nenio funkciis, kiel estas skribita en la hejmpaĝo de la hotelo. Mi rigardis en mia komputilo ĉu estis libera ĉambro en mia ĝisnuna hotelo kaj mi vidis kun ĝojo, ke estis. Pro tio mi tuj rezervis ĝin por la venontaj monatoj kaj tiel mi decidis tranokti en mia kutima loko ankaŭ en la estonto dum miaj seculaj restadoj.

Post kelkaj semajnoj mi tamen devis nuligi ankaŭ tiun ĉambrorezervon dum pluraj semajnoj. La efiko pri miaj sukcesaj kursoj rapide disvastiĝis en la lando. Tial oni invitis min, ke mi gvidu ankaŭ anglalingvan ekzercokurson por la studentoj de la 실상사 작은학교 언니네 (Silsangsa Jakeun Hagkyo Eonnine). Tio estis populara supermezlernejo proksime al la Silsangsa templo en la Jirisan.

Mi akceptis tiun taskon kun ĝojo, sed mi vidis, ke instrui en diversaj lokoj estus malfacile organizebla. La distanco inter Seulo kaj la Jirisan estas pli ol tricent kilometroj kaj la vojaĝtempo estas pli ol kvin horoj. Laŭ la studplano de la Silsangsa Jakeun Hagkyo mia leciono estis antaŭtagmeze, sed mi finis mian kurson en Seulo nur je la naŭa horo vespere en la antaŭa tago. Dum la antaŭaj semajnoj post la fino de mia seula kurso mi agrable promenis al mia proksima hotelo en Mapo kaj tie mi bone dormis dum la nokto. Matene mi aĉetis freŝan, varman bakaĵon en la proksima Paris Baguette bakejo kaj poste veturis per la Jirisan-Hamyang Ekspres Aŭtobuso al la Silsangsa el la dong-seula busterminalo



La Indramang flago. La suno, luno, planto, fiŝo, besto kaj homo simbolas la tutan universon

Tiu buso alvenis kutime nur posttagmeze al la Ĝiri-montaro. Por povi fari la antaŭtagmezan kurson en la Silsangsa supermezlernejo mi devis nuligi mian ĉambrorezervon en mia seula hotelo kaj mi devis veturi per nokta buso tuj post la fino de mia instruado en Seulo. Tiu buso kutime alvenis matene ĉirkaŭ je la kvara horo al la Silsangsa monaĥejo, kiam mi tute ne havis emon supreniri al mia kampusa loĝejo tra la malluma arbaro kie abundis serpentoj. Tial la gvidantoj de la lernejo aranĝis, ke en tiuj tagoj mi povis tranokti en unu el la gastĉambroj de la monaĥejo post la longa busveturo.

Mi povis organizi mian instruadon en la Silsangsa Jakeun Hagkyo marde tiamaniere, sed mi konstatis, ke ĵaŭde antaŭtagmeze eĉ per noktobusa vojaĝo mi ne povus instrui en la Jirisan. Merkrede mi kutime finis mian Esperanto-kurson en la knabina altlernejo en Busan je la sesa kaj duono vespere kaj post tiu tempo tute ne eblis revojaĝi al la Jirisan eĉ per veturo en nokta buso. Tial la estraro de la Silsangsa Jakeun Hagkyo akceptis, ke oni ŝanĝu la studhorojn kaj mi gvidu la anglan kurson ĵaŭde posttagmeze en la resto de la studjaro dum mia restado en Koreio.



La malnova lanterno kaj la pagodoj en la Silsangsa estas registritaj naciaj kulturaj heredaĵoj de Koreio

Dum mia restado mi okupiĝis ne nur pri instruado de eŭropaj lingvoj en diversaj lernejoj, sed mi kutime prelegis ankaŭ en diversaj ekonomikaj kaj sociosciencaj konferencoj en la ĉefurbo. Kadre de tiuj prelegoj mi faris superrigardon pri la eŭropa historio kaj ene de tio mi iom pli detale analizis la lastajn mil jarojn de la hungara historio. Tiel estis komprenebla por orient-azia popolo dekmil kilometrojn for de Eŭropo, kiel okazis, ke Koreio povis vivi en alte evoluita industria socio, sed la evoluogrado de Orienta Eŭropo (kaj ene ankaŭ Hungario) estis signife malpli alta.

En la prelegoj mi kutime montras, ke Hungario dum reĝo Mátyás estis forta kaj granda lando kaj la nombro de ties loĝantaro estis proksimume samgranda kiel la loĝantaro de Britio. Sed pro la malfavoraj historiaj cirkonstancoj la situacio de Hungario (kun multaj aliaj orient-eŭropaj lando) signifecce ŝanĝiĝis dum la lastaj kvincent jaroj. La rezulto de tiu ŝanĝo estis ke Hungario malfortiĝis kaj Okcidenta Eŭropo plifortiĝis. En la jaro 1492 Kristoforo Kolombo malkovris Amerikon kaj sekve de tio okcidenta Eŭropo konstruis grandegan kolonian sistemon. Onidire en la imperio de la hispana reĝo neniam iris suben la Suno, sed ankaŭ angloj, portugaloj, francoj, nederlandanoj kaj belgoj okupis kaj koloniigis grandegajn teritoriojn en Azio, Afriko, Aŭstralio kaj Ameriko. Poste dum jarcentoj venis amaso da mono kaj krudmaterialo el tiuj kolonioj al Okcidenta Eŭropo.

Dum tiu tempo Orienta Eŭropo kaj ene Hungario devis militi kontraŭ la Turka Imperio, kies rezulto estis 150-jara turka regno en granda parto de la lando. Intertempe la loĝantaro malpliiĝis, la ekonomio regresis kaj la etna proporcio de la lando ŝanĝiĝis.

Hungario dum 150 jaroj provis defendi sin kaj ankaŭ Okcidentan Eŭropon kontraŭ la Turka Imperio en longaj, sangaj bataloj kaj samtempe Okcidenta Eŭropo plifortiĝis kaj konstruis mondajn imperiojn. Hungario malfortiĝis dum la turkaj bataloj kaj poste falis sub la kontrolon de la Habsburga Imperio por 400 jaroj. Dum tiu tempo kaj el Hungario, kaj el aliaj orient-eŭropaj partoj de la imperio oni portis la monon, manĝaĵojn kaj krudmaterialojn al Vieno, la ĉefurbo de la nova imperio.

En la du mondmilitoj la Habsburga Imperio kaj ankaŭ Hungario kiel ĝia parto troviĝis inter la malgajnintoj kaj tion sekvis kvardekjara ne mem elektita komunisma periodo. Fine de tiu epoko, do en la 1990-a jaro la lando havis multajn ŝuldojn kaj la produktitaj varoj estis grandparte nevendebaj en la monda merkato. Tiutempe la eksterlanda ŝuldo iom superis 20 miliardojn da dolaroj.




Esperanto klaso de Chorok Gang en la budapesta Reĝa Palaco

Post la reĝimoŝanĝo la situacio pli malboniĝis en multaj sencoj. Kadre de privatigo granda parto de la ŝtata havaĵo falis en manojn de proksimumoj al la potenco sub la reala prezo, ofte eĉ tute senpage. Estis multaj manieroj kiel oni privatigis la ŝtatan havaĵon. Pri iu fifama kazo siatempe la gazetaro skribis dum monatoj. Tiam la posta ĉefministro aĉetis valoran ŝtatan feriejon ĉe lago Balatono tiel, ke samtempe la ŝtato reluis la domon sampreze kiom la vendo kostis. Finrezulte neniu pagis al neniu, do la posta ĉefministro ricevis la valoran domogon tute senpage. Kvankam tiu kazo havis grandan reeĥon en la gazetaro, ne tio estis la sola kazo, kaj antaŭ tio, kaj poste okazis multaj similaj aferoj en la lando.

Tio rezultis, ke la ŝtata havaĵo grandparte malaperis, ĝuste dirite iris al privataj manoj, dum la ŝuldo de la ŝtato nominale kvinoble altiĝis. Ĉe la reĝimŝanĝo en 1989 la ŝuldo de la ŝtato estis dudek miliard dolaroj kontraŭ garantio de la tuta ŝtata havaĵo. Post kvaron jarcento en 2014 la ŝtata ŝuldo estiĝis pli ol cent miliardoj sed ĝia garantio fariĝis nur malgranda ono.

La grandegan troŝuldiĝon kaŭzis parte la liberalaj registaraj decidoj, ekzemple larĝskala antaŭtempa pensiuligo kaj pagado de sence alta senlabora helpmono. Estis tempo kiam homoj povis ricevi pli da mono en la formo de diversaj financaj subtenoj ol la salajro estis por la ĉiutaga okhora laboro. Tial generacioj alkiutimiĝis al la senlabora vivo kaj multaj homoj ne plu emis labori.

La situacion malbonigis, ke post la politikaj ŝanĝoj, do post 1990 multaj fabrikoj estis venditaj al eksterlandaj konkurantaj negocistoj kaj financaj grupoj. Ili tuj post la aĉeto fermis la nove ricevitajn fabrikojn kaj la produktajn maŝinojn forportis al sia patrina entrepreno eksterlanden en Okcidentan Eŭropon. Dekunu el niaj dekdu sukerfabrikoj tiel estis fermitaj kaj ankaŭ la hungara plantoleo-industrio havis similan sorton. Tial ne nur multaj homoj perdis siajn laborojn (kampanoj produktantaj sukerbeton, liveristoj kaj laboristoj en sukerfarejoj, ktp.), sed Hungario, kiu antaŭe eksportis multe da sukero, nun devas importi la duonon de sia bezono.



Danke al esperanto la kulturaj rilatoj inter Hungario kaj Orienta Azio estas tre viglaj, multaj koreaj kaj japanaj esperantistoj vizitas Budapeŝton, la hungaran ĉefurbon dum ĉiuj jaroj. Inter ili estis Yu Young Ae (Ebla), studentino de Ho Song, fama korea artpentristo kaj ŝi faris la supran desegnaĵon pri la aŭtoro de ĉi-tiu libro

Pro la nefavoraj procezoj pli ol unu miliono da senlaboruloj fariĝis en la dekmiliona lando, kie antaŭ tio tute ne estis senlaboreco. La krimado kreskis. Onidire iu liberala ministro pri internaj aferoj uzis unue la esprimon „*vivbezona krimado*” kaj oni ne plu punis per malliberejo la etajn ŝtelojn. Rezulte en la vilaĝoj oni ne plu kultivis sian ĝardenon, ĉar praktike sen puno iu ajn povis ŝteli nokte ĉion.

La vilaĝoj ekzemple apud la Tisza rivero, kie mi pasigis mian infanaĝon malpleniĝis, pli ĝuste dirite ilia loĝantaro ŝanĝiĝis. La antaŭaj generacioj kiuj kutimis regule labori mortis, aŭ vendis sian domon kaj iris loĝi en urbojn. Ekzemple en la memorlibro de vilaĝo Tiszabő oni rakontas, ke post la noktaj ŝteloj en la policejo oni eĉ protokolon ne emis fari, dirante, ke „*ankaŭ ili devas vivi iel*”.


Pro aliaj kaŭzoj ankaŭ mi forlasis tiun regionon kaj en mia 18-jara aĝo mi iris studi en la ĉefurbon kie oni akceptis min al universitato. Poste mi komencis instrui matematikon en budapeŝta universitato kaj fine restis tie. Sed el la rakontoj de parencoj kaj el la gazetaro mi sekvis la eventojn, do mi regule informiĝis, kio okazis en la loko de mia infanaĝo meze de la Hungara Ebenaĵo.

Longe post la reĝimŝanĝo mi legis interesan novaĵon en iu gazeto pri tiu regiono. Okazis, ke en vilaĝo oni devis paŭzigi la funkciadon de la vilaĝo kaj la oficialajn pagojn, ĉar dum longa tempo mankis kvorumo en la vilaĝaj estrarkunvenoj. Estis tiel, ĉar multaj membroj de la loka deputitaro estis arestitaj aŭ pasigis tempon en malliberejoj. Ŝajne estis tamen limo inter la vivbezona krimado kaj krimada vivo.

La vivkondiĉoj ĉirkaŭ mi en Koreio estus tute neimageblaj en Hungario. La Indramang Universitato estas meze de arbaro kaj la kampuso ne estas ĉirkaŭbarita. En la kampuso ĉiu konstruaĵo estas tage-nokte malfermita, la pordoj ne havas klinkojn kaj ili estas malfermitaj ankaŭ kiam dum tagoj neniu estas en la tuta domaro. Ankaŭ la kuirejo kaj la manĝejo estas ĉiam malfermitaj, kvankam en ili estas valoraj tutnovaj kuirejaj maŝinoj kaj fridujoj plene de diversaj manĝaĵoj.

Estas same malfermitaj ankaŭ la banejoj ekipitaj per grandpotencaj hejtiloj kaj lavmaŝinoj. Ankaŭ la universitata biblioteko estas ĉiam malfermita, kie oni konservas valorajn komputilojn, printilojn kaj

aliajn oficejajn ilojn. La kampusaj konstruaĵoj neniam estas fermitaj kaj ne nur seruroj, sed eĉ klinkoj ne estas sur la pordoj. Por ke la vento ne frapadu la pordojn, pro tio la koreoj metis kuleron en metalringon sur la ekstera parto de la pordo.



„*Sic transit gloria mundi.*” (Tiel pasas la gloro de la mondo) – diras la malnova latina proverbo. Antaŭ la dua mondmilito niaj hungaraj entreprenoj eksportis bonkvalitajn varojn en diversajn landojn de la mondo kaj niaj firmaoj Weiss Manfréd kaj Tungsram estis bone konataj en la mondmerkato. Koreio tiutempe estis kolonio kie eĉ la uzo de korea lingvo estis malpermesita. Dum la lastaj kelkaj jardekoj la korea industrio inundas la mondon per bonegaj altkvalitaj varoj. La koreaj energioŝparaj aŭtoj, la pinto-teknologiaj amuzigaj aparatoj, kiel ekzemple televidiloj Samsung estas unu el la plej serĉataj produktaĵoj en la mondo. Nuntempe Orienta Eŭropo kaj ene ankaŭ Hungario ĝojas, se iu korea entrepreno volas instali kunmuntan uzinon en tiuj landoj.

Ni provis trarigardi la procezojn de tiu tutmonda strukturoŝanĝo en niaj sociosciencaj konferencoj en Seulo. Dum la preparolo de la temo mi prezentis ne nur la ekonomiajn kaj politikajn vidpunktojn, sed mi

parolis ankaŭ pri tiuj fenomenoj kaj pri iliaj negativaj influoj al la homa pensmaniero. En Hungario, kie estas jam unu miliono da senlaboruloj, jam kreskis generacio kiu neniam vidis siajn gepatrojn iri labori, tial en multaj familioj mankas la motivo klopodi vivi el laboro. Veturante ĉiutage en la seula metroo mi ofte vidis la duondormantajn homojn venintaj el siaj laborejoj kaj la dormemajn studentojn. Vidante ilin mi ekmemoris raportiston en iu hungara televida kanalo, kiu demandis ok, aŭ dekjaran vilaĝan infanon:

- *Ĉu vi povus diri fileto, kio vi ŝatus fariĝi?*
- *Jes ja. Mi ŝatus esti senlaborulo, same kiel miaj gepatroj.*



Neĝo kovras la Silsang templon dum vintro. Ahn Jong-soo (Kara An), iama ĝenerala sekretario de KEA, redaktoro de „La Solidareco” kun Erzsi kaj la aŭtoro

SO-GA-MU-NI-BUL-SO-GA-MU-NI-BUL

En Koreio la homoj estas tre afablaj kaj helpemaj. Kiam mi rigardadis en seula metroostacio la mapon, preskaŭ ĉiufoje venis homoj al mi demandi ĉu ili povus ion helpi. Sed lastfoje kiam mi veturis per la Jirisan-Hamyang Ekspresa-Buso al la Silsangsa, ankaŭ tiam okazis nekutima afero, kiun mi neniam spertis en Eŭropo. Kiam nia aŭtobuso alvenis al la montara regiono, tiam komencis iomete pluvi.

Tiu pluvo tute ne estis ĝena, oni povus diri, ke venis nur iom da rosgutoj el la ĉielo. Tial mi ne prenis mian ombrelon el mia teko. Kiam mi volis elbusiĝi, tiam la ŝoforo donis al mi ombrelon por ke mi ne malsekiĝu. Sed vere mi havis faldeblan ombrelon, kiun la ŝoforo ne povis vidi, ĉar mi metis ĝin en la tekon apud mia faldkomputilo.

La naskiĝtago de Budho laŭ la luna kalendaro estis ĉijare en mia naskiĝtago. Mi sciis, ke ĝi estas festotago en Koreio, kiam en la parkoj de monaĥejoj okazas festivalecaj popolaj festoj, tial tiun tagon mi volis pasigi ĉiukaze en la Silsangsa. Kvankam ankaŭ busanaj esperantistoj petis, ke mi veturu al ili en tiu tago. Ili sciis, ke mi devus esti tie la venontan tagon, ĉar tiam mi faros parolkapabligan kurson por la studentoj de la knabina altlernejo. Do, ili pensis, ke estus bone bonveniĝi min antaŭ la instrua tago.

Okaze de la fama datreveno oni ornamis per plastaj lampionoj kaj la korton de la monaĥejo kaj la vojon de la Jirisana ĉefvojo ĝis la enirejo de la monaĥejo. Por la studentoj de la universitato ne estis instruado en tiu tago, ankaŭ ili helpis en la organizado de la monaĥeja festo. Tial ili festis min unu tagon antaŭ mia naskiĝtago. Mi ricevis salutojn ankaŭ el pli foraj urboj. Ekzemple Chorok Gang, kies esperanto nomo estas Songanta instruas esperanton en alternativa altlernejo, sendis al mi donace poŝte al la monaĥejo specialan ribo-siropon en botelo. Tiu trinkaĵo estas specialaĵo de la loĝloko de Songanta, verŝajne ĝi estas mielĉokolada trinkaĵo daŭre peklanta. Tial mi pensas tion, ĉar kiam ajn mi elŝraŭbis la ŝtopilon el la botelo ĝi laŭte eksaltis simile kiel la korko de ŝaŭmvino faras ĉe ni en Eŭropo.

Laŭ budhisma jarkalkulo tiu ĉi jaro estas la 2558-a jaro, ĉar la tempokalkulo komenciĝas en la mortotago de la historia Budho. En tiu punkto estas iom da analogio al la kristanaj sanktuloj, kiujn la katolika eklezio festas same en ilia mortotago. Laŭ longa tradicio tiu tago estas rigardite kiel ilia naskiĝtago en la Ĉiela Mondo.

La naskiĝtagaj festoj de Budho en la monaĥejo memorigas la etoson de malnovaj vilaĝaj festivaloj en Hungario. En tiaj lokoj ĉiam funkciis flanokuko-bakejo, kolbasorostejo aŭ almenaŭ varmaj kolbasejoj, sed en la monaĥejo estis nenio simila. Mi pensas, ke estis tiel parte evidente pro vegetaraneco, ĉar en la monaĥejoj estas nur vegetaraj manĝoj. Ankaŭ alkoholaj trinkaĵoj ne estis haveblaj en la korto de la monaĥejo.

Sed estis ludiloj por etaj infanoj, kie ili povis lerni kun helpo de instruistoj kiel fari el koloraj paperoj aŭ similaj plastoj belajn rozosimilajn florojn. Por la infanoj estis granda travivaĵo sonorigi ankaŭ la grandan sonorilegon kun helpo de kalva monaĥo. En budhismaj temploj la sonorilegojn oni ne sonorigas per ŝnurego kiel en kristanaj preĝejoj, sed per dikaj lignaj traboj kiuj estas horizonte pendigitaj per ŝnuroj. Oni frapas tiun trabon al la flanko de la sonorilego kaj poste la sonanta ekzotika erca sono disvastiĝas tra la montoj kaj valoj. Mi ofte aŭdas tion ankaŭ en nia universitata kampuso.



La studentoj de nia universitato vendis religiajn memoraĵojn ĉe la enirejo de la monaĥejo kaj ili funkciigis ankaŭ la informservon. Sed malgaja evento premis la ĉi-jaran festivalecan etoson, la plej granda ŝipotragedio okazinta lastatempe en Koreio. Tial la festo estis malpli pompa ol kutime kaj en tendo apud la sonorilego unu el niaj studentoj disdonis flavajn plastajn bendojn sur kiuj la ĉeestantoj povis skribi preĝojn kaj kondolencojn memore al la viktimoj de la ŝipotragedio. Tiujn flavajn bendojn oni ligis al la flankaj muroj de la sonorilega domo, kiujn oni povis vidi tie ankaŭ post semajnoj flirtante de la vento memore al la tragedio.



La oficialaj festoj komenciĝis je la deka kaj duono antaŭtagmeze. Dum la festo la monaĥoj vestis sin en flava festa vesto simila al hindaj vestaĵoj. Mi ne multe komprenis la laŭtlegitajn tekstojn, sed mi sentis, ke la evento estis tre solena kaj ekzotika. Fine de la longa ceremonio la monaĥoj iris antaŭ la centra templo al malgranda orkolora Budho-skulptaĵo kiun oni konservis dum tiu tago en tiu loko de la monaĥejo. Tiu skulptaĵo estis simbolo de la nun naskita Budho kaj la monaĥoj akvumis la kapon de la skulptaĵo.

Poste ankaŭ la partoprenantoj de la ceremonio iris al la skulptaĵo anservice kaj post salutkliniĝo ankaŭ ni ĉiuj akvumis la skulptaĵon de la novnaskito. Tiu ceremonio daŭris dum pluraj horoj, ĉar ni estis plurcentope aŭ eble eĉ pli ol milope en la ĝardeno de la monaĥejo.

Intertempe unu el la monaĥoj batadis lignan tamburon, kiu eligis proprastilan tinton dum la homamaso ripetadis sub la gvido de monaĥo plurmil jaran mantron: 석가무니불석가무니불. ...

Tion oni devas prononci „*So-ga-Mu-nji-Bul-So-ga-Mu-nyi-Bul...*” La signifo de la mantro estas la jeno: „*Soga*” estas la korea formo de familia (aŭ prefere genta) nomo de Budho, tion oni nomas ĉe ni en Eŭropo „*Sakya*”. „*Munji*” signifas „*Granda*” kaj „*Bul*” estas la korea nomo de Budho, kio sigifas „*Iluminiĝinta*”, kiel konate. La signifo de la tuta mantro estas: „*Soga, la Granda, la Iluminiĝinta, Soga, la Granda, la Iluminiĝinta...*” Ne eblas scii kiomfoje oni recitis tiujn vortojn dum la ceremonio, laŭ mia takso ĉirkaŭ mil foje.



Kvankam la tagmanĝo estis anoncita oficiale je la 12-a, la manĝo-tempo por pli ol mil homoj daŭris plurajn horojn. Tial jam dum la festa ceremonio oni komencis disdoni la manĝaĵojn dozitajn sur tele-roj. Ankaŭ nun bibimbap estis la tagmanĝo, la homoj atendis en longa vico ricevi sian teleron.

Posttagmeze okazis ankoraŭ pliaj mistikaj kaj ekzotikaj ceremonioj. Bedaŭrinde la ĵus okazinta ŝipoakcidento tre influis la gajan naskiĝ-tagan etoson kaj la rezulto estis kelkfoje tre funebra. Kadre de la posttagmezaj prelegoj okazis la sonorigo de la granda sonorilego me-

morante pri la viktimoj. Poste estis procesio ĉirkaŭ la konstruaĵoj de la monaĥejo kun gvido de du monaĥoj. La homoj rondiris la centrajn konstruaĵojn kaj ni ripetadis malnovajn sankstritajn aŭ pali vortojn laŭ korea maniero: 나무아미타불.

Tion oni prononcas: „*Namu Amita Bul*”. En la okdekaj jaroj oni informis min en Japanio, ke „*Namu*” signifas „*Gloro*” aŭ „*Adoro*”, „*Amita*” signifas „*Lumo*” kaj la signifo de la vorto „*Bul*” estas „*Illuminiĝinto*”. La signifo de la tuta mantro estas: „*Gloro al la Lumo, al la Illuminiĝinto*”. En japanaj budhismaj temploj ni kutime diradis la samajn mantrojn, sed tie kvinoble pli rapide. Kiam mi estis en la Kyoto Monaĥejo, tiam mi nombris tion ĉ. 5-6 mil fojojn dum ĉiu ceremonio. Kaj ankaŭ la prononco estis alia en la japanaj temploj, tie ni diris: „*Namu Amida Bu*” kaj ĉe la fino de la ceremonio „*Namu Amida Bucu*”.



Procesio en la korto de la Silsangsa, kie la partoprenantoj ĉirkaŭiris la tutan templon ripetante: „*Namu Amita Bul*”

La vespermanĝo okazis je la kvara kaj duono posttagmeze, ĝi estis bibimbap kiel kutime, kaj poste komenciĝis la ekfajrigo de kandeloj kaj ilia meto en lanternojn. Poste la amaso enmane kun lumantaj lanternoj iris al longa proceso sub gvido de la ĉefpastro de la monaĥejo kaj ĉiuj monaĥoj preĝis kun la ĉeestantoj por la viktimoj kun la kutima tamburado ripetante la mantron „*So-ga-Mu-nji-Bul-So-ga-Mu-nji-Bul*”. Kaj junaj kaj maljunaj, kaj viroj kaj inoj ĉeestis la proceson, laŭ la vestaĵoj mi pensas, ke kelkaj el ili estis kristanaj monaĥinoj. Sed tiun parton de la ceremonio mi jam ne ĉeestis. Ĉar baldaŭ vesperiĝis kaj mi ankaŭ nun ne volis hejmeniri al mia kampusa loĝejo tra malluma arbaro kie abundis serpentoj.



Eung Uk Suenim (Ju Ji Suenim) la estro de la Silsangsa

KIO POVUS ESTI LA BULGOGI?

Dum la malnovaj koloniaj tempoj en la anglaj, francaj kaj belgaj kolonioj en Afriko la infanoj lernis legi kaj skribi per lernolibroj importitaj el Eŭropo. Origine oni faris tiujn librojn por eŭropaj infanoj. La afrikaj infanoj povis legi en tiuj libroj pri kristnaska neĝkovrita pejzaĝo, kaj ili legis, ke en decembro la mondo festis la naskiĝtagon de Jesuo, la fondinto de la kristana religio. Afrikaj infanoj devis lerni por ili forajn fabelecajn historiojn, kiujn ili tute ne povis imagi, ĉar ne nur ili, sed eĉ iliaj gepatroj neniam vidis neĝon dum la tuta vivo.

Al mi estis same nekonate la signifo de la vorto „*bulgogi*”, kiam mi komencis legi mian korean lernolibron aĉetitan en budapeŝta universitato. Tuj en la unua leciono mi legis pri du studentoj irantaj en restoracion manĝi „*bulgogi*” kun kimĉio. Poste sekvis dudek-tridek gramatikaj ekzercoj pri la sama temo. Oni devis repondi al multaj demandoj ekzemple: „*Kie manĝis la studentoj bulgogi (ĉu en restoracio, ĉu en kinejo)?*”, kaj „*Kiuj manĝis bulgogi (ĉu la studentoj, ĉu la instruistoj)?*”, ktp. La plej grave estis, ke dum tiuj 20-30 ekzercaj frazoj ni bone ellernis la gramatikajn strukturojn. Sed la fakto: kio bulgogi povus esti, daŭre restis enigmo por mi. Simile kiel la neĝo por la afrikaj infanoj, kiu kovras la pejzaĝon kristnaske en la fora Eŭropo.

Kiam mi iris al Seulo unufoje semajne el la Ĝiri-montoj por gvidi kurson en la centro de Korea Esperanto-Asocio por progresantoj evoluigi parolkapablon, tiam mi kutime vespermanĝis kun lokaj esperantistoj en ĉina aŭ korea restoracio en Mapo. En tiuj lokoj ni kutime manĝis bibimbapon, aŭ korean faboĝerman supon aŭ ĉinan nudelosupon kun multege da kimĉio kaj diversaj freŝaj verdaj plantaj folioj.

En tiu semajno mi ricevis mesaĝon de Dumina, do de la dua naskito de la Min familio, ke ŝi ŝatus renkonti min kaj ni eble povus vespermanĝi kune, kiam mi estos denove en Seulo. Mi jam renkontis Dumina plurfoje pli frue, lastfoje en la pasintjara korea kongreso en Incheon. Antaŭ tio ŝi vizitis min en Budapeŝto kaj ni kune promenis viziti budapeŝtajn muzeojn. Plurfoje ni promenis agrable en la Reĝa Palaco kaj sur promenejo de monteto Várhegy (Fortikaĵmonteto).

Tial mi akceptis ŝian inviton kun ĝojo kaj mi menciis al ŝi, ke se ŝi ankoraŭ ne decidis, kie ni vespermanĝu, tiam ŝi elektu lokon kie eblus manĝi bulgogi. Ĉar mi jam povis paroli pri bulgogi en korea lingvo dum multaj minutoj, sed mi tute ne sciis kio ĝi povus esti.

Dumina ĝoje konsentis kun mia propono. Ĉar ŝia laborejo estis proksime al mia gastejo, tial ni iris tagmanĝopaŭze en proksiman restoracion. Mi rakontis ankaŭ al ŝi, ke mi jam legis centfoje pri tiu manĝaĵo, ĉar tio estis la legaĵo en la unua leciono en mia korea lernolibro, kiun mi aĉetis en budapeŝta universitato. Do mi sciis teorie jam multe pri tiu manĝaĵo-specialaĵo, sed praktike mi ne povis ekkoni ĝin.

La restoracio kie ni gustumis la bulgogi estis apud mia gastejo en unuminuta promena distanco. La domo ne estis malfermita al la strato, tial oni ne povis vidi ekstere, ke eleganta restoracio troviĝis interne de la pluretaĝa domo. Por unua vido mi pensis, ke tiu bulgogi-restoracio similis al la multekostega japana sukiyaki restoracio kaj bulgogi mem similis al sukiyaki. En Japanio elegante vestitaj kelnerinoj servis la manĝaĵojn en kimono sed ĉi tie memkompreneble la kelnerinoj havis koreajn vestaĵojn.



Dumina antaŭ la Ĉenoponto kaj la Reĝa Palaco en Budapeŝto

La tabloj ankaŭ tie estis malaltaj kiel kutime en la Malprokima Oriento kaj ankaŭ nur sen ŝuoj eblis eniri la restoracian parton de la konstruaĵo. En tiu loko subtera planko estis elformite sub la tablo, do ni povis meti niajn piedojn eŭropece sub la tablon. En la mezo de la tablo eta gaskuirilo estis enkonstruita, super kio oni instalas grandan poton. Ni sidiĝis ĉirkaŭ la tablo kun Dumina kaj ŝia fratino Minmin. Ankaŭ Minmin laboris proksime, ĉar ŝi estis la ĝenerala sekretario de Korea Esperanto-Asocio. Eksidante tuj portis kelnerinoj la paperdike tranĉitajn freŝajn ruĝajn bovotranĉaĵojn kaj la same freŝe tranĉitajn legomojn, kiuj konsistis ĉefe el diversaj fungoj. Tiutipaj fungoj ne estas troveblaj ĉe ni en Hungario.

La viandon kaj la legomojn ni mem rostis ĉe la tablo kaj al la freŝe farita manĝaĵo ni ricevis ankaŭ diversajn malvarmajn saladojn. Inter ili la gusto de stufita aŭ rostita melongeno similis al okcidentaziaj gustoj, sed la freŝa laktuko verŝita per majoneza saŭco ŝajnis esti tipa eŭropa manĝaĵo. Rizo kaj kimĉio ankaŭ ĉi tie estis nemalhavebla parto de la tagmanĝo.



Brila kaj Ŝlosilo, du motoroj de la korea esperanto movado

Mi ne scias kiom kostis tie la tagmanĝo, mi nur vidis aliloke, ke bulgogi estis kutime speciale multekosta. Normala tagmanĝo kutime kostis sep mil wonojn, sed bulgogi nenie kostis sub 15 mil wonoj. Tamen tio estas ankoraŭ malpli kosta, ol la 70 mil wona prezo de simila sukiyaki manĝaĵo en Japanio, kiun mia universitata dekano pagis lastfoje en Nagoya, kiam li invitis min vespermanĝi.

La du manĝaĵoj: do la japana sukiyaki kaj la korea bulgogi ŝajnis al mi similaj manĝaĵoj. Preparante la japanan manĝaĵon ni unue rostas lardon en la poto por kolekti iom da graso en la subo de la poto. Poste ni fritadas la diversajn legomojn kaj la paperdike tranĉitajn bovotranĉaĵojn en tiu graso. Japanoj manĝas tiun manĝaĵon kun kruda ovo, kiu por ni, eŭropanoj estas nekutima.


Ĉiukaze mi havis trioblan ĝojon pro la tagmanĝo. Mi sukcesis denove renkonti mian malnovan karan amikinon kaj mi sukcesis ekscii kio estis bulgogi, pri kio mi jam povis teorie paroli dum minutoj en korea lingvo. Kaj trie, post manĝado de bibimbap trifoje tage, fine mi povis gustumi iun pli varian manĝaĵon. Estis agrable por mi sperti, ke inter la saladoj estis unu, kiu tre similis al miaj kutimaj eŭropaj manĝaĵoj. Temas pri freŝaj kukumoj kiuj estis same faritaj kiel en mia infanaĝo miaj familianoj faris ilin en niaj vilaĝoj en la Hungara Ebenaĵo.

Post kontentiga tagmanĝo Minmin menciis, ke ankaŭ aliaj esperantistaj amikoj vespermanĝos kune en la sama tago kaj ili ŝatus, se ankaŭ mi ĉeestus. Mi akceptis tiun proponon, sed antaŭ vespermanĝo mi ankoraŭ faris mian kutiman posttagmezan bazan kurson en la centro de KEA. Post la kurso mi iris kun Akva, mia altletneja studento al Myeongdong por ĉeesti la komunan vespermanĝon. La korea junulo surpriziĝis, ke tiun parton de Seulo mi konis pli bone ol li. Kvankam tio tute ne estis miraklo, ĉar en la lastaj jaroj mi kutime tranoktis en la Myeongdonga Gastejo, kiu troveblis apud tiu metros-tacio dum mia restado en Seulo.

Ni havis ankoraŭ dudek minutojn ĝis la renkonto, tial ni promenis iomete en la bazaro al la direkto de Namdaemun (Suda Pordego). Tie mi montris al Akva la konstruaĵon de la Seula Esperanto-Kulturcent-

ro, kiu troviĝis proksime al la Myeongdong metroostacio. Post kelkaj minutoj kunvenis la membroj de la nova tablosocieto kaj ĉifoje ni iris al restoracio kie oni rostis diversajn marbestojn. Oni rostis ilin simile kiel ni rostis bulgogi antaŭ kelkaj horoj en la mapoa restoracio. Do la rostado okazis antaŭ niaj okuloj sur la gaskuirilo kiu estis enkonstruita en nian tablon.

Poste mi vidis, ke la marbestaĵoj estis nur antaŭmanĝo kaj sekvis ilin rostitaj kaj freŝaj bovaĵostekoj kun maldikaj, longaj fungoj. Tiu manĝaĵo estis simila al la manĝaĵo kiun oni faris tagmeze en la bulgogi restoracio. Poste ne eniris elegantan kafejon, kie la amikaro babilis agrable dum trinkado de taso da bongusta teo. Intertempe mi helpis al Lee Jungkee, prezidanto de la Seula Esperanto-Kulturcentro rezervi malmultekostan hotelĉambron en centra loko de Buenos Aires, kie ni kune partoprenos la universalan kongreson de UEA post kelkaj semajnoj.



Statuoj de Budho kaj bodhisatvoj en la Silsangsa ĉeftemplo

Post la agrabla vespermanĝo la tablosocieto disiĝis kaj mi iris hejmen jam rutine al mia kutima gastejo en Mapo. De tie mi veturis buse al la Silsangsa la venontan matenon kaj mi alvenis tien ĉirkaŭ tagmezo. Mi promenis agrable inter la bushaltejo kaj la monaĥejo sur ŝtona ponto super rivereto Mansucheon (pr. Mansuĉon) kaj poste mi promenis al nia universitata kampuso tra la arbaro. Dum kelkaj tagoj mi estis for kaj nun mi vidis, ke la arboj en la ĝardeno de la universitato estis plene de verdaj ĉerizograndaj fruktoj. Tiu fenomeno estis surpriza, ĉar kiam mi alvenis antaŭ kelkaj tagoj el Eŭropo, tiam sur tiuj arboj estis nek folioj, nek fruktoj. Tiutempe ankoraŭ nur la blankaj kaj rozkoloraj floroj tentis la abelojn el la Ĝiri-montoj.

En la ĝardeno estas ĉirkaŭ sepdek-okdek fruktoarboj kaj ĉiuj arboj estas plenegaj per fruktoj. Mi jam lernis en Japanio, ke tiuj estas la plej famaj orient-aziaj fruktoj, sed ilian nomon mi ne scias hungare. Sed tion mi scias, ke ĝi estas japane „ume”, koree „mesil”angle „Chinese plum” (ĉina pruno), sed kelkfoje la frukto nomiĝas „Japanese apricot” (japana abrikoto).



Studentoj rikoltas mesil fruktojn en la universitata ĝardeno

Tiu planto estas tre populara en la Malproksima Oriento, ĝiajn flo-rojn fine de vintro kaj komence de printempo oni rigardas kiel la unua simbolo de printempo. Sed ankaŭ la fruktoj estas tre multflanke utiligataj. Oni faras el ili sukcon kaj saŭcon, gustigas ilin per alkoholo kaj konservante ilin en vinagro kaj salo oni faras el ili ankaŭ acidan garnaĵon. Krom tio ili estas uzataj ankaŭ kiel medikamento kaj oni uzas ilin preventi diversajn dentomalsanojn kaj oni ankaŭ utiligas ke la fruktoj malhelpas la disvastiĝon de diversaj patogenaj bakterioj.

Post lastatempaj esploroj ili malhelpas ankaŭ la disvastiĝon de bakte-rioj nomataj „*helicobacter pylori*” kaj helpas la resaniĝon de malsano „*gastritis*” kaj stomaka ulcero. Post tiom da favoraj informoj mi jam atendis senpacience la maturiĝon de tiuj miraklaj fruktoj, kiuj videble tre abunde kreskis en nia kampusa ĝardeno. Mi jam ege atendis gustumi ilin. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke mi povos gustumi tiujn fruk-tojn neniam en mia vivo.



Multaj fruktoj kolektiĝis

DU ŜERCOJ, UNU PINTUMO

En la lastaj semajnoj mi daŭre veturadis tien-reen inter la Ĝiri-montoj kaj la grandurboj, depende kie oni petis min prelegi. Kvankam mi multe pli ŝatas restadi en la kvieta Silsangsa monaĥejo kaj en nia arbara kampuso ol en svarmanta grandurbo, pro miaj multaj ĉefurbaj prelegoj lastatempe mi tute ne havis tempon longe restadi en la Jirisan.

En la seulaj hoteloj oni alkalkulas plurdek mil wonojn se mi volus ricevi ĉambron inter la nubskrapuloj, kiu rigardas al flora ĝardeno aŭ arbara parko. Sed ĉirkaŭ nia Indramang Universitato abundas arboj kaj floroj kaj en la arbaro vivas tre belaj birdoj. En nia arbara kampuso ne estas tiom multe da artefaritaj lumoj kiom en Seulo, ofte estas tuta mallumo ĉirkaŭ ni, kiam ni nokte iras en la korton. Mi jam bone al kutimiĝis al tiu fenomeno, ke estis jam preskaŭ tro forta la luna lumo por mi en plenumo kaj tiam mi sentis, ke pro la tro forta lunlumo la steloj fariĝis malpli brilaj.



La Namkang Esperanto-Lernejo

La plej grava lastatempa traviviaĵo en nia vivo estis la partopreno en la kutima printempa kurso de la Namkang Esperanto-Lernejo. Tio okazis ankaŭ ĉijare en la pitoreske bela Chengdo inter la altaj montoj, 25 km-ojn apud Daegu. Ni preparolis kun la membroj de la Seula Esperanto-klubo komune veturi el la ĉefurbo al Dong Daegu per trajno kaj por fari tion ni decidis, ke ni renkontiĝos je la naŭa horo matene ĉe restoracio Lotteria en la Seula stacidomo.

Mi sciis, ke nia trajno ekos je la 9:20, sed mi jam alvenis al la stacidomo antaŭ la oka. Promenante ĉirkaŭ la stacidomo mi rimarkis, ke estis tie du Lotteria restoracioj, do ne estis klare ĉe kiu ni renkontiĝos. Bonŝance la klubanoj trovis min facile, ĉar mi jam faris prelegojn plurloke kaj ili jam konis mian vizaĝon. Sed Agot Feitosa el Aŭstralio atendis la koreajn esperantistojn vane, li perdiĝis ie en la konstruaĵo. Tial ni entrajniĝis nur unu minuton antaŭ la ekiro, ni preskaŭ malfruis ĝin, kvankam mi jam estis tie antaŭ unu horo. La veturtempo estis kvar horoj ĝis Dong Daegu kaj la lokaj esperantistoj atendis nin ĉe la stacidomo kun aŭtobuso.



D-ro Urso, la organizanto de la Namkang Esperanto-Lernejo

La Namkang lernejon oni fondis en 1694 laŭ propono de pluraj sciencistoj, por gardi la memoron de Park Su-Chun, fama saĝulo mortinta antaŭ 42 jaroj. En 1717 tie oni prezentis religian ceremonion honore al Park Han-Ju, alia granda sciencisto. La ĉefa misio de la malnove establita privata altlernejo estis eduki la junularon je fideleco al la patrujo kaj altaj moralaj valoroj, memore al la du sciencistoj. Oni renovigis la pitoreskajn domojn de la altlernejo en 1998. En la lastaj jaroj tiu domo-komplekso donas hejmon ankaŭ al la jam tradiciaj eventoj de la Namkang Esperanto-Lernejo.

Mi jam vidis multajn belajn kastelojn kaj templojn en la Malproksima Oriento, sed nun mi estis tamen surprizita pri la bele renovigita lernejo en pitoreska ĉirkaŭaĵo sur montetopinto ĉirkaŭita de altaj montoj. Survoje ni vidis ĉie persimono-, kaj pomarbojn kaj multegajn cepokampojn. Tiuj cepoj estis multe pli grandaj ol tiuj en Eŭropo kaj ili estis kultivataj ne tute subĉiele, kiel en Eŭropo. Sed oni kovris la bedojn per plasta folio kaj oni traboris la folion ĉirkaŭ la planto per 5-6 cm-aj truoj. Versajne tiel eblis malhelpi la trosekiĝon de la tero kaj samtempe oni malhelpis ankaŭ la kreskon de fiherboj inter la kulturitaj plantoj. Versajne malsame kiel en Eŭropo, tie oni ne multe bezonis uzi hojon en tiuj ĝardenoj.

Nia renkontiĝo en la Namkang Lernejo havis tre interesajn programojn. Unue Lee Jungkee (Ŝlosilo) rakontis pri sia vojaĝo al Teherano, kie li partoprenis la iran Esperanto-kongreson kiel estaranto de UEA. Lastatempe nur malmulte da informoj atingis la membrojn de la internacia Esperanto-komunumo el tiu grandtradicia lando, tial estis speciale interese aŭskulti la travivaĵojn de Ŝlosilo pri siaj personaj spertoj.

Poste Huĝimoto Hideko prezentis la tradician japanan teoceremonion kaj Kim Seonuk (Suno) parolis pri la situacio en Fukoka post la tianatura katastrofo. Lee Jungkee faris testekzamenon por kontroli la studentojn, Won Sinyeong (Miŝa) kantis rusajn kantojn kun gitaro, Ma Young-tae (Leono) organizis sciencpopularigajn kaj amuzigajn programojn kun multaj ŝercoj, ludaj kvizo-konkursoj kaj esperantlingvaj kantoj. Jen unu el la ŝercoj pri kiu la koreoj multe ridis. Te-

mis pri patro kaj filo kiuj iris hejmen el festo kie ili iom drinkis. La patro diris al sia filo:

- *Rigardu filo, apud la muro staras du homoj. Se vi vidas kvar homojn, tio signifas, ke vi estas ebria. Ebriuloj ĉion vidas duoble.* - Sed la filo rimarkis:
- *Sed paĉjo, tie, apud la muro estas nur unu homo.*

En la renkontiĝo ni povis gustumi verajn koreajn specialaĵojn. Kiel antaŭmanĝo mi manĝis sekigitajn salikokojn kun sezama kukumosalado kaj la ĉie en Koreio ĉeestanta kimĉio, sekigita algo kaj gluema rizo. En la Malproksima Oriento la rizon oni kuiras kutime glueme, ĉar ailel oni ne povus manĝi ĝin per manĝobastonetoj. Precipe ne per la koreaj metalaj manĝobastonetoj, kiuj pli malfacile estas uzeblaj ol la japanaj manĝobastonatoj faritaj el kruda ligno.



Konferenco de lingvoinstruistoj en la Indramang Universitato

Krom tio krispaj laktukoj kaj freŝaj verdaj sezamaj folioj estis sur la tablo, oni devis volvi la manĝaĵopecojn en tiujn foliojn. Estis ankaŭ sojoĝermoj kaj stufitaj verdaj folioj sur aliaj pladoj krom la rizo kaj ankaŭ ruĝkolora akragusta saŭco en kiu oni devis trempi la sezamajn foliojn. La ĉefplado estis kruda blanka fiŝo, kiun oni devis meti en sezamajn foliojn kaj trempi en akran saŭcon kaj fine en la buŝon.

Fine fiŝosupo kompletigis la tagmanĝon kiu estis farite el specialaj fiŝoj. Ĝi estis speciala, ĉar la kuirita fiŝo ne estis malmola kiel ĉe ni en eŭropaj restoracioj, sed loza kaj gelateneca kiel ovoblanko. Tio jam ankaŭ por la japana partoprenanto estis iom stranga kaj pro tio li ne manĝis ĝin, sed li donis ĝin al apude sidanta koreo. Li akceptis ĝin ĝoje, ĉar laŭ li ĝi estis tre bongusta kaj li ĝue formanĝis la tuton. Poste ankaŭ mi gustumis ĝin, la gusto estis vere bona, sed la konsisto daŭre estis iom nekutima por mi.



Ma Young-tae, membro de Akademio de Esperanto (maldekstre) kun grupo de partoprenantoj en la Namkang Lernejo

D-ro Urso, antaŭa prezidanto de KEA aranĝis ekskluzivan programon por la eksterlandanoj, kiuj partoprenis la renkontiĝon. Li invitis nin al luksa korea teodomo. La prezoj tie estis nekredinde altaj. Aliloke oni povis ricevi kafon por 300 wonoj, tie taso da teo aŭ kafo kostis dudekoble pli, almenaŭ sesmil wonojn. Estas konate, ke en la Malproksima Oriento oni trinkas amaran, verdan teon, kiun ni eŭropanoj ne tre kutimas. Tial mi prefere mendis glaciaĵon kun verŝitaj sukeritaj ruĝaj faboj kaj sekigitaj persimonoj, famaj subtropikaj fruktoj de Orienta Azio. Multaj surpriziĝis pro tio, ke mi manĝis tiajn ĉiutagaĵojn en unika teodomo, sed mi preferis senti iom da kutimaj gustoj ol amaraj, por mi nekutimaj teoj post plursemajna foresto de Eŭropo.

La programoj de la renkontiĝo estis precipe amuzigaj, por lernado restis malpli da tempo. Estis speciale bonetosa la bankedeca interkona vespero, kie ni babilis ronĝante manĝante krakaĵojn kaj trinkante diversajn alkoholajn kaj senalkoholajn trinkaĵojn. Intertempe niaj gastigantoj metis sur la tablon plian grandan pladon kun bongustaj blankaj krudaj fiŝopecoj.

La budhismo en Koreio nuntempe fariĝas malpli signifeca, laŭ la prezidanto de nia Indramang Universitato nun jam vivas pli da kristanoj ol budhistoj en Koreio. Ankaŭ en la Namkang Lernejo estis dimanĉe ekumena diservo, kiun gvidis akademiano Ma Young-tea. Li estas fame konata de ŝercokolektado, kiu estas sia hobbio kaj ŝatokupo. Post kiam li legis praaĵn tekstojn kutimajn en tiuj ceremonioj, ke ni benu la Sinjoron kiu kreis la Teron kaj la Ĉielon, ktp., mi pensis, ke mi rakontos al li orient-eŭropan ŝercon rilatan kun la temo, por pligrandigi lian ŝercokolektaĵon.

Mi aŭdis tiun ŝercon de komunista gazetredaktoro antaŭ la politikaj ŝanĝoj en Hungario kaj li rakontis la historion al mi kun iom da memironio. Li volis montri kiom malbone funkciis la ateisma propagando-maŝino en la lando dum la komunisma epoko. Post la milito granda parto de komunismaj partiogvidantoj estis ateistoj. Ili ordonis fari fortan ateisman progadandon en la urboj kaj vilaĝoj kaj ili volis malfortigi la pozicion de eklezioj.

Por lokaj komunistaj partiofilioj estis ordonite fari ateismajn prelegojn ĉie en la lando, kaj oni proponis, ke la lokaj komunistaj partioestroj invitu renomajn prelegantojn, kiuj kredis aŭ almenaŭ akceptis tiujn ideologiojn. Tiel okazis, ke preleganto el la ĉefurbo parolis en hungara vilaĝa kulturdomo pri la ekesto de la mondo, kiun kreis ne Dio, sed kiu mem estiĝis dum jarmiliardoj.

La vilaĝanoj aŭskultis la prelegon silente, sed kiam la preleganto diris, ke ne Dio kreis la homon, sed ĝi devenis de simio, tiam la kamparaninoj komencis kriadi. La ĉeestanta vilaĝa komunistarta partiestro pensis, ke tiam li devis interveni por silentigi la homojn kaj li diris:

- *„Paciencon, sinjorinoj, estas nenio speciala en tiu afero. Ni ja scias, ke ankaŭ la simion Dio kreis.”*

Kiam Szenes Imre rakontis tiun anekdoton en orient-eŭropa medio, tiam ĉiuj komprenis la ŝercon, ĉar la membroj de la antaŭaj generacioj havis multajn similajn spertojn en sia vivo. Multaj homoj oficiale ne rajtis paroli pri sia religia aparteno, eĉ por laborantoj en certaj postenoj estis serioze malkonsilinde viziti preĝejajn ceremoniojn. Estis do konate, ke lokaj ŝtatoficistoj kaj komunistaj partioestroj nur kaŝe povis aparteni al eklezioj kaj oficie ili devis deklari, ke ili estis ateistoj, kvankam ili kredis religiajn historiojn.

Sed la koreoj aŭskultis gape la finon de la rakonto kaj post iom da hezitado ili demandis *„kio estas la ŝerco?”* Ĉar por ili estis tute naturre kaj memkompreneble, ke Dio kreis ĉion, do Dio kreis ankaŭ la simion. Ili maturiĝis en socio kie estis evidente ke la simio estis simio kaj la homo estis homo. Kiel budhisma saĝulo vortumis: *„La monto estas monto, la rivero estas rivero kaj la homo estas homo.”*

Kiam mi rakontis la historian fonon, tiam ĉiu ŝajnis kompreni la ŝercon kaj komencis laŭte ridi. Sed tio eble okazis nur pro ĝentileco, ĉar videble neniu povis imagi kiel memkomprenebla kaj evidenta afero, ke Dio kreis la mondon kaj ĉiujn estaĵojn, povus esti ŝerca kaj humora.

VENENAJ FUNGOJ KAJ VENENAJ SERPENTOJ

En mia junaĝo, kiam mi venis al la ĉefurbo el la Hungara Ebenaĵo, tiam mi iris ofte al la montoj de Buda kolekti fungojn post bona pluvo. Tiam okazis, ke inter Kristnasko kaj Novjaro mi trovis nekredible multajn fungojn en pinarbaro, kiujn mi neniam vidis pli frue en arbaroj ĉirkau miaj vilaĝoj apud la Tisza rivero. Mi kolektis du grandajn korbojn da ili kaj montris ilin survoje hejmen al fungokontrolisto deĵorinta ĉe placo Moskvo, ku estis tiam bone konata loko de Budapeŝto, la hungara ĉefurbo. Li trarigardis iom la korbon kaj sen detala kontrolo diris, ke tiujn oni povis manĝi kaj eblis kuiru ilin.

Sed tamen li forprenis du-tri pecojn el la korboj kaj forĵetis ilin dirante ke ili estis venenaj. Mi estis iom malkontenta, ke li ne kontrolis la tuton pli detale kaj mi komencis traserĉi la tuton. Kaj kiam mi trovis kelkajn similkolorajn fungojn, tiam mi montris ilin al li. Li diris, ke mi pravis kaj li forĵetis ankaŭ ilin en rubujon. Tiam mi ankorau pli detale trarigards la tuton kaj trovis pliajn suspektindajn. Klarigis, ke ankaŭ ili estis venenaj kaj la kontrolisto forĵetis ankaŭ tiujn. Poste li konsilis, ke mi trarigardu denove la tuton hejme, sed ne malhelpu lin tie. Ĉar li volis ĉefe trovi la plej venenajn fungojn, kies nomo estis „faluseca amanito”. Ĉar tiuj fungoj kaŭzis la plejparton de venenaj mortoj en Hungario.

Tiu malnova rakonto venis en mian kapon ne pro la fungoj, kvankam kelkfoje ankaŭ ĉi tie en la Silsangsa oni kolektis multegajn fungojn en la arbaro kiujn oni poste preparis en la kiurejo por meti ilin en la bibimbap. Sed tiujn fungojn mi tute ne konis kaj ankaŭ ilia gusto estis tute alia kompare al la gusto de miaj konataj fungoj en Eŭropo. La rakonto pri venenaj fungoj nun venis en mian kapon precipe pro la venenaj serpentoj kiuj abonde troviĝis ĉirkaŭ ni en la kampuso.

Oni povas diri, ke ni daŭre vivas kun diversaj serpentoj en la Indra-mang Universitato. Ĉirkaŭ nia domo troviĝas unu kaj duonmetra subtegmento kaj sub tiu subtegmento la tero estas plialtigita per kvindek aŭ centkilogramaj grandaj ŝtonoj. Sur tiuj ŝtonoj estas konstruita unumetra vasta trotuaro. Iun matenon mi vidis mallongan ruĝ-

nigre strian serpenton sur tiuj ŝtonoj, kiu ekvidinte min kaŝis sin inter la ŝtonojn. Sed unue ĝi atendis pacience por ke mi povu foti ĝin. Tiam mi estis sola en la domo, la studentoj laboris en la ĝardeno de la universitato. Kiam mi montris la bildojn al ili, tiam ĉiuj miris pri la stranga vivaĵo. Soyeon, unu el niaj studentinoj preskaŭ eksplodis ridante pro la strangaj bestoj antaŭ niaj pordoj.

Bonŝance ĵus tiun matenon venis la ĝenerala sekretario de asocio de koreaj agrikulturaj bioproduktantoj al nia kampuso, kiu konis tiujn bestojn pli bone ol ni. Mi montris al li la bildon de la serpento en tri-oblaj grandeco, en kiu eblis bone vidi ĝian triangulan kapon. Ni lernis en la lernejo en Hungario, ke bestoj kun tiuforma kapo kutime estas danĝeraj. Li konsentis kaj diris laŭ la bildo, ke tiu serpento estas tre danĝera kaj ĝia mordo kutime kaŭzas morton dum kelkaj minutoj.

Poste mi sendis la bildon tra interreto al la komputilo de nia universitata biblioteko. Tie oni povis serĉi per koreaj literoj la serpentojn de Koreio, kiuj plej similis al nia serpento sur la bildo. Seo Maneog, la direktoro de la universitato trovis similan ruĝ-nigran serpenton en la interreto kaj li diris, ke ĝi tamen ne estis tiu tre danĝera speco pri kiu Kara An, la ĝenerala sekretario de la farmerasocio pensis. Laŭ la interretaj informoj tiu serpento ne apartenis al la venenaj serpentoj, kvankam ĝia konduto estis tre sovaĝa. Oni diris, ke tiuj serpentoj moviĝas ĉefe nur nokte kiam oni povas rimarki ilin pli malfacile.

Mi ne komprenis kion signifis la „sovaĝa konduto”, ĉar mi pensis, ke ĉiuj arbaraj serpentoj devus esti sovaĝaj. Sed la ĝenerala sekretario klarigis, ke en Koreio la serpentoj multloke estas tre malsovaĝaj kun kiuj la lokuloj vivas pace. Oni uzas tiujn serpentojn kiel domgardistoj, simile kiel eŭropanoj uzas hundojn por gardi la domon kaj la ĝardenon. La homoj vivas en la domoj kaj la serpentoj vivas kun ili subtere sub la domoj kaj dumtage ili plurfoste grimpas sur la barilojn.

Dum ni paroladis pri tio, mi pligrandigis la kapojn de la serpentoj kaj mi vidis, ke nia universitata serpento kaj la serpentoj troveblaj en la interreto havis malsimilajn figurojn. Rigardinte la bildojn pli detale ankaŭ la ĝenerala sekretario konsentis kun mi, simile kiel la fungo-kontrolisto en la placo Moskvo en Budapeŝto en mia juneco.



Tiuj timigaj statuoj gardas la pordegon de la Silsangsa



Li proponis ke mi zorge kontrolo la kapon kaj mi komparu la kapon de nia serpento kun la kapo de aliaj serpentoj kiuj troveblis en la interreto. Kaj li donis al mi ankaŭ praktikan konsilon, li proponis al mi, ke mi faru kion la monaĥoj faras. En tiuj lokoj kie abundas serpentoj, la budhismaj monaĥoj kutime kunportas grandan bambuobastonon kaj dum irado ili pikadas la teron. La serpentoj bone aŭdas tion kaj ili pace foriras el la vojo de la monaĥoj por ke la monaĥoj ne surtreti ilin.

Sed ne nur ruĝaj kaj nigraj serpentoj vivis tie en nia ĉirkaŭaĵo, sed krom tiuj relative maloftaj specoj ankaŭ grizaj serpentoj estis ĉiutagaj. Ankaŭ ili ŝatas sunumi sur ŝtonoj, sed kiam mi proksimiĝis al ili tiam ili malrapide retiriĝis en la herbejan ĝardenon. Tie ili povis kaŝiĝi pli bone kaj la homoj povis vidi ilin pli malfacile. Kvankam ankaŭ inter ili estis iuj, kiuj kaŝiĝis inter la ŝtonojn kiam ili rimarkis min.

Ĉar laŭ la bildoj neniuj povis diri en la universitato al kiu speco la serpentoj apartenis, tial mi sendis la bildojn de la serpentoj al miaj amikoj. Respondante Min Hyeonkyeong (esperante Minmin), la ĝenerala sekretario de Korea Esperanto-Asocio skribis tuj, ke ili atendos min kore lunde en la lingvokurso, sed mi ne kunportu la serpentojn al Seulo. An Jinsim, mia alia seula amikino respondis iom pli serioze. Ŝi pronis, ke mi konduku atenteme al tiuj serpentoj kaj mi ne lasu miajn ŝuojn nokte ekster la domo, ĉar la serpentoj volonte kuŝas en ilin en la malvarmaj noktoj.

Laŭ An Jinsim tiu ruĝa serpento nomiĝas 꽃뱀, kio signifas planka serpento kaj ĝi ne estas tro danĝera. Mi skribis al ŝi, ke se mi portus miajn ŝuojn en la loĝejon, tiam ĉiuj homoj en la kampuso havus malbonan opinion pri mi, ĉar en Orienta Azio estas maldeca kutimo konservi ŝuojn en la ĉambroj. Ŝi respondis, ke tio ne gravas, ĉar ankaŭ en la regiono kie ŝi loĝis, la homoj portis siajn ŝuojn en la domon pro la serpentoj.

Hong Sungcho estas tre okupata supermezlerneja vicdirektoro kaj instruisto de biologio, kiu kutime ne respondas al miaj malpli gravaj leteroj. Sed nun li respondis tuj kaj li skribis, ke mi estu tre atentema

kaj singardema pri tiuj serpentoj. Laŭ li la ruĝaj serpentoj nomiĝas 능구렁이 kaj la grizaj nomiĝas 구렁이. La unua vorto signifas „*flava makulita serpento*” kaj la alia signifas „*grandega serpento*”.

La studentoj ĝis nun ne tre atentis tiujn bestojn, sed nun kiam ili vidis kiom detale mi okupiĝis pri la temo, ankaŭ ili komencis rigardadi en la reto kiom danĝeraj estas tiuj bestoj. Ili trovis tie multajn terurajn historiojn, inter kiuj la plej stranga okazis en Ĉinio. Tie vivis sinjorino Liu en Shuangchen urbo de Heilongjiang provinco, kiu aĉetis botelon da serpenta brando. Oni faras tiun drinkaĵon per enmeto de vivanta serpento en botelon de rizobrando. Mi vidis multajn similajn drinkaĵojn en Orienta Azio, kie oni konservis serpenton en forta alkoholo dum longa tempo en travideblaj buteloj.

Oni pensas en la Malproksima Oriento, ke tiu drinkaĵo havas diversajn kuracajn efikojn, ĉar ili pensas, ke la serpento en tiu alkoholo suferante eligas sian - onidire kuracan - venenon en la likvaĵon. La ĉina virino drinkadis la alkoholaĵon dum kelkaj semajnoj el la botelo kaj post tri monatoj ŝi volis meti plian alkoholon en la butelon. Tiam la serpento, kiun oni pensis jam tri monatojn morta, leviĝis kaj mordis la manon de la virino. Oni portis ŝin tuj al malsanulejo kaj danke al la rapida kuracista helpo ŝi sukcesis travivi sen granda problemo la nekredblan historion.

Post rakonto pri la serpentaj historioj ni iris kun la studentoj kaj la ĝenerala sekretario de la bioproduktista asocio al la monaĥejo tra arbara vojeto por tagmanĝi. La arbarflanka pordo de la manĝejo estis malfermite, do mi volis iri tra ĝi en la manĝejon. Sed la aliuloj diris, ke ni ne rajtis trairi tien, ĉar nur monaĥoj rajtis uzi tiun enirejon.

Mi tute ne sciis tion pli frue kaj tiel jam plurfoje okazis, ke mi eniris la domon tra tiu malpermesita pordo. Estis tiel, ĉar la vojeto inter nia kampuso kaj la monaĥeja manĝejo kondukis ĝuste al tiu pordo. Ŝajnas al mi, ke dum pluraj semajnoj mi kondukis malĝentile, sed pro tradicia korea ĝentileco neniu diris tion al mi.

PACINSTRUADO EN LA LANDO DE MILITO

En la Namkang Lernejo parto de la partoprenantoj tranoktis en la lernejo mem, alia parto – kun mi – en proksima hoteleto. Malgraŭ la relative varma vetero la plankhejtado funkciis dum la tuta nokto. Ni vidis matene, ke la suba tubaro estis hejtita per tradicia korea lignoforno. Laŭ korea maniero ankaŭ en tiu hoteleto ni dormis surplanke kvar-kvinope en unu ĉambro.

Pro la diversaj vivkutimoj de la samĉambranoj iuj ankoraŭ noktomeze lumigis la lampon kaj parolis laŭte, aliaj je la kvina matene vekigis kaj komencis laŭte babili. Kiam ni iris je la sepa horo matene al la arbara lernejo, tiam ni vidis, ke tie ankoraŭ ĉiu dormis, ĉar ili finis la interkonan vesperon nur malfrue: je la dua horo post noktmezo.

La dommastro de la renkonto, D-ro Urso kaj lia edzino ankaŭ tiun tagon dorlotis la partoprenantojn per bonegaj manĝaĵoj. Antaŭe li laboris kiel direktoro de malsanulejo, eble eĉ nun li laboras tie kaj oni estimas lin kiel malavara subtenanto de la korea Esperanto-komunumo. Kiam li estis la prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, tiam li subtenis la asocion per unu milionoj da wonoj monate. Danke al liaj bonegaj personaj rilatoj la posedantoj de la Namkang Lernejo en ĉiu jaro disponigis la lernejon al Esperanto-renkontiĝoj.

Post la adiaŭa tagmanĝo de la renkontiĝo ni veturis denove per buseto al la fervoja stacidomo de Dong-Daegu kaj de tie plu per trajno al Seulo. Mi estis iom senpacienca, ĉar en mia hotelo la akceptejo funkciis nur ĝis la oka vespere kaj mi sciis, ke mi alvenus nur je la naŭa. Tial miaj esperantistaj kunvojaĝantoj telefone demandis la hotelon kiel mi povus ricevi la ŝlosilon post la naŭa horo. En la akceptejo oni estis tre helpemaj kaj diris, ke ili estos proksime kaj mi povas ricevi mian ŝlosilon ĉiam ajn.

La venontaj semajnoj pasis plejparte per instruado kaj pli kaj pli da veturado. Kiel mi skribis antaŭe la novaĵo pri la bonaj rezultoj de nia fremdlingvo-instruado en la Indramang Universitato rapide disvastiĝis kaj mi ricevis pli kaj pli da invitoj por gvidi lingvajn kursojn per mia speciala parolkapablo-evoluiga maniero.

La pasintan semajnon mi jam estis survoje ĉiun tagon de la semajno. Lunde matene mi veturis per aŭtobuso de la Ĝiri-montoj al la ĉefurbo kaj tuj post la alveno mi komencis instrui esperanton por komencantoj. Poste mi prelegis en socioscienca konferenco kaj estis nur hazardo, ke mi ne devis post la lasta studhoru tuj reiri per nokta buso al la Ĝiri-montaro.

La lundan matenon mi pasigis en mia kutima seula gastejo kaj nur mardo matene mi reveturis al la Jirisan. Tie mi faris miajn kutimajn prelegojn en la Indramang Universitato kaj merkrede matene mi veturis al Busan por fari prelegon tie por la studentoj de la knabina supermezlernejo. Mi aranĝis la veturon tiel, ke ankaŭ estu tempo iri al la fiŝmerkato Jagalchi por tagmanĝi bonan pecon da ruĝe rostita freŝa fiŝo.

Kvankam mi devintus reveturi la saman tagon inter la montojn, sed ĉar ne estis nokta buso, mi nur matene povis reveturi tien. Tiel mi povis fari mian anglan lingvokurson en la Silsangsa Jakeun Hagkyo Eonnine supermezlernejo nur iom poste. Poste mi gvidis la Esperanto kurson en la Indramang Universitato kaj vendrede matene mi veturis denove en la ĉefurbon. Tiun tagon mi faris prelegon en la Kyung Hee Universitato, pli precize en la seula kampuso de la Kyung Hee Dae Hagkyo.



La grandega renesanca pordego de la Kyung Hee Universitato

La Kyung Hee Universitato estas tute alia institucio kompare al modesta, malgranda, nove fondita Indramang Universitato en kvieta arbara monaĥeja ĉirkaŭaĵo. Ĝi estas unu el la plej renomaj universitatoj de Koreio, kie tridek mil studentoj studas kaj kie 1438 plentempaj ordaj profesoroj instruas. Antaŭ semajno mi jam faris similan prelegon en ĝia suwona kampuso kaj poste mi iris al ĝia seula kampuso por respondi al la demandoj de la studentoj de la Humanistika Fakultato. La grandega renesanca pordego fascinas la preterpasantojn, la konstruaĵo ŝajnas esti pli grandioza ol la pariza triumfarko.

La universitato havas kampuson ekster Seulo kaj Suwon ankaŭ en Gwangneung, kie oni instruas la studentojn kaj subtenas studajn programojn en dudek ĉeflernejaj fakultatoj, 97 katedroj kaj ĉeffakoj, 65 majstraj programoj, 63 doktorigaj programoj, 15 fakaj pluedukaj lernejoj kaj 53 esplorinstitutoj. La Medicina Centro de la Kyung Hee Universitato estas la sola loko en la mondo kie oni aplikas kune la okcidentajn kaj orientajn medicinajn metodojn. La vastan rekonon de la universitato montras la kontraktoj kun 482 partner-institucioj en 75 landoj rilate al la reciproka rekono de kredit-poentoj akiritaj ĉe la partneroj kaj enkalkulo en la plenumoj de studentoj.



Loĝejo de Hae Kang Suenim, Inmangdae prezidanto

Kvankam ni komencis la instruadon en la Indramang Universitato nur antaŭ kelkaj monatoj, tamen nia famo jam komencas disvastiĝi en la lando. En la universitataj forumoj unue ĝuste en la 대학주보 (Daehak Jubo, esperantlingve: Universitata Semajno), semajna organo de la Kyung Hee Universitato aperis novaĵo pri nia agado en ĝia numero la 19-an de majo.

Kiam mi estis tie, tiam la universitato prepariĝis al grava evento, ĉar ĝuste tiam oni preparis la jam tradician Someran Programon por Globala Kunlaboro. Tiu programo origine okazis kunlabore de la Kyung Hee Universitato kaj la Pennsylvania Universitato, sed al ili poste aliĝis ankaŭ pluraj aliaj renomaj universitatoj kaj internaciaj organizaĵoj, ekz. UNO (Organizo de Unuiĝintaj Nacioj), CoNGO (UNO-konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj), ktp.

La programo estis malfermita, iu ajn studento rajtis aliĝi, kvankam la prezo de la unumonata kurso estis sufiĉe alta. La studkostoj por koreoj estis 300 mil wonoj, por eksterlandanoj 2500 dolaroj, al kiu aldoniĝis ankaŭ la manĝokostoj kaj aliaj ceteraĵoj. Malgraŭ tio la programoj estis tre sukcesaj en la pasintaj jaroj. D-ro Jongpil Chung, vicrektoro de Globala Akademio de Estontaj Civilizoj esprimis sian esperon, ke la studentoj kaj la prelegantoj povos trovi tiujn normojn, taskojn kaj celojn, kiuj povos unuigi la diversajn landojn kaj popolojn en la 21-a jarcento. Mi pensas, ke tio estas speciale grava tasko en la lando, kiu estas jam dum pli ol 60 jaroj en milita stato kun sia najbaro, ĉar fine de la korea milito ili subskribis nur pafopaŭzan kontrakton, packontrakton oni ĝis nun ne sukcesis fari.



HUNDBAZARO EN EŬROPO KAJ AZIO

Iun vesperon 이경재 (Lee Gyeongjae), la ĝenerala sekretario de nia Indramang Universitato invitis nian grupon vespermanĝi picon en proksiman urbeton Namwon. En la alternativaj universitatoj la studentoj kaj la instruistoj kelkfoje vespermanĝas kune en neformala maniero en bonetosa loko. Ni elektis duspecajn picojn. Krome ni ricevis italecan rostitan nudelon kaj rostitan kokinaĵon, apude dolĉigitan acidan kukumon. Poste ni iris al kafejo kie ni gustumis lokajn glaciaĵo-specialaĵojn kaj afrikan kafon, alian specialaĵojn de la kafejo. Mi petis senkafeinan kafon, sed mi ne certis ĉu mi ricevis tian. Ĉiukaze la kafo estis tute amara kaj mi ne vidis sukerujon en la kafejo. Ŝajne en la Malproksima Oriento ankaŭ tion oni uzas aliel ol en Eŭropo. Ni, eŭropanoj trinkas la kafon kaj teon kun sukero, sed ili (azianoj) amare. Krome ankaŭ la panon, ekzemple la rostitan pantanĉon ni manĝas sale kaj ajle, dum ili vendas similan panon dolĉe en la koreaj „Paris Baguette” bakejoj.

En iu semajnfino mi veturis al la ĉefurbo pro aranĝo „*Tago de Pioniroj*”. En Korea Esperanto-Asocio oni regule memoras pri la fondintoj de la Esperanto-movado kaj pri la personoj, kiuj signife kontribuis al la progresigo de la Esperanto-komunumo. En tiu jaro oni memoris pri Lee Chae-Hyon, kiu fariĝis konata en la Esperanto-mondo kiel Hajpin Li. Li estis entombigita en la tombejon de herooj en Seulo ĉar li junaĝe heroe batalis por liberigi Koreion kontraŭ la japanoj.

Kadre de la „*Tago de Pioniroj*” ankaŭ ni vizitis lian tombon en la nacia memortombejo, kie lia filo memorparolis pli la vivo de Hajpin Li. Li diris, ke lia patro pasigis sian junaĝon en Ĉinio, li konatiĝis tie kun la Esperanto lingvo kaj li komencis instrui ĝin por ĉinoj. Post la dua mondmilito li revenis al Koreio kie li fariĝis vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio. Li aperigis du Esperanto vortarojn kaj fondis ankaŭ tri Esperanto revuojn krom eldono de pluraj libroj. Pro lia honorigo lia filo fondis mil-eŭran premion, kiun ĉiujare UEA transdonas al iu, kiu efike kontribuas al la disvastigo de la Esperanto lingvo kaj kulturo.

Kiam en aprilo mi alvenis al la Malproksima Oriento, tiam multaj arboj havis ankoraŭ fermitajn burĝonojn en la arbaroj de la Ĝiri montoj

kaj oni ankoraŭ ne plantis la rizplantidojn en la horizontalajn rizparcelojn en la montara regiono. En Orienta Azio la deklivojn oni uzas por terasa kultivado, kie montaj riveretoj desupre ĉiam fluetas kaj uzante tiun freŝan akvon oni akvumas la terasajn parcelojn.

Ankoraŭ ne pasis la sezono de la oranĝograndecaj dolĉaj fruktoj similaj al melonoj, mi povis vidi ilin en multaj fruktovendejoj en la tuta lando. Malgraŭ ke ili estis produktitaj sub folio en verdaj domoj, oni jam povis aĉeti ilin en aprilo. Mi vidis tiujn fruktojn eĉ fine de junio ĉie en la merkato. Kiel ĉiuj fruktoj, ankaŭ ili kostas multe malpli en la urboj ol en la vilaĝoj. Tial mi kutime aĉetis tiujn ĉe fruktovendejo antaŭ la Dong Seoul Intercity Bus Terminal, kie ili kostis 50 %-ojn malpli ol apud busstacio en Inwol proksime al mia universitato.

Kiam mi alvenis al Koreio, tiam la „ume” (koree mesil) fruktarboj en la ĝardeno de la universitato ankoraŭ ne estis verdaj, ĉar la folioj ankoraŭ ne venis el la burĝonoj. Tiam nur la floroj de la arboj allogis la abelojn el la apudaj arbaroj. Intertempe ne nur la arboj verdiĝis, sed ankaŭ iliaj fruktoj maturiĝis. La studentoj de la universitato kolektis la verdajn fruktojn en grandegaj siteloj. La fruktoj similis al abrikotoj. Mi demandis mian amikinson en Japanio kiel mi povus manĝi tiujn fruktojn, ĉar mi aŭdis, ke en la Malproksima Oriento ili estas tre popularaj kaj oni uzas ilin preventi aŭ kuraci tre multajn malsanojn en Ĉinio kaj Japanio.

Mi legis la leteron de Hideko san seniluziigante, ĉar ŝi skribis, ke oni ne povas manĝi umeojn krude, ĉar ili estas acidaj kaj eĉ venenaj. Sed eblas fari el ili bonegajn siropojn, marmeladojn kaj alkoholajn drinkaĵojn. Eĉ kiel piklojn oni manĝas ilin en Japanio konservanta per salo. La alkoholajn drinkaĵojn cetere oni ne faras per fermentado de la frukto sed per macerado en alkohola botelo, kie ĝiaj kuracaj substancoj disvolviĝas en la alkoholo.

Mi rimarkis en mia kurso en la Seula Filio de Korea Esperanto-Asocio, ke la kursanoj ne bone komprenis la diferencon inter la diversaj formoj de kondicionalo. Tial por ekzercigi tion mi ellaboris interesan dialogon inter korea paro. Ĝi fariĝis tiom populara, ke oni proponis publikigi ĝin en la reton inter aliaj studmaterialoj. Estis popularaj an-

kaŭ la lingvoekzercaj taskfolioj faritaj por la studentoj de la Indramang Universitato, oni komencis uzi ilin ankaŭ en aliaj lernejoj por evoluigi la parolkapablon. Tial ni decidis, ke tiujn ekzercarojn ni eldonos ankaŭ libroforme.

Mi okupiĝis en niaj kursoj ne nur pri instruado de eŭropaj lingvoj, sed mi ankaŭ provis konatigi la aŭskultantojn kun la eŭropa historio kaj kulturo. Por fari la interparolojn pli interesa mi rakontis al la kursoj diversajn rakontojn pri la fama hungara reĝo Matiaso. En Hungario ĉiu konas la onidiron „*Hundbazaro estis nur unufoje en urbo Buda!*” kaj ĉiu konas la originon de tiu diro. Laŭ la legendo reĝo Matias vojaĝis tra la lando kaŝvestite kaj punis la egoismajn kaj avaraĵajn riĉulojn kaj provis helpi per diversaj trukoj la malriĉajn sed honestajn kamparanojn.

Iam la reĝo vidis kamparanojn pluki sian teron per siaj malfortaj, maldikaj ĉevaloj kaj vidis, ke lia riĉa najbaro ne helpis al li, kvankam li laboris kun kvar bovoj. Tiam la reĝo proponis al la malriĉulo vendi siajn ĉevalojn kaj aĉeti hundojn kaj porti ilin al la ĉefurbo Buda, al la reĝa sidejo por vendi ilin por multe da mono. Tie laŭ la instigo de la reĝo la riĉaj urbanoj foraĉetis la hundojn multekoste per oraj moneroj. Sed kiam la egoisma najbaro volis fari same kaj havi multege da mono, tiam la urbanoj diris al li, ke li reiru kun siaj hundoj al sia vilaĝo, ĉar „*Hundbazaro estis nur unufoje en urbo Buda.*”.

La mesaĝo kaj la morala instruo de tiu rakonto estas klara por ĉiu hungaro, sed mi vidis, ke la koreoj tute ne komprenis la esencon de la rakonto. Kiam ni parolis pri tio, tiam mi vidis, ke kompreni tiajn aferojn oni devas koni ankaŭ la kulturon kaj la kutimojn de la koncerna lando. Ĉar sen tio la tuta rakonto fariĝas nekomprenebla. La koreoj ne sciis, ke en la mezepoka Hungario hundoj estis senvaloraj bestoj, ĉar ili libere sovaĝe vivis kaj vagadis en la arbaroj kaj la hundojn ofte hundokaptistoj kolektis kaj pereigis. En Koreio la hundo estis bongusta manĝaĵo kaj ĝia prezo estis pli alta ol la prezo de aliaj breditaj bestoj.

Iun tagon la studentoj de la Indramang Universitato elpensis, ke la vesperan studhoron ni faru ne en la universitata prelegejo, sed en la Himalaja Kafejo, en la laborejo de Inae, unu el niaj studentinoj. Tiu

kafejo estis en unuhora piedira distanco de la universitato kaj survoje oni devis trapasi valojn, montojn, ĉefe en nelumigitaj arbaraj vojetoj. Dum la studhoroj ni trinkis malproksim-orientajn trinkaĵojn kaj manĝis kukojn, mi gustumis trinkaĵon faritan el ume-frukto. Post la studhoroj ni iris reen al nia tranoktejo sur la lunlume lumigita arbara vojeto kaj dumtempe aŭskultis la zumadon de la Mansucheon rivereto kaj la koncerton de ranoj en la apudaj lagoj.



Fine de la semestro okazis mia prelego en la seula kampuso de la Kyung Hee Universitato. La studentoj prepariĝis renkonti min tre zorge. Ili faris tre profundajn fakajn demandojn, kiujn diskuti detale oni bezonus unu-dutagan konferencon. Ekzemple ili interesiĝis pri la rilatoj inter la publika administrado kaj la ekonomia evoluo, aŭ kio estis la kaŭzoj kaj kiuj estus la perspektivoj de la nuntempaj ekonomiaj krizoj en Usono, Eŭropo kaj en la Malproksima Oriento. Mi ricevis ankaŭ personajn demandojn, ekzemple: kiujn turismajn vidindaĵojn mi proponus viziti ĉe ni por koreoj. Kaj koncerne la ĵus pasintan ŝiptragedion la studentoj demandis: ĉu la homa senrespondeco ankaŭ en Eŭropo kaŭzis similajn tragediojn.

LA ADIAŬAJ TAGOJ

En la lasta semajno en nia universitato oni organizis konferencon por lingvoinstruistoj, kie ni faris model-lecionon. La instruistoj, venintaj el diversaj partoj de la lando agnoskis niajn rezultojn vidante, ke niaj studentoj post dumonata lernado flue komunikiĝis en la internacia lingvo. Ankaŭ la gvidantaro de la universitato estis kontenta pri la rezultoj kaj petis min dum pluraj venontaj jaroj daŭrigi la instruadon en la universitato. Sed mi diris, ke eble tio ne estos bezonata, ĉar post la dua semestro almenaŭ kvar studentoj kapablos daŭrigi la instruadon memstare. Du el ili estas plentempaj studentoj kaj du venas el la apudaj vilaĝoj kiuj partoprenas nian lingvokurson apud laboro.

Krome oni petis min ankaŭ en la Silsangsa Jakeun Hagkyo supermezlernejo daŭrigi mian anglalingvan parolkapabligan kurson kaj ili promesis kunordigi la studplanon kun la studprogramo de la universitato kaj pro tio mi ne bezonos veturadi per noktaj busoj inter la ĉefurbo kaj la Ĝiri montaro. Eĉ ankaŭ el Japanio mi ricevis inviton fari prelegon en novembro apud Tokio en urbo Tiba, en kultura seminario dum la semajno kiam en la Indramang Universitato la instruado paŭzos. Tial nun mi reiros al Eŭropo por mallonga tempo, sed revenos denove en septembro en la brakumajn brakojn de Budho por daŭrigi la instruadon en la pli ol mil ducent jara malnova budhisma monaĥejo.

En la semajnoj antaŭ mia forveturo miaj kolegoj adiaŭis min per bankedecaj vespermanĝoj. Tiuj eventoj okazis kelkfoje en la ombroj de 40-50-etaĝaj seulaj nubskrapuloj, kelkfoje en pitoreskaj etaj montaraj urbetoj. Inter tiuj estis por mi speciale memorinda la adiaŭa vespermanĝo en urbo Jinju (prononco: Ĝinju) en la Ĝiri montoj, ĉar ĝuste tiam okazis en la urbo la folkloro festivalo de muzikistoj kaj dancistoj. Ili estis vestitaj bunte, en historiaj kostumoj kaj la plej intereso parto de la programo estis la laŭtaj tamburfrapadoj. Post la rigardo de la folkloro festivalo ni promenis al memorejo ĉe la bordo de rivero Nam, kie okazis unu el la heroaj epizodoj dum la milito kontraŭ la japanaj invadintoj.

Okazis tie, ke bela, juna virino nomata Nongae amuzigis japanan kolonelon kiel „*gisaeng*” (simila al gejša en Japanio) kaj oferis sian vivon por sia patrujo. Ŝi invitis la japanan kolonelon promeni al riverbordo, tie ŝi brakumis la invadintan soldatan komandanton kaj tiris lin en la abismon en la riveron, kie ambaŭ mortis. Tiu roko hodiaŭ estas grava historia memorejo kie la vizitantoj memoras la sinoferan agon de la korea belulino kaj pri la sepdek mil koreaj viktimoj mortintaj en la atako ĉe fortikaĵo Jinju.

Post miaj lastaj busanaj studhoroj ni iris same al restoracioj kun la lokaj instruistoj, kie ni manĝis akran oktopusan raguon kun multege da fabĝermoj. Mi sidis ĉe la tablo apud profesoro D-ro Kim Ilchul kiu proponis ke mi faru prelegojn en la dua semestro en la Humanistika Fakultato de la Dong-Eui Universitato en Busan pri la rolo de publikaj rilatoj kaj merkatico en la novevoluintaj ekonomioj de orienteŭropaj landoj post la falo de komunismo. Kaj ankaŭ en Seulo mi partoprenis komunajn vespermanĝojn post miaj lastaj studhoroj, tie ni manĝis sepio-raguojn en kies saŭco oni kutimis verŝi ankaŭ kuiritajn rizojn

Ankaŭ la prezidanto de la korea ILEI lingvoinstruista asocio faris bankedon por mi antaŭ mia forveturo, ĝi okazis same en urbo Jinju. Tie ni manĝis diversajn kuiritajn krabojn kaj marajn konkojn en diversaj akraj saŭcoj. Kelkaj kraboj estis ruĝaj en la supo dum aliaj restis brunaj. Ĉiuj estis bongustaj, sed la tondiloj de la kraboj havis fortajn kirasojn, oni povis kraki ilin nur per forta tondilo kaj rezulte venis nur kelkaj dekagramoj da blanka viando desub la kirasoj.

Ankaŭ la studentoj de la Indramang Universitato aranĝis kortuŝan kandelluman adiaŭan vesperon honore al mi en la lastaj tagoj antaŭ mia forveturo. Tiufoje la vespermanĝo estis tre speciala, ĉar laŭ mia memoro okazis la unuan fojon post pluraj monatoj, ke la menuo ne estis bibimbapo. Ili metis korformajn kandelojn sur la tablojn kaj transdonis iliajn salutparolojn kaj poemojn, kiujn ili verkis por tiu tago. La facilan lerneblon de Esperanto kaj ĝian taŭgecon por internacia komunikado pruvis la fakto, ke studentoj studintaj Esperanton apenaŭ dum du monatoj dufoje semajne po unu kaj duonhore, jam kapablis esprimi siajn pensojn en tiu lingvo jene:

„Printempo venis kaj ankaŭ vi venis al ni. Vi instruis Esperanton al ni. Sed ĝi estis ne nur lingvo. Ĝi estis 'Espero'. Nun ni povas paroli en Esperanto kvankam ni estas blankaj, flavaj aŭ nigraj. Ni aŭskultis, ke vi kantis en Esperanto. Floroj floriĝis kaj ni flaris ilin. La tagoj longiĝis. Poste la arboj estiĝis verdaj kaj la somero venis. Vi baldaŭ forvojaĝos kaj ni loĝos sen vi mallongtempe. Ĝis revido, Gabor. – La gestudentoj da la Indramang Universitato. Ni amas vin.”

En la adiaŭa vespermanĝo mi parolis pri tio, ke kiam mi alvenis ĉi tien inter la montojn, tiam mi konis neniun kaj neniu konis min. Sed post kiam mi komencis instrui diversajn lingvojn en kaj ankaŭ ekster la Indramang Universitato en la lokaj lernejoj inter la montoj, tiam subite mi spertis, ke mi havis multege da konatuloj en tiuj vilaĝoj. Mi kompreneble ne povis memori ĉies vizaĝojn, tial estis por mi embarase, ke en la bushaltejoj pli ol duono de la preterpasantoj salutis min. Tiuj homoj estis aŭ miaj studentoj aŭ instruisto-kolegoj en aliaj lernejoj, aŭ familianoj de miaj studentoj. Tial mi devis ĉiam atenti kaj esti preta resaluti eĉ nekonatajn homojn sur la stratoj. Mi sciis, ke homoj povis saluti min iam ajn kaj tiam ankaŭ mi devis reciproki la salutojn kaj ankaŭ mi devis profunde kaj dece kliniĝi laŭ la tradicia orientazia salutmaniero.

Krom la adiaŭa vespermanĝo kun la studentoj ankaŭ la organiza sekcio de la universitato ŝatintus vespermanĝi kun mi, sed tiu vespermanĝo ne povis okazi ĉifoje. La busana Esperanto-komunumo organizis muzikan koncerton kun kradrostado la saman vesperon kaj ili invitis ankaŭ min lastminute al tiu amika renkontiĝo. Ili eĉ sendis aŭton al la monaĥejo por kunporti min al la evento. Tiel la lastan tagon antaŭ mia forveturo mi pasigis en tiu komunumo, kie mi devis tre atenti por ne troŝarĝi mian stomakon kun la bongustaĵoj ĉe la kradrostado, ĉar mia stomako jam al kutimiĝis al pli simplaj monaĥejaĵoj dum la lastaj monatoj.

La postan tagon de la festo miaj gastigantoj organizis ankaŭ mian pluveturon. Tiu zorgemo ŝajnis eĉ iom tro. Ili ne nur portis min al la loka busstacio, sed ili organizis ke iu atendu min en la seula busstacio por montri al mi la haltejon de la venonta buso kiu portos min al la incheona internacia flughaveno. Mi tre serioze petis ilin, ke oni ne

organizu tian akompanion, ĉar mi jam pli ol cent foje veturis sole per la seula metroo kaj pro tio mi povus sole iri per metroo al la flughaveno. Malgraŭ tio ili organizis la aferon kaj mi vidis, ke esperantista sinjorino atendis min je mia alveno en la seula busstacio. Ŝi tute ne komprenis, kial mi akceptis ŝin iom ĝenite kaj kial mi taksis ŝian helpemon superflua.

Retro rigardante la pasintajn monatojn mi povas diri, ke estis plenŝtopita kaj bunta epoko tiuj tri monatoj en mia vivo, plena de renkontoj kun interesaj homoj kaj ekzotikaj vojaĝoj. Interterpe nova universitato naskiĝis antaŭ miaj okuloj en la pitoreskaj valoj de la Ĝiri montoj, kaj estiĝis nova Esperanto-komunumo inter la muroj de la universitato. La membroj de tiu komunumo espereble kapablos poste vastigi siajn internaciajn rilatojn ankaŭ pere de Esperanto, la lingvo de internacia paco kaj amikeco. La membroj de tiu komunumo aliĝante al la tutmonda kluba reto de esperantistoj espereble vojaĝos mem tra multaj landoj de la mondo kaj kiel membroj de tiu tutmonda komunumo povos pli bone ekkoni la mondon, en kiu ni vivas en la unuaj jardekoj de la 21-a jarcento.

Krom la universitata instruado dum mia korea restado mi havis tempon ankaŭ studi la instruojn de Budho kaj sperti la belecojn de la vivo en budhismaj monaĥejoj, kiuj dum pli ol dumil jaroj estis kaj eĉ nun estas gravaj kaj signifecaj por kvincent miliono da homoj. Partopreninte la vivon de diversaj esperantistaj komunumoj mi povis rigardi en la mondon de abundo kaj riĉeco, kiam mi partoprenis en bankedecaj vespermanĝoj kaj multkoloraj kulturaj programoj post miaj instruadoj en la seula Esperanto-centro, aŭ en la namkanga kaj busana lernejoj.

Dum mia nuna restado en Koreio mi veturadis proksimume tridek mil kilometrojn inter Seulo kaj la Ĝiri montaro kaj inter la Indramang Universitato kaj la marboda Busan kaj inter la Silsangsa kaj la montara Namkang Lernejo apud Daegu. Dum la longa vojaĝado mi ĉiam spertis, ke veturado signifas ne nur moviĝon de loko al alia loko, sed ankaŭ multajn neforgeseblajn travivaĵojn pri kiuj indas rememori.



Terasaj rizkampoj kaj ekskurso en tradicia korea vilaĝo



DENOVE EN EŬROPO

Dum mia longdaŭra vojaĝo en Koreio kaj Japanio mi sukcesis konatiĝi kun la vivo kaj manĝkutimo de orient-aziaj popoloj kiuj vivas dekmil kilometrojn de mia hejmlando. En ĉiu tiu libro mi detale traktis la temon ke mi spertis ĉiutage en Koreio ke koreoj manĝas rizaĵon kun kimĉio trifoje tage kaj mi bone lernis, kiel oni produktas kimĉion el brasiko. Koreoj konservas kaj fermentigas brasikojn en salo kaj aldonas ajlon, zingibron, cepon kaj paprikon por plibonigi la guston. En Koreio oni manĝas kimĉion tre ofte ne kiel krommanĝaĵo, sed koreoj kutime miksas tiujn peklaĵojn kun rizaĵo. Tiu manĝaĵo nomiĝas bibimbap en korea lingvo kaj tio estas eble la plej populara manĝaĵo en Koreio. La signifo de bibimbap estas miksitaj rizaĵo. Por koreoj la bibimbap estas pli bongusta, se oni miksas ĝin kun marherboj kaj sekigitaj algoj kaj se oni aldonas ankaŭ dolĉan saŭcon.

Kvankam en Koreio oni manĝas kutime orient-aziajn manĝaĵojn tamen troveblas ankaŭ multnombraj francaj bakejoj en la grandaj urboj. Mi ĉiam povis trovi bakejon „Paris Baguette” proksime al miaj gastejoj kie mi povis manĝi ankaŭ panon al kiu mi al kutimiĝis en Eŭropo. Sed strange tiu pano tute ne similis al la pano, kiun oni bakas en hungaraj bakejoj en mia hejmlando. En Hungario la pano estas ĉiam sala kaj neniam dolĉa. Se tio tamen estus dolĉa, tiam oni ne nomus ĝin pano. La dolĉa pano nomiĝas kuko en mia lando.

En Koreio la bakistoj tre ofte aldonas sekigitajn fruktojn, dolĉajn fafojn aŭ batatojn al la pano, eĉ ĉokoladon kaj vanilon. Estis surprizo por mi, ke en Koreio oni aldonis sukeron ankaŭ al kolbaso, kiu estus tute neimagebla en Hungario. Tio estis stranga por mi kaj pro tio post kelkmonata restado en Orienta Azio mi jam sopiris revojaĝi al Eŭropo por gustumi salan panon kaj salan kolbaszon al kio mi al kutimiĝis en mia infaneco.

Mi revojaĝis al Budapeŝto tra Istambul post longa kaj laciga flugado. Antaŭe ni planis, ke mi vojaĝos kune kun dek koreaj esperantistaj studentoj kaj instruistoj, sed ili ne sukcesis trovi liberajn seĝojn en mia flugmaŝino. Pro tio ili rezervis seĝojn en alia flugmaŝino kaj ili alvenis al Eŭropo tra Moskvo kelkajn horojn antaŭ mia alveno. Ni planis, ke ili gastigos en mia domo dum unu semajno kaj poste vojaĝos al orienthungara urbo „*Jászberény*” por partopreni la progra-

mojn de Internacia Junulara Lingvotendaro. Sed unu el la studentoj malsaniĝis kaj pro tio nur naŭ koreoj povis veturi al Hungario.

La koreoj pensis, ke post la longdaŭra vojaĝo mi eble estis tro laca, pro tio ili proponis, ke ni ne hejme kuiru, sed ni iru tagmanĝi en proksima restoracio. Tie ni mendis diversajn supojn, frititajn vianĉaĵojn kun terpomo aŭ nudelo kaj ankaŭ dolĉaĵojn por fini la tagmanĝon. La koreoj diris, ke la manĝaĵo estis bongusta, sed povas okazi, ke ili diris tion nur pro ĝentileco. Mi supozas, ke okazis tiel, ĉar laŭ korea kutimo ili miksis la manĝaĵojn, same kiel ili faras en Koreio kiam ili preparas bibimbapon. La hungaraj gastoj en la restoracio ŝokiĝis kiam ili vidis, ke la koreoj miksis la frititajn porĉaĵojn kaj terpomojn kun la dolĉaĵo. Ĉar en Eŭropo oni neniam farus tion.

Dum la lastaj monatoj mi manĝis nur koreajn manĝaĵojn kaj en la Silsangsa monaĥejo kaj en la Indramang Universitato. Temas pri bibimbapo, kiun mi manĝis sepfoje semajne kaj trifoje tage kun kimĉio kaj sekigitaj algoj kaj marherba supo. Tio estis tro monotona por mi kaj mi jam antaŭĝojis manĝi denove miajn kutimajn eŭropajn manĝaĵojn. Pro tio mi aĉetis multe da sala eŭropa pano, butero kaj bulko kun multaj mondfamaj salaj hungaraj kolbasoj, kiujn mia lando sukcese eksportas ne nur al multaj eŭropaj landoj sed ankaŭ al Ameriko. La koreoj estis tre ĝentilaj. Ili diris, ke ili pensis, ke mi ankoraŭ estis laca, do ili ofertis kuiri ankaŭ hejme ne nur por la korea grupo sed ankaŭ por mi.

Kiam alvenis la dekdua horo, do la tempo por tagmanĝo, tiam la koreoj kun ĝojo anoncis, ke la tagmanĝo estis preta kaj oni invitis min al la tablo. Ili diris al mi kun ĝojo, ke ili sukcesis plibonigi la eŭropajn manĝaĵojn kiujn mi aĉetis en la budapeŝta vendejo. Ili tranĉis la kolbasojn kaj salamojn kaj fritis ilin kun cepoj en oleo. (Estas konate, ke en Eŭropo oni neniam fritas salamojn kun cepoj sed oni faras sandviĉojn el ili por senkuirite manĝi.) Ili informis min, ke ili trovis sekigitajn algojn kaj aliajn marherbojn en mia kamero kaj ili aldonis ankaŭ ilin al la manĝaĵo kaj laŭ korea kutimo ili miksis la tuton kun dolĉa saŭco. Tiel la koreoj tagmanĝis kun granda ĝojo kaj ili tute ne komprenis kial mi ne aprezis la unikan eblecon ke ankaŭ en Eŭropo mi povis manĝi bongustajn orient-aziajn manĝaĵojn.

La kutimoj estas malsamaj en Budapeŝto kaj en la koreaj montaraj vilaĝoj ankaŭ rilate al la malfermo kaj fermo de pordoj. Mi pensas, ke tio rilatas al la kulturaj diferencoj kaj ankaŭ al la situacio de krim-faroj. La instruistino, kiu gvidis la korean studentan grupon vivas en vilaĝa domo en Koreio, kie ne eblas fermi kaj ne eblas malfermi la pordon. Estas tiel, ĉar en ŝia domo ne estas pordo. Ankaŭ en la kampuso de mia Indramang Universitato ne eblis fermi la pordojn de la universitataj domoj. Tiel okazis, ke ekzemple la universitata biblioteko estis ĉiutage malfermite kaj tage kaj nokte, eĉ se neniu estis en la kampuso dum tagoj. Tio estis surpriza fenomeno, ĉar en tiu biblioteko konservis la universitato multajn valorajn maŝinojn, komputilojn kaj printilojn.

Mi estis la sola homo en la kampuso, kiu zorgeme fermis la pordon de mia loĝejo ĉiam, kiam mi vojaĝis el la universitato al aliaj urboj. Miaj koreaj kolegoj kaj studentoj neniam komprenis la kialon de tiu afero, kiu estis stranga kaj nekutima por ili. Sed ili opiniis, ke oni devas akcepti la kutimojn de alilandanoj, eĉ se tiuj kutimoj estas iomete strangaj. Pro tio ankaŭ ili konservis fermite la pordon de mia loĝejo dum tri monatoj kiam mi revojaĝis al Eŭropo dum la somera libertempo. Sed ili pensis ankaŭ pri la ebleco, ke povus okazi, ke neniu estos en la kampuso kiam mi realvenos al mia universitata loĝejo post la fino de la somera libertempo. Do ili timis, ke povus okazi, ke mi ne povos iri en mian loĝejon, se mi trovos mian pordon fermite. Pro tio ili metis paperon sur la pordon kaj skribis mesaĝon al mi per grandaj literoj anoncante, ke mi trovos la ŝlosilon de mia pordo sur la tero, dek centimetrojn antaŭ mia pordo.

Tion oni certe povas fari en Koreio, sed tute ne en Hungario. Estas konate, ke en koreaj vilaĝoj preskaŭ neniam iras nekonata homo en nekonatajn domojn, eĉ se la domoj estas malfermite. Sed tre ofte okazas en Eŭropo kaj ankaŭ en Hungario, ke ŝtelistoj iras en domojn eĉ se la domoj estas fermite. Mi regule legas anoncojn de nia budapeŝta policejo, ke oni proponas, ke ĉiu konservu sian domon fermite kaj neniu lasu nekonatajn homojn iri en sian domon. Tre ofte okazas ke ŝtelistoj diras, ke ili venis kontroli la akvosistemon aŭ la telefonkablojn, ktp. kaj kiam ili jam estas ene de la domo, tiam ili provas rabi aŭ ŝteli.

Pro tio mi surpiziĝis, kiam dum nokto mi eliris el mia domo kaj konstatis, ke ĉiuj koreaj gastoj dormis, sed la pordo estis malfermite. Do iu ajn ŝtelisto kaj ankaŭ katoj aŭ aliaj noktaj bestoj ricevis eblecon iri en la domon. Mi konkludis, ke ambaŭ mi kaj la koreaj studentoj komencis alkutimiĝi. Mi komencis alkutimiĝi al niaj kutimaj eŭropaj vivmanieroj kaj la koreoj ekalkutimiĝis al ekzotikaj kutimoj de stranga kaj ekzotika fora eŭropa kulturo.



La ŝtonlanterno el la Silla epoko estas registrita nacia trezoro

Enhavo

Antaŭparolo	6
Enkonduko	8
Unua parto: EN LA LANDO DE HIBISKOJ	10
Niaj amikoj trovas nin sen adreso	11
Brila kariero kaj monaĥeja soleco	16
Freedom is not free	21
Kiel vilaĝa knabino en la ĉefurbo	26
Leĝo de Murphy	29
Malsukcesaj edukadoj	33
La religio de bonfaro	38
La seminario de lingvoinstruistoj	48
Eĉ se bona, tre estas tro	50
Kiam manĝas mortinto kokajon kun rizo?	54
Post du jaroj	59
La mono ne estas manĝebla	63
Dua parto: EN LA BRAKUMO DE BUDHO	74
La grava ago nuliĝis	75
La vojaĝo al Ithaka	82
Unu lecionon antaŭ la studentoj	87
Ĝis la dika virino ne kantas	95
La juveloj de la reĝino	98
Tragedio sur la maro	101
Vivo en la kampuso	105
Bibimbap	113
La morto de Zamenhof	123
Lingvoinstruado en ok lernejoj	128
So-ga-mu-ni-Bul-So-ga-mu-ni-Bul	140
Kio povas esti la bulgogi?	146
Du ŝercoj, unu pintumo	153
Venenaj fungoj kaj venenaj serpentoj	160
Pacinstruado en la lando de milito	165
Hundbazaro en Eŭropo kaj en Azio	169
La adiaŭaj tagoj	173
Denove en Eŭropo	178

**La libroj de la aŭtoro aperintaj en la libroserio
“ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO”**

- Ruĝa Suno kaj Verda Stelo
- 赤い太陽と緑の星
- Vörös Nap es Zöld Csillag
- 황해를 넘어서
- Trans la Flava maro
- Sudorientaziaj vojaĝoj
- Délkelet-ázsiai utazások
- 东南亚之旅
- A Sárga tengeren túl
- Tavasz a Szentföldön
- A kenguruk földjén
- 인드라마대학 - 에스페란토 강의 (1 부)
- 인드라마대학 - 에스페란토 강의 (2 부)
- Buddha ölelő karjaiban
- Koreio, la kongreslando

**La libroj de la aŭtoro legeblas en la subaj retpaĝoj
en esperanta, angla kaj hispana lingvoj:**

<http://esperantofre.com/mondo/mglibroj.htm>

<http://esperantofre.com/mondo/mgeuropo.htm>

<http://esperantofre.com/mondo/mglegu.htm>

<http://esperantofre.com/mondo/flavae.htm>

<http://esperantofre.com/mondo/flavah.htm>

<http://esperantofre.com/mondo/flavaa.htm>

La aŭtoro de ĉi tiu libro verkis popularan libroserion „*Esperantlingve ĉirkaŭ la mondo*” kaj kelkajn librojn de tiu serio oni jam publikis en hungara, japana, ĉina, korea kaj esperanta lingvoj. Pri la mirindaj libroj de d-ro Márkus Gábor oni konstruis du retpaĝojn en Kalifornio. Ili estas: <http://esperantofre.com/mondo/mglegu.htm> kaj <http://esperantofre.com/mondo/flavaa.htm> La plej nova membro de tiu libroserio estas la „*Koreio, la kongreslando*”.

La 102-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Seulo, Koreio de la 22-a ĝis la 29-a de julio, 2017. Oni diras, ke antaŭ starti vojaĝon antaŭ ĉio vi prenu libron, kiu donas informon pri via vizitonta loko aŭ lando. Jen feliĉe vi prenas la libron, kiu donos al vi unikajn informojn pri la kongreslando, verkita de d-ro Márkus Gábor. Li studis japanan lingvon kaj kulturon en la Nanzan Universitato en Japanio, doktoriĝis pri japana ekonomiko kaj restis en Koreio sufiĉe longe instruante Esperanton. Pro tio, kvankam li estas eŭropano, tamen la azia kulturo ne estas fremda por li. Mi certas, ke li bone prezentas la Esperanto-movadon de Koreio kaj korean kulturon en tiu ĉi libro. Plurfoje mi invitis lin al miaj Esperanto-kursoj en universitatoj kaj en la Seula Esperanto-Kulturcentro, tra kiuj li donis motivojn al komencantaj esperantistoj kaj dividis siajn spertojn pri la monda kulturo kaj homa vivo.

Vere li estas respektinda persono pro sia modesteco kaj ĝentileco je ĉiuj paŝoj kiel zamenhofido. Bonvolu ĝui Koreion kaj la korean kulturon per tiu ĉi libro kaj vi estos bonvenigota en la Seula UK.



이 중기

Lee Jungkee

docento de humanistiko
en la Kyunghee Universitato,
estrarano de la Universala Esperanto Asocio,
prezidanto de la Seula Esperanto-Kulturcentro

ISBN 978-963-571-489-6

